



ÖSTERREICHISCHE
NATIONALBIBLIOTHEK

704347-B

Libro II. Esp-





ÖNB



+Z10378200X

N

OSTERREICHISCHE
NATIONALBIBLIOTHEK

704347-B

leg tempo: 15 tagoj

leg mono: 3 R ofo.

Krasnojarsk, la 29 / II 1916.

17

V. N. Devjatnin. Ojstrülle

Jeloloz

PLENA VERKARO.

LIBRO DUA.

Eldono de D. P. Wejsbrut.

ST.-PETERBURGO.

Presejo de D. P. Wejsbrut, Troickij Prospekt, 14.

1906.

Donacite al Internacia Esperanto Museo.

Samuelo
no. 10.

PLENA VERKARO

EDZIĜO.

Komedio en tri aktoj (el efektiva vivo).

PERSONOJ:

S-ro Teodoro Pugno, 45 jaroj,—urbestro.

S-ino Anno Pugno, 40 jaroj,—lia edzino.

S-ino Olgo Bulko, 30 jaroj,—vidvino de riĉa komercisto.

S-ino Mario Pastelo, 40 jaroj,—ŝia fratino.


S-ro Voldemaro Hoko, 35 jaroj,—polica observisto, loĝanta en domo de **S-ino Bulko**.

Marto,—kuiristino de **S-ino Bulko**; maljuna, sed ankoraŭ forta virino.

Knabino,—servantino de **S-ino Pastelo**.

Policano.

Lakeo de **S-ro Pugno**.



A K T O I.

Gastĉambro en loĝejo de **s-ro Hoko**. Ĝi estas ornamita simple, sed sufiĉe bone. Kiam oni suprenlevas kurtenon, **s-ro Hoko** promenas malrapide en ĉambro.

Apero 1. (Hoko sola).

Hoko. Ha, kiel mi amas ŝanĝadon de loĝejoj!... Nur tiu-ĉi festado pro nova loĝejo estas malagraba: ĉiam oni devas iom el poŝo preni, — ne en poŝon... Jes! (Post kelka silento). Sed mi ja devis ilin inviti, — aparte urbestron kaj lian edzinon: ili estas tiel favoremaj al mi; mastrinon kaj ŝian fratinnon mi ankaŭ ne povis ne inviti, ĉar alie kun kiu interparolus miaj geurbestroj?... Mi ne komprenas nur, kia malsaĝulo elpensis tiujn-ĉi festojn, — kia estas senco en ili? Ĉe aliaj — estas alia afero, sed ĉe mi mem... (rigardas horloĝon). Ha, tamen estas jam dekdua horo: baldaŭ venos miaj gastoj, kaj mi nenion ankoraŭ preparis!... Cetere, kion-~~de~~ mi devas prepari? Mi donos al ili teon... (subite ion rememorigante). Ho, jes, — mi ja tute forgesis: komercisto Ventrego promesis al mi bombojn por tiu-ĉi tago! Oni devas lin, friponon, almenaŭ unu fojon bone alpremi, — ĉar li estas tiela avarulo, tiela avarulo, ke vi eĉ prezenti al vi ne povas!... Se almenaŭ unu fojon tiu-ĉi bastardo donus ion bonan, — ne, neniam! Kiam mi iajoje venadas lian butikon, li ĉiam renkontas min kun siaj abomenaj salutoj, kaj poste... kion vi pensas? Li regalas min el sia grasa plenmano per nuksetoj, aŭ per io simila, — kaj nenion plu!... Ĉu ĝi plaĉas al vi?...

Malbona avarulego! Nu, atendu, mia karulo, mi vin ekinstruos!... (li sidiĝas ĉe skribtablo). Jen mi tuj skribos al vi amikan letereton... (skribas). „Altestimata sinjoro“... kiel oni lin nomas?... Nu, tute egale, mi skribos „Ardaliono“: ĝi estas sufiĉe bonsona nomo... Kiel-do estas plej lerte al li skribi?... (ekpensiĝas). Ha, tiel, ŝajne, estos bone!... (skribas). „Pardonu, ke mi maltrankviligas vin per mia amika peto“... (Tio-ĉi estos por li tre agrabla: mi estas lia amiko!... Ĥe-ĥe-ĥe!...) „Hodiaŭ mi festas mian nova-loĝejon, tial sendu al mi, mi petas, prunte (nepre „prunte“, ĉar alie li nenion donus, bastardo!) diversajn sukerajojn, kiuj estas konvenaj por tiu-ĉi okazo. Kun alta estimo, via bondeziranto kaj sincera amiko Voldemaro Hoko“ (li sigelas leteron). Bonege! Almenaŭ tri aŭ kvar rubloj en poŝo restos... He! Knabo!

Apero 2.

Policano. (Enirante). Kion vi ordonas, via sinjora moŝto?

Hoko. Ĉu vi scias, kie estas butikoj de Ventrego?

Policano. Jes, via sinjora moŝto.

Hoko. (Donas al li leteron). Jen, prenu tiun-ĉi leteron kaj portu ĝin al tiu-ĉi fripono. Diru al li, ke hodiaŭ al mi venos gastoj, mem s-ro urbestro venos,—kaj tial mi mem persone ne povas al li iri. Ĉu vi komprenas?

Policano. Jes, via sinjora moŝto. Ĉu mi devas atendi respondon?

Hoko. Jes, jes, nepre! Li ion donos al vi, kaj vi ĝin alportos al mi.

Policano. Mi ĉion ĝuste plenumos.

Hoko. Nu, bone. Iru.

(Policano foriras).

Apero 3.

Hoko. (Sola, kun kontenta vido). Mi tre amas tiun-ĉi sendisputan obeadon al estro. Vi povas paroli kion vi volas, eĉ ian tute nekredeblan sensencaĵon, kaj vi ĉiam aŭdos nur: „jes, via sinjora moŝto! ne, via sinjora moŝto!“ Tre bone!.. Kaj kiel agrable estas konscii en si tiun-ĉi forton, tiun-ĉi potencon!... Jes, tre bone, tre agrable!... (aŭskultante). Ŝajne, iu venis? Jes, jes... Kredeble mia mastrino... (iras al pordo). Ŝi tamen estas sufiĉe bela virino: tiel grasa, blanka...

Apero 4.

S-ino Bulko. (Riĉa^e, sed senguste vestita). Bonan tagon, estimata loĝanto! (etendas al li manon).

Hoko. (Tre ĝentile). Koran saluton, altestimata mia mastrineteto!

Bulko. Kiel-do vi fartas en via nova loĝejo?

Hoko. Ha, ĉu mi povas farti malbone, loĝante ĉe vi? Tre bone, tre bone,—multe dankas... (alŝovante por ŝi seĝon). Sidiĝu, mi petas, estimata sinjorino.

Bulko. Mi dankas. (sidiĝante). Pardonu, mi petas, sinjoro, ke mi venis al vi tiel simple, kiel hejme, vestita.

Hoko. (Atente ŝin rigardante). Kion vi diras, sinjorino? Vi estas vestita tiel bone, tiel bone, kvazaŭ... ia diino!...

Bulko. (Kokete). Ha, mia sinjoro, kiajn komplimentojn vi parolas!...

Hoko. Tute ne, sinjorino,—kiaj komplimentoj?

Bulko. Kiel-do ne komplimentoj? Diino!...

Hoko. Jes, jes! Tio-ĉi estas unu el plej prosperaj komparoj, kiujn mi iam faris! Je kio-do vi estas simila? Je iu floreto, aŭ...

Apero 5.

S-ino Pastelo. (Enirante). Vidu, kiel bone ili interparolas,—kvazaŭ du enamiĝintaj!

Hoko. (Rapide forirante de s-ino Bulko). Ha, sinjorino Anno! Bone venu, koran saluton!

Pastelo. Bonan tagon! Bonan tagon, fratino (kisas ŝin). Ĉu vi jam longe estas tie-ĉi?

Bulko. Ne, ne tre longe.

Hoko. Sidiĝu, mi petas! Mi estas senfine ĝoja, ke vi honorigis min per via vizito...

Pastelo. Nu, kia-do honorigo tio-ĉi estas!

Hoko. Ho, por mi, kredu, via vizito estas granda ĝojo!... (flanken). Diablo vin alportis!...

Bulko. Vin, kredeble, vizitas hodiaŭ multaj gastoj?

Pastelo. Dio mia! Kion-do mi faris? Mi ja estas tute ne vestita!... Mi tute forgesis pri gastoj... Oni devas forkuri...

Hoko. Ne, mia sinjorino, ne maltrankviliĝu: ĉe mi neniu estas, krom mia estimata estro kaj kune mia parenco—sinjoro Pugno kaj lia edzino.

Bulko. (Kun miro). Ĉu li estas via ^{pat}parenco? Mi ĝin ne sciis.

Hoko. (Kun grava vido). Jes, li estas mia parenco. Kial-do vin tio-ĉi mirigas?

Bulko. Kompreneble... en tio-ĉi estas nenio mirinda...

Pastelo. Kia-do parenco li estas por vi?

Hoko. (Kun ioma konfuzo). Vidu, estimata sinjorino... li, kompreneble... jes... Vidu,—kiam mia frato edziĝis... Mia frato forveturis nun alilandujon... Li estas tre riĉa homo... Jes!... Kiam li edziĝis,—s-ro Pugno estis lia edziga patro.

Pastelo. Ha, jes,—mi nun komprenas.

Hoko. Jes, jes—li estas sufiĉe proksima mia parenco,—kaj krom tio...

Apero 6.

(S-ro Pugno grave kaj malrapide eniras ĉambron; post li eniras ankaŭ lia edzino. Ĉiuj, ĉe ilia eniro levas sin de lokoj. Hoko kuras al gesinjoroj Pugnoj kaj humile ilin salutas).

S-ro Pugno. (Ne etendante manon al Hoko). Nu, bonan tagon; mi gratulas vin je via festo...

Hoko. Humile vin dankas, via generala moŝto!

S-ino Pugno. Bonan tagon, s-ro Hoko.

Hoko. (Kun malalta saluto). Kore salutas vin, multestimata sinjorino!

S-ro Pugno. Konatigu-do nin kun viaj gastoj.

Hoko. Ha, pardonu, via generala moŝto!... Mi pensis... (montrante s-inon Bulko). Mi havas honoron prezenti... Mia estimata mastrino, s-ino Bulko.

S-ro Pugno. (Etendas al ŝi manon). Tre agrable!... Generalo Pugno al viaj servoj!...

Bulko. (Kokete). Mi estas tre ĝoja konatiĝi.

Hoko. (Montrante s-inon Pastelo). S-ino Pastelo, fratino de mia mastrino.

Pastelo. Tre agrable. (S-ro Pugno silente etendas al ŝi manon).

S-ro Pugno. Nun, sinjorinoj, mi prezentas al vi mian edzinon.

S-ino Pugno. (Ĝentile). Anno Pugno.

Pastelo kaj Bulko. (Unuvoĉe). Tre agrable.

S-ro Pugno. (Flanken). Hoko diris veron: lia mastrino efektive estas sufiĉe bela kaj ankoraŭ taŭgas... Sekve mi ne vane venis... (laŭte). Nu, nun jam oni povas sidiĝi, kvankam mastro ne invitas...

Hoko. (Tute konfuzo). Ha, pardonu, mi petas... Mi estas tiel ĝoja, ke... Sidiĝu, mi petas!... (Ĉiuj, krom Hoko, sidiĝas).

S-ro Pugno. Kiel-do vi fartas, Hoko, en via nova loĝejo?

Hoko. Humile dankas, via generala moŝto,—tre bone. Mia mastrino estas tiel bonkora, tiel afabla por mi...

Bulko. (Kun rideto). Vi, sinjoro, ĉiam komplimentas.

S-ro Pugno. Kial-do vi pensas, ke tio-ĉi estas komplimento? Al mi ŝajnas, ke li diras ĝustan veron: vi estas efektive tre bona, ĝi estas videbla.

Hoko. Tute vere, tute vere!

Bulko. (Kokete). El kio-do ĝi estas videbla? Vi jam tiel malmulte konas...

S-ro Pugno. Tio-ĉi nenion signifas. Vidu, mi estas tre bona fizionomiisto: por mi estas sufiĉe nur unu fojon ekrigardi atente homon, kaj mi jam povas diri tute sen-erare: „tiu-ĉi homo estas bona, aŭ malbona“... Kaj prezentu al vi, ke mi neniam eraras.

S-ino Pugno. Nu, Teodoro, pro kio vi mensogas?...

S-ro Pugno. Tute ne, mia animo,—en tiuj-ĉi okazoj mi neniam eraras.

Bulko. Kaj nun vi, bedaŭrinde, eraris...

S-ro Pugno. (Kun rideto). Nu, bone,—mi ne disputas...

Hoko. (Sekrete ekrigardinte s-ron Pugno, kaj turnante sin al lia edzino). Ĉu vi vidis, altestimata sinjorino, kiel bela ĝardeno estas ĉe domo de mia bonega mastrino?

S-ino Pugno. Ĉu efektive? Ha, kia feliĉo! Ni, bedaŭrinde, ne havas tielan plezuron: ĉe nia loĝejo tute forestas ĝardeno.

Hoko. Eble vi dezirus ĝin vidi?

S-ino Pugno. Ha, kun plezuro,—mi tiel amas ĝardenon!

Hoko. En tiu okazo mi povas vin akompani tien,—

kaj estimata s-ino Pastelo, sendube, ne rifuzos montri al vi du rimarkindajn pomuojn, kiujn ŝi mem iam plantis.

Pastelo. Kun granda plezuro: ja tiuj-ĉi pomuoj estas mia fiereco!

S-ino Pugno. Estu tiel bona, kara sinjorino!...

Hoko. (Ruze, al s-ro Pugno). Kaj vi, via generala moŝto,—ĉu vi ne deziras promeni malmulte?

S-ro Pugno. Ho, ne,—mi ne tre amas promenadi.

Hoko. (Al Bulko). En tiu okazo... mi kuraĝas peti vin, mia estimata mastrino, volu anstataŭigi min por kelka tempo, por ke s-ro urbestro ne enuu.

Bulko. Kun granda plezuro!

S-ro Pugno. Ha, mia sinjorino, ne maltrankviliĝu! Eble vi ankoraŭ plivolus iri? Ne ĝenu vin, mi petas!

Bulko. Ho, ne, sinjoro,—al mi jam sen tio tedis mia ĝardeno,—mi plivolas resti.

S-ino Pugno. (Al Hoko). Nu, ni iru! Ili estas homoj prozemaj,—ni-do—poetoj... (al Pastelo). Iru, sinjorino.

(Hoko kaj s-inoj Pugno kaj Pastelo foriras).

Apero 7.

S-ro Pugno. (Ĝemante). Glor'al Dio! Fine foriris tiu-ĉi terura virino!...

Bulko. Mia fratino? Jes, ŝi efektive...

S-ro Pugno. (Pli ĝemante). Ne, ne,—mia edzino... Ha, kara sinjorino, se vi scius, kiel malfeliĉa mi estas!

Bulko. (Mirege). Vi?!

S-ro Pugno. Jes, mi... Ne pensu, ke mi, atinginte tiel gravan situacion en societo, estante eĉ regna homo,—fariĝis tute feliĉa!... Ne, kara sinjorino: tiu-ĉi virino malfeliĉigis min, dank'al ŝi mi antaŭtempe maljunuliĝis...

Bulko. Nu, tion-ĉi oni ne povas diri. Vi tiel bone ankoraŭ elrigardas... *aspekto*

S-ro Pugno. Ne, mia sinjorino,—ne diru tion, kion vi ne pensas... Mi ŝajnas tute maljunulo,—jes! Dume... ĉu vi scias, kiom da jaroj mi travivis en nia malbona mondo?

Bulko. (Ne kuraĝe). Mi... ne scias.

S-ro Pugno. Iom pli, ol tridek jaroj! Jes...

Bulko. Mi mem tiel same pensis. (flanken). Pro kio li tion-ĉi parolas al mi?

S-ro Pugno. (Kun profunda sopiro). Nur malfeliĉa vivo maljunigis min!... Mi eble ne konscius mian malfeliĉon, se nur mi ne renkontus sur mia viva vojo unu personon, kiun mi kontraŭvole tiel ekamis... (post kelka silento). Ĉu vi scias, ke mi vin jam vidis kelkajn fojojn ankoraŭ antaŭ nia konatiĝo?

Bulko. Vi min vidis?... Povas esti,—ĉar mi ankaŭ vin vidis.

S-ro Pugno. (Ruĝemante). Jes, sendube, vi min vidis, sed tio-ĉi faris en vi nenian impreson,—kaj en mi... Ĉu vi scias, kiu estas tiu persono, pri kiu mi ĵus al vi parolis.

Bulko. Ne, mi ne scias.

S-ro Pugno. (Paside). Tiu-ĉi persono estas... vi!...

Bulko (rapide sin levante). Ha, Dio mia!... Kion vi parolas?!...

S-ro Pugno. (Falante sur genuojn kaj kaptante ŝian manon). Jes, kara sinjorino,—mi amas vin! Amas senfine, pasie, kun tuta flamo de juneco!...

Bulko. (Penante forpreni manon). Ha, sinjoro, vin levu, mi petas! Kion vi faras? Ĉu mi estas sanktfiguro, ke vi staras antaŭ mi sur genuoj? Vin levu, mi petas!...

S-ro Pugno. (Paside). Jes, vi estas por mi sanktfiguro, vi estas mia diino! (Kelkajn fojojn kisas ŝiajn manojn).

Bulko. (Flanken). Ree diino!... (laŭte). Forlasu min, sinjoro, mi petas vin, forlasu!... Iu eniros...

S-ro Pugno. Eniru mem Anĝelo Dia,—eĉ li ne malpermesos al mi vin ami kaj malkovri antaŭ vi mian elturmentitan animon!... Amo estas forta, ĉiopova!...

Bulko. Vin levu, mi petas!... Povas ja eniri via edzino, kaj tiam...

S-ro Pugno. (Rapide sin levante). Edzino?!... Ha, diablo ŝin prenu... mi tute forgesis, ke ŝi estas tie-ĉi!...

Bulko. (Flanken). Kiel, tamen, estas agrable, atentadi vortojn de amo!...

S-ro Pugno. (Serioze). Pardonu min, estimata sinjorino! Mi, eble, ofendis vin per mia ago... Sed mi ne havis fortojn kaŝi de vi mian senton... Pardonu!...

Bulko. (Konfuzo). Ha, kion vi diras?... Pro kio vi petas pardonon?... Mi... kontraŭe, mi estas ĝoja... tio estas... mi mem, se nur ĝi ne estus malkonvene... Mi ankaŭ... dirus al vi tion saman...

S-ro Pugno. (Ĝoje). Kio, kio?!... Kion vi dirus?

Bulko. (Konfuziĝe). Dio mia, kion mi parolas! Ha!... al mi... al mi estas honte!... Vi ja havas edzinon... Vi... Sed mi tamen... Ha, Dio mia!

S-ro Pugno. (Kaptante ŝian manon). Sekve... sekve vi min ankaŭ amas?

Bulko. (Mallaŭte). Jes!... (ankoraŭ pli mallaŭte) mi... ankaŭ amas...

S-ro Pugno. (Ĉirkaŭprenas ŝin). Diino mia... (En tiu-ĉi momento ĉambron eniras: S-ino Pugno kaj poste Hoko kaj Pastelo)...

Apero 8.

S-ino Pugno. (Haltas en pordo). Bone!... Tre bone!...

S-ro Pugno. (Forsaltante de Bulko kaj kvazaŭ rigardante pentraĵon sur muro). Kiel bela estas tiu-ĉi pentraĵeto!... Jes... De kie vi prenis ĝin?...

S-ino Pugno. (Enirante ĉambron, kun ironio). Jes, pentraĵo estas efektive tre bela!... Nu, mia kara edzeto...

S-ro Pugno. (Sin turnante al ŝi). Ha, tio-ci estas vi, mia animo?... Mi pensis...

S-ino Pugno. (Proksimiĝante al li). Jes, tio-ĉi estas mi... Kaj vi? Kion vi pensis?

S-ro Pugno. (Flanken). Ha, diablo, kiel abomene!... (laŭte). Vidu, mia kara, ni tie-ĉi... kun s-ino Bulko...

S-ino Pugno. (Kun malbona rideto). Jes, jes,—mi ĉion bone vidas.

Hoko. (Flanken). Nu, ŝajne, bone enfalis malsaĝa maljunuleto!... Nun vi jam bone ricevos,—atendu iom...

Pastelo. (Flanken). He, kara fratino! Mi ne atendis de vi tion-ĉi!...

S-ro Pugno. (Tute kofuziĝe). Vidu, kara,—s-ino Bulko sciigis min... ni interparolis...

S-ino Pugno. (Al Bulko). Kion-do vi sciigis, mia estimata sinjorino, al mia kara edzo? Kredeble ion tre interesan? (Bulko obstine silentas). Vi ja entute estas tre interesa... (al s-ro Pugno). Nu, mia kara, eble ni jam foriros hejmen? Vi ja havas tiel multe da diversaj aferoj... Iru, kara amiko!...

S-ro Pugno. (Humile). Kiel vi volas, mia kara...

Hoko. Kiel-do, via generala moŝto? Eble vi permesos almenaŭ po unu glaso da teo?... Mi petas!...

S-ino Pugno. Ne, sinjoro, mi dankas,—vi ja scias: mia edzo havas tiom da aferoj! (al Bulko). Adiaŭ, estimata sinjorino! Vi, kredeble vizitas iam mian edzon?... (Gesinjoroj Pugnoj eliras, Hoko ilin akompanas. Post ilia eliro s-ino Bulko rapide forkuras el ĉambro; Pastelo kuras tuj post ŝi).

Pastelo. Fratino, fratineteto! Haltu-do, mi volas ion diri al vi!... Ha, Dio mia (forkuras).

Apero 9.

Hoko. (Sola). Ĥa-ĥa-ĥa!... Ĉiuj forkuris!... Ha, kiaj-do ili estas malsaĝuloj!... Dio, Dio! Eĉ tian bagatelan aferon ili ne povis lerte fari!... Fi, kia malbonegaĵo!... eĉ rememori estas abomene!.. Kaj tiu-ĉi maljuna malsaĝulo... Edzino staras en pordo kaj li: „diino mia“! Nu vi ekscios nun vian diinon, longe pri ŝi memoros! Sinjorino Pugno ja estas virino kuraĝa, decidema virino: ŝi vin ekinstruos amindumi!... Kaj inde estas: ne petolu en maljuna aĝo! Vidu, kia li estas: eble nur tri tagoj ĝis morto restis, kaj li ankoraŭ pri virinoj revas!... „Diino mia!“ Jen vi ekscios diinon!... (post kelka silento). Kaj nun li nepre en ĉio min kulpigos: „kiel, li diros, vi min ne antaŭsciigis“? Kaj kiamaniere mi tion-ĉi farus? S-ino Pugno estas virino ruza: ŝin malfacile estas trompi!... Ho, abomena malsaĝulo! estu jam kontenta je tio, ke mi tiel lerte konstruis por vi tiun-ĉi malsaĝegan sinvidon!... Fi, kia malbonegaĵo!... (promenas silente en ĉambro).

(Kurteno).

Fino de 1-a akto.

A K T O II.

Sceno prezentas gastĉambron en domo de s-ino Bulko. S-ro Pugno sidas sur kanapo kaj fuĝas.

Apero 1.

S-ro Pugno. (Sola). Tre longe tamen forestas mia aminda! Preskaŭ tutan horon mi sola sidas... (li oscedas). Tamen, tiu-ĉi amuziĝo tre rapide tedas: nun mi jam kun

plezuro malaperus; sed ĉiam, bedaŭrinde, mi ne povas elpensi, kiel oni povas tion-ĉi fari... Mi ja havas jam nenian plezuron!.. Mi tute ne komprenas, kiel mi povis enamiĝi tiun-ĉi grasan virinegon. De kie venis al mi tiu-ĉi malsaĝeco? Cetere, kion-do mi diras? Ĉu efektive mi estas enamiĝinta? He-he-he!... Kia sensencaĵo! Ĉu tio-ĉi estas amo? Ho, ne, estimata sinjoro! Ne trompu almenaŭ vin mem: vi ja estas sufiĉe maljuna homo, kaj al tio sufiĉe saĝa,—vi, ŝajne, ne estas kapabla al tio... Amo!... Ĥa-ĥa-ĥa!... (li sin levas kaj promenas en ĉambro). Tamen pasis jam preskaŭ duono da jaro, de kiam mi komencis tiun-ĉi komedion... Ŝajne, jam estas tempo ĝin fini, ĉar alie tre facile povas okazi ia malagrablo: ankorau du, tri monatoj, kaj... (haltas, konsiderante). Ja, efektive! Jes, jes... (kalkulas per fingroj) ses... sep... ok... naŭ... jes, jes!... Tio-ĉi estas tre malagraba, diablo ĝin prenu!.. (sidiĝas sur kanapo). Kiel strangaj iafoje okazoj estas en homa vivo: nenio, ŝajne, estis kaj subite... Fil... Kia abomena sensencaĵo!... Sed rememoru nur bone,—Dio! Kiel ĉio tio-ĉi malsaĝege fariĝis!... Prenu almenaŭ tiun-ĉi mian unuan parolon pri amo... Diablo scias, kiel ĝi okazis! Mi eĉ ne povas kredi, ke io simila iam estis efektive: ĉirkaŭpreno... edzino... Mi tre volus vidi, kiel malsaĝan vizaĝon mi tiam havis... Ĥa-ĥa!... Kaj ĉio tiel fariĝis nur dank' al tiu-ĉi malsaĝulo Hoko: li ja promesis al mi ĉion lerte fari... Nu, lerte!... (oscedas). He,—malbona afero! Estus tre bone, se ĉio tio-ĉi estus nur malbona sonĝo...

Apero 2.

Hoko. (Enirante,—flanken). Li jam estas tie-ĉi? (laŭte). Mi havas honoron saluti vin, via generala m.osto!

S-ro Pugno. (Ne turnante eĉ kapon). Bonan tagon...

Hoko. Kie-do estas s-ino Bulko?

S-ro Pugno. Mi mem volus demandi vin pri tio-ĉi.

Hoko. Ĉu sinjorino ne estas hejme?

S-ro Pugno. Kredeble,—ĉar alie, al mi ŝajnas, mi ne sidus tie-ĉi sola. Kaj vi pro kio venis?

Hoko. Mi... mi... pro enuo...

S-ro Pugno. Vi volas, kredeble, diri „de enuo“,—ĉar vi ne havas eble kion fari? Jen mi... mi efektive venis nur pro enuo: mi sidas jam tutan horon kaj oscedas...

Hoko. Kien-do foriris sinjorino?

S-ro Pugno. Mi tion-ĉi ne scias. Ŝi havas, kredeble, ian aferon.

Hoko. Oni devas pensi, ke jes!... (silento).

S-ro Pugno. (Flanken, tre vive). Ha, kia brilanta penso, venis mian kapon!... Jen, se ĝi efektiviĝus!... Nu, mi ekprovos... (laŭte al Hoko) Ĉu plaĉas al vi s-ino Bulko?

Hoko. Sinjorino Bulko?... Mi... kion mi povos al vi diri, via generala moŝto? Ŝi estas virino... ŝi estas bona mastrino...

S-ro Pugno. Sekve ŝi plaĉas al vi?

Hoko. (Kun malsaĝa rideto). Mi... mi ne scias, pri kio vi deziras paroli...

S-ro Pugno. Kiel pri kio? Pri s-ino Bulko

Hoko. Jes, mi komprenas,—sed... en kia senco?...

S-ro Pugno. Malsaĝa demando!... „En kia senco“... Mi demandas vin tute klare: ĉu al vi plaĉas s-ino Bulko, aŭ ne? Klare? Ĉu vi komprenas?

Hoko. Mi komprenas, sed... vi deziras ŝerci, via generala moŝto?

S-ro Pugno. Tute ne,—mi parolas tute serioze.

Hoko. Sed... sed pro kio tio-ĉi estas?

S-ro Pugno. (Malpacience, flanken). Dio! kiel malsaĝa estas tiu-ĉi homo! (laŭte). Vi min tute ne komprenas, kiel mi rimarkas. Nu, mi demandas vin tiamaniere: ĉu vi

17
viro

de la bolion!

19.
ke mi tuj mem devas forpreni de vi unu el viaj gastoj,— mi nur vin atendis, por peti permeson tion-ĉi fari: mi devas ion komisi al s-ro Hoko.

Bulko. (Flanken). Li jam volas lin forpeli... (laŭte). Kredeble, ree ia grava afero?

S-ro Pugno. Jes, sinjorino, tre grava.

Hoko. (Kun miro). Kia-do afero, via generala moŝto?

S-ro Pugno. (Palpebrumante al Hoko). Ĉu vi jam forgesis? Kion-do mi parolis al vi antaŭ alveno de sinjorino?

Hoko. (Konfuzo). Tio estas... tuŝante edziĝon?...

S-ro Pugno. (Rapide sin levante). Kia edziĝo?!... Ha, kiela malsaĝulo! (al Bulko). Pardonu, sinjorino, mi devas diri al li kelkajn vortojn sekrete.

Bulko. Mi petas,—ne ĝenu vin!...

S-ro Pugno. (Forirante kun Hoko al pordo). Vi estas ĝusta malsaĝulo, mia amiko!... Vi ja apenaŭ ne difektis ĉion... Dume vi eĉ unu vorton ne parolu pri edziĝo!... Ĉu vi komprenas? eĉ unu vorton!...Antaŭ ĉio diru al mi, kion vi decidis, kaj poste...

Hoko. Mi jam decidis, via generala moŝto.

S-ro Pugno. Kiel-do vi decidis? Ĉu vi konsentas?

Hoko. Jes!... Sed, via generala moŝto... mi esperas, ke ofico de distriktestro kaj, krom tio, kelka sumo da mono... En tia okazo mi estas konsenta!... Ĉar vi ja bone scias, via generala moŝto, ke mi estas homo malriĉa...

S-ro Pugno. (Ĝoje). Jen, bone,—bonege! Mi ĉiam estis certigita, ke vi estas saĝa homo!... Tuŝante-do tion, kion mi promesis al vi, estu tute trankvila: mia vorto estas sankta, nerompebla!

Hoko. Jes, via generala moŝto, mi tion-ĉi volas kredi, sed...

S-ro Pugno. Sen, „sed“, mi petas! Inter ni jam ĉio estas finita!... Dume-do vi foriru de tie-ĉi: mi devas - iom

interparoli kun via estonta edzino... (laŭte). Nu, iru nun, kaj bone plenumu mian komision.

Hoko. (Ankaŭ laŭte). Tuj, via generala moŝto,—ĉio estos ĝuste plenumita... (al Bulko). Ĝis sinvido, atestimata sinjorino,—pardonu, ke mi tiel rapide foriras,—sed mi devas rapidi tien, kien sendas min mia amata estro...

Bulko. Sendube, sendube! Mi eĉ ne petas vin resti, ĉar servo estas sankta afero,—aparte via servo... Ĝis sinvido, sinjoro!

(Hoko foriras).

Apero 4.

Bulko. (Apenaŭ eliris Hoko). Ĥa-ĥa-ĥa! Kiel vi lerte lin forigis! Ha, mia, kara ruzulo...

S-ro Pugno. (Mire). Pro kio vi ridas? Kiun mi forigis? Kio fariĝis kun vi?

Bulko. Dio! kiom multe da demandoj! Kaj jen mia respondo (rapide sin levas kaj kisas lin). Ĥa!.. ĥa... ĥa!.. Mi eĉ ne pensis, ke vi estas tiel ruza homo,—oni devas vin timi... ĉu ne vere? (ree lin kisas).

S-ro Pugno. (Sin deturnante). Hodiaŭ mi vin tute ne komprenas... Kio fariĝis al vi? Je kio vi tiel ĝojas?

Bulko. Estante kun vi, mia karulo, mi ĉiam estas ĝoja!

S-ro Pugno. (Flanken). Ĉu efektive tiu-ĉi malsaĝa virino estas enamiĝinta? Ne povas esti! (laŭte). Kial-do vi estas tiel ĝoja kun mi?

Bulko. (Pasie). Ĉar mi vin tro multe amas! (ree lin kisas).

S-ro Pugno. (Sulkiĝante). Jen kio! Hm... Kaj ĉu ĉiuj enamiĝintaj ĉiam ĝojas estante kun siaj amatoj?

Bulko. Ho, Jes!... Alie ne povas esti!

S-ro Pugno. Hm... hm... Tre strange!... Kial-do Hoko,

21.

17
 edziĝus kun s-ino Bulko, se mi proponus al vi ŝiajn manon kaj koron?... Kaj se vi scius krom tio, ke ŝi serfine vin amas?

Hoko. (Kun rideto). Vi ree deziras ŝerci, via generala moŝto... Kiel mi scias, s-ino Bulko vin amas, sed ne min. Pro kio-do vi min...

S-ro Pugno. Mi ripetas ankoraŭ unu fojon, ke mi tute ne ŝercas,—kaj jen al vi bona argumento de tio, ke mi parolas tute serioze: vi bone scias, ke mi jam estas edzigita kaj ke mia edzino ankoraŭ vivas,—sekve nun mi mem edziĝi ne povas, kaj tial mi volus, ke vi min anstataŭigu. Nu, ĉu vi fine komprenis?

Hoko. Mi komprenas, komprenas!... Sekve vi, tiel diri... volas, ke mi...

S-ro Pugno. Atendu malmulte, aŭskultu min antaŭe. Vidu mia karulo,—mi estos malkaŝema kun vi,—cirkonstancoj estas tielaj, ke se mi, gardu Dio, estus fraŭlo, mi devus fariĝi ŝia edzo. Ĉu vi komprenas? Sed ĉar mi estas jam edzigita, oni ne povas min devigi tion-ĉi fari, kaj mi riskas nur tion, ke mi mem povas malhoniĝi kaj kune malhorigi vian estimatan mastrinon; mi-do nek unuan, nek duan volas, kaj kune kun tio mi deziras feliĉon por vi (ĉar mi vin tre amas),—tial mi proponas al vi edziĝi kun s-ino Bulko, kiu — mi ripetas ankoraŭ unu fojon—kore vin amas... Ĉu vi konsentas?

Hoko. (Kun humila saluto). Sincere vin dankas, via generala moŝto, por via aminda partopreno en mia sorto,—sed mi ankoraŭ... pardonu... mi ankoraŭ ne pensas pri edziĝo...

S-ro Pugno. (Malkontente). Sekve vi min rifuzas? Bone, mi komprenas...

Hoko. (Humile). Mi estas homo malriĉa, nenion havanta...

S-ro Pugno. (Malrapide kaj signife). Sed se vi edziĝos,

mi, kiel bona estro, faros al vi bonan edziĝan donacon,— ekzemple, vi ricevos oficon de distriktestro kaj... kaj kelkan sumon da mono... Kion vi diros?

Hoko. (Flanken). Ĝi estus tre bone!... (laŭte). Mi, via generala moŝto, alprenus kun danko kaj oficon, kaj monon... sed... sed...

S-ro Pugno. (Flanken). Li ŝajne, cedas! (laŭte). Kio-do tie-ĉi povas esti „sed“? De vi mem dependos ĉion ricevi: edziĝu, kaj vi estos distriktestro kaj ricevos monon...

Hoko. Sed s-ino Bulko povas ne konsenti...

S-ro Pugno. Ha, kiel stranga homo vi estas! Komprenu-do, ke ŝi vin amas!

Hoko. (Kvazaŭ konsiderante, flanken). Ha, kiel bone estus, se mi efektive fariĝos distriktestro! Kiom da mono mi prenados!... (laŭte). Tio-ĉi estas bona, sed... pardonu, mi ial ne povas kredi, ke... ke... s-ino Bulko ja, kiel mi scias...

S-ino Pugno. (Malpacience). Nenion vi scias!... Nu, se vi volas, mi estos via svatisto, kaj mi esperas, ke ĉio bone finiĝos.

Hoko. (Konsiderante). Mi ne scias, via generala moŝto,—pardonu, sed mi ankoraŭ malmulte pripensos...

S-ro Pugno. Pri kio-do vi pensos? Komprenu...

Apero 3.

Bulko. (Rapide enirante). Ha, karaj gastoj!... Kaj solaj?

S-ro Pugno. (Sin levas kaj etendas al ŝi manon). Bonan tagon!

Hoko. (Flanken). Ŝi ja estas sufiĉe bela, je Dio! (laŭte). Salutas vin, estimata mastrino!

Bulko. Pardonu, sinjoroj, ke mi igis vin resti solaj,— sed mi estis tiel okupita!...

S-ro Pugno. Vi ankaŭ min pardonu, mia sinjorino.

19.

23. **S-ro Pugno.** (Konsiderante). Hm... Kiel fari?... Mi havas unu projekton, kiu estas tre, tre... eĉ tute ebla... Vidu, mia kara, kiel mi jam diris al vi, Hoko vin amas, pasie amas,—kaj se li ĝis nun nenion komencis, tio-ĉi fariĝis esceptinte nur dank' al tio, ke li ne kuraĝis min malhelpi,—sed mi estas tute konvinkita, ke apenaŭ li ekscios, ke inter ni ĉio jam estas finita, li tuj mem sin turnos al vi...

Bulko. (Decide). Sed mi neniam konsentos fariĝi edzino de tiu-ĉi mizera policisto,—ne rigardante eĉ tion, ke li estas noblulo kaj mi...

S-ro Pugno. Ha, mia anĝelo!... Pro kio ree tiuj-ĉi malbonaj pensoj? Nu, kial li estas ne bona homo? li estas saĝa, honesta, nobla!... Kaj, fine mi mem ne deziras, ke vi fariĝu edzino de simpla mizera policisto: vi estos edzino de distriktestro, ĉar mi, kiel edziĝan donacon, donos al li tiun-ĉi oficon apenaŭ vi konsentos edziniĝi kun li... Post kelka tempo mi ankoraŭ lin plialtigos, kaj vi estos tute kontenta... Sed plej grave memoru, ke tiamaniere ĉio por ĉiam estos kaŝita!... Sole nur pro ĝi vi devas konsenti fariĝi lia edzino!...

Bulko. (Konsiderante). Jes... Pro ĝi, sole pro ĝi... Jes, mi devas konsenti!...

S-ro Pugno. (Kun ĝemo). Tiela estas volo de ĉielo mem, mia anĝelo!... Tamen tio-ĉi ne malhelpos nin resti geamikoj...

Bulko. (Vive). Ho, jes... Mi estos edzino de distriktestro kaj kune... via... amikino!

S-ro Pugno. Sekve ĉio estas decidita kaj finita,—kaj baldaŭ mi povas esperi viziti jam s-inon Hokon?

Bulko. Kredeble, jes!...

S-ro Pugno. Tre agrable!... Nun-do (li sin levas) mi devas foriri kaj lasi vin pripensi vian feliĉan estontecon (Etendante al ŝi manon). Ĝis ŝinvido, sinjorino!

Bulko. Kien-do vi tiel rapidas?

S-ro Pugno. Mi... mi revenos al plenumado de miaj edzoj, patroj, oficaj kaj aliaj devoj...

Bulko. Vi, kredeble, ĝis morto mem restos ŝercisto!

S-ro Pugno. Kredeble, jes... tiela jam estas mia naturo... Nu, ĝis sinvido, mia anĝelo!

Bulko. Ĝis sinvido. (Ŝi akompanas lin ĝis pordo kaj poste revenas ĉambbron).

Apero 5.

Bulko. (Sola, sidiĝas sur seĝo kaj ekpensiĝas). Kiel malfortika, kiel kaduka estas ĉio en mondo! Ĉu mi povis atendi, ke tiu-ĉi gaja romaneto finiĝos tiamaniere? Ĉu mi pensis, ke niaj senkulpaj koraj amuzoj estos preteksto de ĉikanoj?... Jes, oni devas konsenti, ke ĉio en mondo estas vantaĵo!... (ĝemante). Se nur mi scius al kiuj sekvoj alkondukos nin tiu-ĉi amuzo, mi neniam ĝin komen-
cus!... Jes, Teodoro estas prava: en ĉiu okazo kaj per tutaj fortoj oni devas ĉion kaŝi. Sed el tiu-ĉi malagrabra situacio ekzistas nur sola eliro: edziniĝi, — edzo kaŝos miajn pekojn!... Sed ĉu sin trovos ia malsaĝulo, kiu... kiu konsentos esti nur ŝirmo?... (ŝi sin levas kaj iras al spe-
gulo). Sendube, mi ne estas ankoraŭ malbela... (ĉirkaŭ-
rigardas sin en spegulo). Mi estas eĉ bela, eĉ oni povas diri—tre bela!... Jes, jes... Kaj mi volonte kredas, ke tiu-
ĉi malsaĝulo Hoko enamiĝis min. — Sed ĉu efektive li proponos al mi fariĝi lia edzino, kiam li ekscios, ke mi disiĝis kun urbestro?! Mi prezentas al mi, kielan vizaĝon li faros, kiam elparolos: „permesu, altestimata sinjorino, proponi al vi mian manon kaj koron“!... Tamen mi alprenos lian proponon; li ja ne kuraĝos malvastigi mian liberecon, ĉar li timos s-on urbestron, — mi-do dume fariĝos noblulino! Estas nur malbone, ke ni devos loĝi

estante tie-ĉi ĉe vi, ne esprimas tielan... apartan ĝojon?

Bulko. Hoko?!... Ĥa-ĥa-ĥa!... Tiu-ĉi malsaĝulo?... Dio mia!... Kiela-do vi estas ŝercisto, mia kara!

S-ro Pugno. (Serioze). Vi eraras, sinjorino: unue mi fute ne ŝercas, sed diras serioze; due — Hoko ne estas malsaĝulo, kiel al vi plaĉas lin nomi, sed li estas inteligenta kaj tre saĝa homo, al tio li estas genta noblulo!... Krom tio, Hoko estas en bona rimarko ĉe supra estraro, li estas bona servisto... Kaj fine mi mem lin amas...

Bulko. (Timeme). Dio, — kia tono!... Ĉu efektive vi ek-koleris, mia amiko, ke mi nomis s-ron Hokon malsaĝ... t. e. ke mi ne sufiĉe bone parolis pri li?

S-ro Pugno. Mi entute ne amas, kiam antaŭ mi malbone parolas pri homo, en kies ecoj kaj indoj mi ne dubas... Kaj, fine, se li eĉ efektive estus malsaĝulo, fripono kaj kion vi volas,—li tamen eĉ en tia okazo — almenaŭ en okuloj de malsupra stato—estas estiminda nur pro tio sola, ke li estas noblulo, kaj noblulo genta!...

Bulko. Nu, pardonu min, mia kara!... Nun mi jam bone vidas, ke s-ro Hoko estas nobla, estiminda homo,—mi tute ŝanĝis mian opinion pri li. Nur vi ne kolere min kaj ne parolu kun mi tiel... tiel severe, tiel malde-likate!

S-ro Pugno. (Flanken). Jen, vi havas! Kia delikataĵo!... (laŭte). Mi ne koleras vin,—kaj parolante kun vi, laŭ viaj vortoj, tiel severe, mi volas nur aldoni pli oficialan tonon al miaj veraj vortoj.

Bulko. (Kun rideto). Ĉu vere? Vi ne koleras? Nu, mi jam nenion plu bezonas! (Rapide lin kisas).

S-ro Pugno. (Sulkiĝante, flanken). Ha, kia tedanta virino! (laŭte). Sed, mia amiko, hodiaŭ mi venis al vi tute ne pro kisado, sed pro tre grava afero.

Bulko. (Nekontente). Kia-do estas tiu-ĉi afero?

S-ro Pugno. Tre grava! Vidu: mi volas fari el vi noblulinon...

Bulko. Bedaŭrinde, ĝi ne estas plenumebbla...

S-ro Pugno. Kial?

Bulko. (Malĝoje). Ĉar vi ja ne povas kun mi edziĝi!...

S-ro Pugno. (Flanken). Kia malsaĝulino!... (laŭte). Ne sole edziĝi, sed mi ne povas eĉ daŭrigi... tiun-ĉi... nian... konatecon...

Bulko. (Kun teruro). Kiel!?... Kial?!...

S-ro Pugno. Antaŭ ĉio, trankviliĝu, mi petas!... Mi tute konsentas, ke tiu-ĉi ekbato de sorto estas tre malfacila por ni,—sed... *n* Kiom-do fari? Oni devas humiliĝi. Vidu... aŭskultu kaj komprenu min bone: nia interligo daŭras jam preskaŭ duonon da jaro, kaj nun mi kore bedaŭras, ke ĝi estis komencita iam; ja de komenco mem ni devis jam antaŭvidi malbonan finon: nin trovis en ĉirkaŭprenoj via fratino kaj mia edzino, kiuj, kiel vi scias, estas tre ĉikanemaj, kaj sekve ili ne silentis pri tio, kion vidis, kaj rakontadis eble tion, kion eĉ tute ne estis... (flanken). Cetere, kio-do ne estis inter ni?!... (laŭte). Sed ni estis forlogitaj per nia sento, kaj ne volis scii sekvojn, kiuj tamen ne prokrastis aperi: nia interligo fariĝos ĉiam pli kaj pli sciata de ĉiuj, kaj post kelka tempo al ni minacas grandega malagrabraĵo, kiu vin, kiel el virinon, ekfrapos senfine pli forte, ol min; tial, videble, ni nepre devas disiĝi!...

Bulko. (Sopirante). Jes... mi estas preskaŭ konsenta kun vi... ni devas disiĝi!...

S-ro Pugno. Sopiradi nun estas tute superflue: ni ja estas homoj sufiĉe maturaj, tial „ludi je amo“ ni jam ne devas, sed ni devas pripensi, kiel fari, ke ĉio estu kaŝita?

Bulko. (Malĝoje). Jes, jes, mi tute konsentas: oni devas ĉion kaŝi... Sed kiel ĝin fari?!...

23.

Apero 8.

27.

Marto. (Enirante). Al vi, sinjorino, venis ia policano.

Bulko. Por kio? Kion li volas?

Marto. Mi ne scias. Mi lin demandis, kion li volas,— kaj li parolas pri ia amantino de s-ro urbestro...

Bulko. Pri kia amantino? Kian sensencaĵon vi diras?

Marto. Glor' al Dio, mi brandon ankoraŭ ne trinkis,— pro kio-do mi sensencaĵon parolas? Mi mem diris al li, ke tie-ĉi nenies amantino estas, sed li ne kredas...

Bulko. Kion-do li diras?

Marto. Mi diris al li, ke tie-ĉi loĝas s-ino Olgo Bulko, vidvino de komercisto,— kaj li rediras: „mi nome ŝin serĉas!“

Bulko. (Flanken). Fi, kia abomenaĵo! (al Marto severe). Ne, vi diras ian malsaĝecon...

Marto. Kia malsaĝeco? Se vi ne kredas, mi tuj vokos al vi tiun-ĉi policanon: li mem diru al vi veron...

Bulko. (Kolere). Iru for, malsaĝulino!

Marto. Pro kio vi min insultas? Kredeble, vero al vi ne tute plaĉas?

Bulko. (Batante per piedo). For, for, sensaĝa virinego!... Voku al mi tiun-ĉi malsaĝulon!

Marto. (Forirante). „Sensaĝa, malsaĝulo!“ Vidu, kia saĝega aperis!... Senhontulino!... (Foriras).

Apero 9.

Policano. (Enirante). Ĉu vi estas amantino de s-ro urbestro?

Bulko. Kio?!

Policano. (Donante leteron). Jen, al vi estas letero de lia generala moŝto...

Bulko. (Grave sin levante). Kio? Kion vi diris? Ripetu, kion vi diris?

Policano. Mi diris, ke al vi estas letero de lia generala moŝto.

Bulko. (Elŝirante de li leteron). Sed kiel vi nomie^s min? Kiel?

Policano. Mi nomis vin amantino...

Bulko. (Svingante per manoj en grandega kolero). Ha, fripono, arogantulo!...

Policano. (Trankvile). Kio-do vi estas?

Bulko. Ĉu vi scias, bastardo abomena, ke mi... ke vi estos en malliberejo!. Mi vin...

Policano. Pro kio-do?

Bulko. (Furioze). Vi... mi... Ha, besto, fripono, ŝtelisto!... Ĉu vi scias, ke mi estas nobla... komercistino de unua rango!... Mi vin ordonos... sufoki!...

Policano (Tute trankvile). Nu, adiaŭ, nobla sinjorino! Lia generala moŝto, sinjoro urbestro ne ordonis atendadi respondon... (foriras).

Bulko. (Krias). Ne, haltu, haltu, besto aroganta! Vi ne foriros tiel, bastardo!...

Policano. (Post pordo). Mi ne havas tempon, sinjorino!...

Apero 10.

Bulko. (En malfortiĝo falas seĝon). Dio, Dio! Kion mi atingis!... Ĉiu fripono kuraĝas min malhonorigi, ĉiu besto povas min turmenti, piki,—kaj neniu min defendas!... (Ŝi kaŝas vizaĝon en manoj. Post kelka tempo ŝi rapide sin levas). Ne, oni devas fini ĉion! S-ro Pugno estas prava: mi devas edziniĝi... Mi eĉ mem proponos al iu mian manon kaj koron!... Jes, jes!... (ree sidiĝas). Tamen, kiondo skribas al mi s-ro Pugno?... (ŝi sensigeligas leteron kaj

29

25 ne tie-ĉi, sed en ia senviva loko... Cetere eĉ tio-ĉi nenion signifas,—mi almenaŭ vivos, kiel bienhavantino: mi komencos mastrumi, kolektados donacojn,—al distriktestroj ja ĉiam oni proponas donacojn... (haltante). Kio-do estos, se Teodoro eraris: se tiu-ĉi malsaĝulo tute ne estas enamiĝinta min, kaj se li eĉ ne pensas pri mi?!... (Ŝi rapide aliras al spegulo kaj atente sin ĉirkaŭrigardas). Ne, tio-ĉi ne povas esti!... Mi estas ankoraŭ tiom bela, ke mi povas frenezigi iun eĉ pli bonan kaj pli saĝan, ol Hoko! Ekzemple urbestron... Mi ja devas kredi al spegulo...

Apero 6.

Pastelo. (Enirante). Sufiĉe, sufiĉe! Vi estas tre bela!

Bulko. (Sin turnante). Ha, fratineto!... Bonan tagon!

Pastelo. (Kisante ŝin). Bonan tagon, mia belulino! Nu, kiel-do vi fartas? Kredeble ankoraŭ iun volas ĉarmi per via beleco? Ha?

Bulko. Kiun-do mi povas ĉarmi?

Pastelo. (Ruze). Ho, mia modestulino! Kiun? Ĉu vi ĝis nun neniun ĉarmis? Sed s-ro Pugno, ŝajne...

Bulko. Kio, sinjoro Pugno?

Pastelo. (Kun rideto). „Kio, sinjoro Pugno“?... Vidu kia senkulpeco!...

Bulko. (Kolere). Pri kia senkulpeco vi parolas? Kion vi volas de mi?

Pastelo. Ha, kara fratineto, ĉesu, mi petas! Forprenu de vi tiun-ĉi maskon... Ĉu mi estas blinda, aŭ tute malsaĝa? Sciu, mia kara, ke estas tre malfacile kaŝi kudrilon en sako!...

Bulko. Kion vi volas diri per tiu-ĉi frazo?

Pastelo. Vi nur ne koleru, mi petas; se vi ne volas, ke mi parolu kun vi, kiel fratino,—bone, mi ne parolos

kaj, kredo, pro tio mi ne ploros! Tamen mi ĉiam havas rajton diri, ke estas peko kaj honto kaŝi ĉion de fratino, kvazaŭ de tute fremda homo!...

Bulko. (Fiere). Mi nenion bezonas de vi kaŝi, mia estimata sinjorino.

Pastelo. Vi diras tute vere, ke vi nenion havas de mi kaŝi,—ĉar mi jam longe ĉion scias.

Bulko. (Kolerege). Kion vi scias? Nu diru: kion?...

Pastelo. Vi tion-ĉi volas? Mi diros kun plezuro: unue mi scias, ke vi estas kromvirino de tiu-ĉi sinjoro Pugno, due, ke vi baldaŭ alportos al li infanon...

Bulko. (Krias). Kiel vi kuraĝas tion-ĉi paroli?! Kiel vi kuraĝas min ofendi? Sciu, sinjorino Pastelo, ke mi estas honesta virino, kaj vi havas nenian rajton malhonorigi mian nomon!...

Pastelo. Mi povas nur konsili, ke vi ne parolu pri honesteco, ĉar vi, ŝajne, tute eĉ ne scias, kion ĝi signifas,—kaj, krom tio...

Bulko. Konservu viajn konsilojn por vi mem,—kaj... mi petas vin forlasi mian domon kaj de nun jam neniam plu min vizitadi!...

Pastelo. Tre bone!... Mi foriros, sed memoru, ho, honesta virino, ke vi ankoraŭ sin turnos al mi!... Adiaŭ!... (Ŝi rapide foriras).

Bulko. (Kolerege). Abomena ĉikanistino!...

Apero 7.

Bulko. (Sola). Ha, maljuna ĉikanistino!... Ĉion kaj ĉiam ŝi scias, ĉion volas ekscii: vi kaŝu sin kiel vi volas,—tute vane!... Kaj kial ŝi tiel interesiĝas je mi, je mia vivo? Ŝi ĉie enŝovas sian porkan vizaĝegon!... Nu, atendu, diablo,—mi vin instruos!...

17.

Hoko. Sed mi certigas vin...

S-ino Pugno. Lasu, mi petas! Per nenio vi min certigos!

Hoko. (Nedecideme). Ha, mia sinjorino... Vi ŝajne, igos min al vi rakonti tion, kion mi ne volus...

S-ino Pugno. (Vive sin turnante al li). Kion? Kion? Ĉu vi ion scias?

Hoko. Jes... Mi scias eĉ pli, ol estas necesa...

S-ino Pugno. (Kun scivoleco). Kion-do vi scias? Ra kontu!...

Hoko. (Decide). Nu, estu tiel, — mi rakontos!... Vidu, altestimata sinjorino, mi unu fojon... Mi ne povas diri, ke mi sekrete aŭskultis, — tute ne!... Vidu, mi tute okaze, — je Dio, okaze — diversaj ja okazoj estas — aŭdis interparolon de lia generala moŝto kun ..

S-ino Pugno. (Malpacience). Pri kio-do ili interparolis?

Hoko. Ili interparolis pri si... pri sia interligo... Kaj mi aŭdis, ke ili ambaŭ decidis ĉion fini...

S-ino Pugno. Kion „ĉion“? Mi vin ne komprenas.

Hoko. Tio estas... ili, kredeble, sub tiu-ĉi vorto „ĉio“ komprenis ilian... kiel diri? ilian amikecon...

S-ino Pugno. Jen kio... Nu?

Hoko. Nu... kaj jen ili disiĝis... kaj ĉio estas finita!

S-ino Pugno. Hh... „ĉio estos finita“... Kiel-do vi konfidema estas: videble ĝi estis nur intenca maskobalo!... Kredu, ke ili simple maskiĝis, intence maskiĝis.

Hoko. Pro kio-do ili tion bezonis?

S-ino Pugno. Tre simple: ili ja sciis, ke vi ilin aŭskultas, — kaj jen ili intence...

Hoko. Sed mi ja ne aŭskultis, — mi ĵuras, altestimata sinjorino, ke ne!... Ĉu mi estas kapabla je tio? Ne, ne, — tio-ĉi fariĝis tute okaze, — mia honora vorto!...

S-ino Pugno. Se eĉ okaze, — tute egale: ili ja scias, ke vi staris ĉe pordo.

Hoko. Ne, atestimata sinjorino,—mi kredigas vin, ke ili eĉ ne povis scii pri mia alestado! Mi staris tiel bone kaŝita kaj tiel mallaŭte... hm... mi ja ne intence aŭskultis...

n **S-ino Pugno.** Nu, bone, bone,—mi ne disputas!... (post kelka siento). Nur sola cirkostanco min senfine mirigas: kiel ili povas esti tiel arogantaj? Ĉiuj ĉion scias, ĉion rimarkas, kaj... ili daŭrigas...

Hoko. Ĉu vi scias, atestimata sinjorino, kion mi elpensis?

S-ino Pugno. Ne, bedaŭrinde, mi ne scias.

Hoko. Mi... mi povus edziĝi kun s-ino Bulko!

S-ino Pugno. (Eksaltinte). Kio?!... Ĉu efektive?...

sal **Hoko.** Jes, mi povus, sed... vidu, sinjorino... mi estas homo malriĉa, nenion havanta,—solajron mi ricevas tro malgrandan... Por mi estus malfacile vivi kun edzino, se mi havas tiom da materialaj rimedoj, kiom mi nun havas... Alie por vi, esceptinte por vi, mia atestimata sinjorino,—mi oferus mian liberecon kaj edziĝus...

S-ino Pugno. Nu, sufiĉe,—mi vin bone komprenas. Diru rekte kaj tute malkaŝeme, kiom vi volas ricevi por tiu-ĉi laboro?

Hoko. Vi min ofendas, mia sinjorino, mi ja tute ne pro mono volus tion-ĉi fari...

S-ino Pugno. (Malpacience). Ha, sinjoro, forlasu tiun-ĉi sensencan paroladon! Mi ja bone scias... Kiom vi volas?

Hoko. Sed sciu, atestimata sinjorino, ke... ke mi ne por mia laboro volas preni...

S-ino Pugno. Tute egale!... Kiom vi volas?

Hoko. Nu, se vi tion postulas,—mi devas obei... Mi volus preni nur mil rublojn... Tio-ĉi, ŝajne, ne estas multe?

S-ino Pugno. Mi konsentas: vi ricevos tiun-ĉi sumon tuj post via edziĝo, kun s-ino Bulko.

29.

legas). „Multestimata sinjorino!... (Oho, kiel oficiale!) Sorto mem nin helpas, (Ni rigardu, per kio ĝi helpas). Hodiaŭ estis ĉe mi Hoko... li iel eksciis pri nia disiĝo kaj, kiel mi jam antaŭdiris, pensas pri edziĝo kun vi. Vidu, sinjorino, li nenion de mi kaŝas, kaj ĉiam konfidas al mi ĉiujn siajn sekretojn de koro... Tiel same fariĝis ankaŭ nun: li venis al mi por peti konsilon. (Kia-do li estas malsaĝulo!). Mi kompreneble aprobis lian intencon kaj eĉ konsolis lin per tio, ke vi, kredeble, konsentos fariĝi lia edzino... (Tamen tiu-ĉi sinjoro Pugno estas sufiĉe granda porko!). Pri tio-ĉi mi opinias mian devon sciigi vin, kaj mi ripetas ankoraŭ unu fojon, ke estas ĝustatempe ĉion fini kaj ĉion kaŝi. Via humila servanto Teodoro Pugno“ (ŝi kaŝas leteron en poŝo kaj ekpensiĝas). Ĉu ne bone?... Oni devas ĉion fini kaj tial volu fariĝi edzino de... de... diablo scias de kiu!... Tre bone,— je Dio, tre bone!... (post kelka silento). Malnoblulo, malĉastulo vi estas, via generala moŝto!... Kaj mi, malsaĝulino, povis kredi al li... kia blindeco!... Ne, ne, mi tiel ne povas resti,—mi devas lin venĝi por lia perfideco... (rapide eksaltas de sia loko). Atendu, maljuna mensogisto! Mi montros al vi, kiu mi estas! Mi tuj aperos antaŭ vi kaj ekbatos vin, kiel tondro ĉiela!... Vi longe min memoros... (krias ĉe pordo). Marto! Marto!

Apero 11.

Marto. Pro kio vi tiel krias?... Kvazaŭ brulego!...

Bulko. Malsaĝulino vi estas!... malsaĝulino kaj nenio plu!...

Marto. Ĉu vi nur por tio min vokis? (volas iri).

Bulko. Haltu, mi diras!... Ha, kia sensenca virino!...

Marto. Kion-do vi bezonas?

Bulko. Iru kaj dungu al mi veturigiston! Nur rapide!... (ŝi iras al pordo dekstre).

Marto. Kien-do mi devas lin dungigi?

Bulko. (Haltante). Ha, kia sensenca vlrino! Mi veturos al urbestro...? Ĉu vi komprenas?

Marto. Bone, mi komprenas. (Marto kaj Bulko foriras; post kelka tempo Bulko eliras el pordo dekstra jam vestita en supra vesto).

Bulko. Ha, kiel longe ne revenas tiu-ĉi malsaĝulino!... Diablo ŝin prenu!

Marto. (Enirante). Jam estas veturigisto.

Bulko. Nu, bone, bone! (ŝi foriras).

Marto. Ha, sensaĝa virino!... Malbone vi finos!

(Kurteno).

Fino de II-a akto.

AKTO III.

Gastĉambro en domo de urbestro. Rekte de vidantoj—elira pordo; dekstre—pordo en kabineton. Maldekstre staras pianino; dekstre—kanapo; antaŭ ĝi—tapiŝo; ĉirkaŭe—mola meblo; sur muroj pendas pentraĵoj. Entute loĝejo estas lukse ornamita.

Apero 1.

(S-ino Pugno sidas ĉe pianino kaj facile tuŝas klavojn; Hoko sidas proksime de elira pordo sur rando mem de seĝo).

Hoko. Mi certigas vin, altestimata sinjorino, ke inter ili ĉio jam estas finita: lia interligo estas tute por ĉiam disŝirita!

S-ino Pugno. (Kun forto batante klavojn). Ho, ne diru, mi petas, tion, kion vi ne scias! Mi ja ne estas blinda: mi tre bone vidas, kio ĉirkaŭ mi fariĝas!

yt.

Hoko. Sed... altestimata sinjorino,—mi devas ion aĉeti por edziĝo, fari necesan veston... Tial mi volus ricevi... almenaŭ duonon da tiu-ĉi sumo nun,—nepre nun, eĉ tuj...

S-ino Pugno. (Moke). Ho, sinjoro, vi estas tre singardema homo!... Nu bone: mi tuj donos al vi kvincent rublojn, kaj kvincent—tuj post via edziĝo. Eble vi dezirus ankoraŭ ian garantion havi?

Hoko. Se vi permesas, mi tion-ĉi ne rifuzus, — ĉar... ĉar garantio entute estas bona, tiom pli en monaj aferoj... Tial, se vi, altestimata sinjorino, krom tiu-ĉi, tiel diri, antaŭdono, donus al mi ankoraŭ kambion,—mi estas tre danka kaj... jam tute trankvila!...

S-ino Pugno. (Kun moka rideto). Ho, kiel bona aferisto vi estas!... Nu, atendu malmulte,—mi tuj revenos... (ŝi foriras).

Hoko. (Sola). Nu, ŝajne, mia afero iras tre bone!... Tiamaniere mi konsentus eĉ ĉiutage edziĝadi!... Estas nur domaĝe, ke mi ne faris tion saman kun mia estimata estro... Nu, mi ankoraŭ havas tempon!... De li mi povas senfine pli multe preni, ĉar lin tio-ĉi multe pli tuŝas, ol lian edzinon. Jes, sinjoro Hoko, vi povas nur ĝoji, ĉar sorto mem estas favora al vi: post kelka tempo vi povas fariĝi tre signifa homo,—ĉar mono... mono estas ĉio! Kion, ekzemple, prezentus el si Rotŝildo, se li monon ne havus? Nenion, simplan gebreon... Kaj nun, havante monon, li estas... io... io tre signifa!... Jes!... Mi tre volus esti Rotŝildo!!... Mono, mono! Kiel multe vi signifas en vivo homa, kaj kiel sensignifa estas homo sen vi!... Vi povas esti saĝega, honesta (kvankam mi opinias, ke ĉiu tro honesta homo estas samtempe grandega malsaĝulo!),—jes... vi povas esti saĝega, virta, ĉasta,—sed sen mono vi estas nenio!... Kaj vane saĝeguloj predikas kontraŭ malestimata metalo: ne, nur en mono, sole en mono estas senco de vivo, — ĉio alia estas bagateloj!...

Apero 2.

S-ino Pugno. (Enirante). Nu, sinjoro Hoko, jen vi havas kvincent rublojn kaj jen kambio en tiu sama sumo,—sed en tiu-ĉi kambio estos dirita, ke vi ricevos monon tuj post via edziĝo kun s-ino Bulko, ne pli frue. (Donas al li monon kaj kambion).

Hoko. Mi tre dankas vin, altestimata sinjorino!... Nun vi jam povas esti certigita, ke interligo de via estimata edzo kun s-ino Bulko estas finita, ĉar ŝi post kelka tempo fariĝos mia edzino,—dank' al kio ĉiuj ĉikanoj tuj mem ĉesiĝos...

S-ino Pugno. Vi nur min ne trompu, s-ro Hoko!

Hoko. Ho, mia sinjorino, kiel malbone vi opinias pri mi!...

S-ino Pugno. Nu, mi ekvidos.

Apero 3.

Lakeo. (Enirante). Sinjorino Olgo Bulko!

S-ino Pugno. (Eksaltante). Bulko?!... Bulko venis tien-ĉi?!...

Lakeo. Jes, mia sinjorino.

S-ino Pugno. (Fiere). Diru al ŝi...

Hoko. (Rapide ŝin interrompante). Diru, ke s-ino Pugno ŝin atendas...

S-ino Pugno. (Severe). Sinjoro, kion ĝi signifas?

Hoko. Pardonu, altestimata sinjorino!... Sed... sed... akceptu ŝin, ĉar tio-ĉi estas tre feliĉa kunligo de cirkonstancoj,—sorto mem nin helpas...

S-ino Pugno. Mi vin ne komprenas!... Cetere... (flanken). Jes, jes, mi eble povos ion esplori... (al lakeo). Akceptu sinjorinon kaj petu ŝin tien-ĉi (lakeo foriras).

Hoko. Mi kore vin dankas, mia sinjorino!... (flanken). Nu, ŝajne fino proksimiĝas...

Apero 4.

S-ino Bulko. (Enirante). Ĉu mi povas vidi sinjoron urbestron?

S-ino Pugno. (Flanken). Mi penos esti aminda...

Hoko. Ha, mia estimata mastrino! Kiamaniere?... Mi salutas vin!...

Bulko. (Flanken). Li ankaŭ tie-ĉi? Kion ĝi signifas? (laŭte). Bonan tagon, sinjoro!... Mi bezonas vidi s-ron urbestron...

S-ino Pugno. (Sin levante). Mi ankaŭ, ŝajne, havas plezuron esti konata kun vi? Vi, kredeble, ne ekkonis min?

Bulko. (Konfuziĝante). Ha, jes... pardonu... mi pensis... mi efektive vin ne ekkonis, sinjorino!... Bonan tagon!

S-ino Pugno. (Etendas al ŝi manon). Ne estas mirinde: ni ja tiel longe ne sinvidis. Mi salutas vin, sinjorino!

Bulko. (Flanken). Kion ĝi signifas? mi tute nenion komprenas!

S-ino Pugno. Sidiĝu, mi petas!... Kian-do aferon vi havas al mia edzo? Aŭ ĝi estos sekreto?

Bulko. (Sidiĝante). Mi... inter ni okazis unu malkompreniĝo... kaj mi... volis...

Hoko. (Interrompante ŝin). Kredeble vi volis demandi s-ron urbestron tuŝante regulojn pri domposedantoj? Jes, jes,—al mi jam parolis s-ro urbestro... (Li palpebrumas al s-ino Bulko).

S-ino Pugno. (Flanken). Ho, kiel lerta estas tiu-ĉi Hoko!... Efektive,—ĝusta hoko!

Bulko. (Mirege rigardante Hokon). Vi diras... jes, mi volis demandi...

Hoko. (Vive). Jes, jes, mi komprenas... S-ro urbestro baldaŭ venos.

Bulko. (Flanken). Mi tute nenion komprenas! (Ĉiuj kelkan tempon silentas. En tiu-ĉi minuto eksonis sonorilo).

S-ino Pugno. Jen, ŝajne, mia edzo venis... (flanken); pri kio-do ili interparolos, interese estas scii?

Hoko. (Rapide sin levante). Kredeble, pordo estas fermita: mi malfermos... (flanken). Oni devas lin antaŭsciigi!...

S-ino Pugno. (Al Hoko). Ne maltrankviliĝu, sinjoro: pordo ne estas fermita.

Hoko. (Irante al pordo). Jen, mi rigardos... (li foriras; en daŭro de kelkaj minutoj s-inoj Pugno kaj Bulko sidas en silento).

S-ino Pugno. Kiel longe li malfermas pordon!

Bulko. Jes!... (Flanken). Kion-do mi diros al li?...

Apero 5.

S-ro Pugno. (Enirante, al s-ino Bulko). Mi salutas vin, estimata sinjorino!... Jam longe ni ne sinvidis...

Bulko. (Konfuze). Bonan tagon, s-ro urbestro!...

S-ro Pugno. Mi estas ĝoja, ke almenaŭ afero igis vin al ni veni! Vi pri domposedantoj?...

Bulko. (Tute konfuze). Jes... ekzistas ja iaj reguloj? (ŝi rigardas Hokon). Mi ne scias...

Hoko. Jes, jes,—ekzistas!

S-ino Pugno. (Flanken). Nu, ni vidos, kiu estas pli ruza! Atendu karuloj!... (laŭte—al s-ino Bulko). Pardonu, mia sinjorino,—dum vi parolas pri aferoj, mi por duono da horo foriros: mi havas ankaŭ unu aferon.

Bulko. Ha, ne ĝenu vin, mi petas, sinjorino!

S-ino Pugno. Sed mi esperas, ke vi atendos min malmulte?

Bulko. Kore vin dankas, sinjorino, sed mi tion-ĉi ne povas diri ĝuste: mi tute ne havas tempon!...

S-ino Pugno. Ne, ne! Mi tion-ĉi eĉ aŭskulti ne volas! Mi ne diros al vi adiaŭ, ĉar mi baldaŭ revenos... (forirante flanken). Atendu, karaj amikoj — mi kaptos vin tute ne atendite!... (Ŝi foriras).

S-ro Pugno. (Al Hoko). Nu, mia Hoko!... Cirkonstancoj estas tre favoraj; efiku! (Li volas foriri).

Bulko. Atendu, sinjoro, mi devas kun vi iom interparoli! (Ŝi sin levas).

S-ro Pugno. Pardonu, sinjorino, mi devas por kelkaj minutoj foriri: oni min atendas. Sed mi tuj revenos, kaj tiam mi estas tute preta por viaj servoj. (Li foriras en kabineton).

Apero 6.

Bulko. (Flanken). Sekve estos tute alia interparolo!

Hoko. (Flanken). Kiel-do mi devas pli lerte komenci?...

Bulko. Vi, kredeble, pro oficaj aferoj tien-ĉi venis?

Hoko. Jes... mi havas unu aferon...

Bulko. (Post kelka silento). Kial, s-ro Hoko, vi tiel malofte min vizitas? Vi estas mia loĝanto kaj mi vin preskaŭ neniam vidas.

Hoko. (Malgaje). Ĉar mi sentas, ke mi estas malnecesa al vi!... (flanken). Nu, ŝajne, komenco estas farita sufiĉe bone kaj lerte!..

Bulko. Kiel malnecesa? Kion vi volas diri? (flanken). Ĉu efektive eĉ tiu-ĉi malsaĝulo intencas min ofendi per siaj aludoj? (Laŭte). Kion vi volas diri, sinjoro?

Hoko. Pardonu, mi ne sufiĉe klare esprimis mian penson: mi volis diri, ke mi estis por vi malnecesa... ĝis nun...

Bulko. (Kolere). Sed kion vi volas diri, sinjoro? Kiu

donis al vi rajton fari al mi tiujn-ĉi travideblajn aludojn?!

Hoko. (Flanken). Jen, vi havas! Bona komenco!

Bulko (Kolerege). Mi petas vin, sinjoro, pli klare esprimi vian penson!... Oni devas memori, kun kiu vi interparolas!...

Hoko. (Konfuzo). Pro kio vi koleras, atestimata sinjorino? Mi... mi, ŝajne, diris al vi nenion malagrablan, — vi ne komprenis min!

Bulko. Ne, mi vin bonege komprenis!

Hoko. Mi ĵuras, sinjorino, ke vi min ne komprenis! Mi tute ne volis vin ofendi: kontraŭe, mi havis tute alian celon...

Bulko. (Moke). Kian-do, volu min sciigi?

Hoko. Vidu... Sed mi timas, ke vi ree min ekkoleros, ne komprenos!... Mi... mi... Permesu al mi... proponi al vi mian manon kaj koron!...

Bulko. (Eksaltante). Kion?! Kion vi diris?

Hoko. Mi havas honoron proponi al vi mian manon kaj koron, — tio estas — mi proponas al vi fariĝi mia edzino.

Bulko. Vi freneziĝis, sinjoro!... Ĥa-ĥa-ĥa-ĥa!!... Manon kaj koron... ĥa-ĥa-ĥa!.. ĥa-ĥa-ĥa!.... (en tiu sama tempo el kabineto sin montras kapo de urbestro; Bulko lin ne vidas. Urbestro faras energiajn signojn al Hoko).

Hoko. Pro kio-do vi tiel ridas, sinjorino? Kaj kial vi pensas, ke mi freneziĝis?

Bulko. Kompreneble, freneziĝis!... Ĥa-ĥa-ĥa!... Ĉu vi ne povis elekti pli oportunan lokon kaj tempon, por fari al mi tiun-ĉi proponon?...

Hoko. Jes... estas vere, ke tio-ĉi estas iom originala, sed... sed vi tamen konsentas fariĝi, tiel diri, mia... mia amikino de vivo, t. e. mia edzino?

Bulko. (Post kelka silento). Mi aŭdis, ke vi baldaŭ ricevos oficon de distriktestro? Ĉu ĝi estas vero?

Hoko. Jes.

Bulko. Nu... en tiu okazo mi konsentas!... Sed... kiel vi volas, ĝi estas tro ridinda!... Cetere... oni diras, ke diversaj okazoj okaze okazas!... Sekve, vi estas mia fianĉo?... Ĥa-ĥa-ĥa-ĥa!...

Hoko. (Kun rideto). Jes, mi esperas...

Bulko. Ĥa-ĥa-ĥa!... (etendas al li manon). Nu, prenu, kisu, fianĉo!...

Hoko. (Kisante ŝian manon). Kun plezuro, mia anĝelo!... (flanken). Dio, kia sensencaĵo!!...

Apero 7.

S-ro Pugno. (Rapide enirante). Brave, brave!... (al Hoko). Mi eĉ neniam supozis, ke vi scias tiel lerte kisadi virtnajn manetojn!... Sekve mi povas vin gratuli?

Bulko. (Flanken). Nun, ŝajne, jam ne estas tempo plenumi mian komencan intencon: cirkonstancoj ja tute ŝanĝiĝis!...

Hoko. Jes, via generala moŝto, — nun mi kuraĝas prezenti al vi mian estimatan mastrinon, kiel mian estontan edzinon!

S-ro Pugno. (Kun rideto). Estas tre agrable konatiĝi!

Bulko. Vi, sinjoroj, ĉiam kun viaj ŝercoj!...

S-ro Pugno. Kion-do vi volus? Ke ni ploru?... Nu, kiam estas edziĝo? Al mi ŝajnas, ke ju pli rapide, des pli bone,—ĉu ne vere?

Bulko. }
Hoko. } (Kune). Kompreneble!

S-ro Pugno. Kaj mi estos via edziga patro. Ĉu bone?

Hoko. Mi ĵus mem volis vin peti pri tio-ĉi, via generala moŝto.

Bulko. Mi ankaŭ.

S-ro Pugno. Tiom pli bone!... Sekve ni jam ĉion finis feliĉe kaj... lerte!... Nun mi benos vin, miaj infanoj! Donu manojn unu al alia kaj stariĝu genue. (Hoko kaj Bulko, ridante, stariĝas genue, kaj s-ro Pugno ilin benas).

Apero 8.

(En pordoj haltas s-inoj Pugno kaj Pastelo kaj kun mirego rigardas starantajn genue).

S-ino Pugno. Kion ĝi signifas?

Pastelo. Dio mia! Kiu-do ilin genue starigis?

S-ro Pugno. (Sin turnante). Ha, kiel ĝustatempe vi venis!... Mi havas honoron sciigi vin, ke s-ro Hoko kaj s-ino Bulko estas gefianĉoj!

Pastelo. (Kun mirego). Ĉu vere?!...

S-ro Pugno. (Flanken). Tre baldaŭ!... Mi ne pensis, ke tiu-ĉi Hoko estas tiel lerta... (laŭte). Gratulas vin!...

Pastelo. Mi ankaŭ... el tuta koro!

Hoko. (Fanfarone,—signife rigardante s-ron Pugno). Krom tio vi povas min ankoraŭ unu fojon gratuli: mi ricevas oficon de distriktestro!

S-ino Pugno. (Flanken). Tiel? Pro kio-do mi donis al li manojn?... *monon*

Pastelo. Diru al mi, gesinjoroj, ĉu ĉiam tiel estas, ke ĉiu observisto, kiu edziĝas, tiuj mem fariĝas distriktestro? (Neniu al ŝi respondas).

Kurteno.



ARTURO.

(Rakonto de V. Devjatnin).

I.

SinJORINO Anneto, kvankam sufiĉe matura en sia aĝo (ŝi havis preskaŭ 50 jarojn), tre bone ankoraŭ sin konservis, almenaŭ laŭ ŝia ekstera vido oni ne povis ŝin nomi maljunulino: la koloro de ŝia vizaĝo estis ĉiam tiel roza, la dentoj tiel blankaj kaj ebenaj, ke iafoje eĉ nevole naskiĝadis tre ofenda por ŝi suspekto. SinJORINO Anneto, laŭ la volo de la sorto, ĝis nun ankoraŭ estas fraŭlino, sed... ŝi estas jam vidvino!... Ŝi mem rakontis al mi (mi ĝis nun estas ŝia amiko), ke ŝi perdis sian junan belan edzon tuj post la edziĝo; apenaŭ la junaj geedzoj revenis el la preĝejo, ŝia edzo falis kaj mortis! Al li fariĝis kredeble disŝiro de koro, tro multe plenigita de amo. Dank' al tiu ĉi okazo la malfeliĉa sinJORINO restis vidvino, travivinte kun la edzo nur proksimume duonon da horo. De tiu tempo pasis jam tridek jaroj, la amo de sinJORINO Anneto havis jam tempon tute malvarmiĝi, sed edziniĝo entute tiom ŝin timiĝis, ke ŝi decidis senrefare jam eterne resti fraŭlino kaj eĉ ĵuris sankte plenumi tiun ĉi decidon. Sed la petolema sorto subite devigiĝis ŝin ankoraŭ unu fojon facile tuŝi la katenojn de Himeneo. Jen kio okazis.

II.

Unu fojon sinjorino Anneto veturis sur fervojo, revenante el la malgranda urbeto K. post enterigo de sia kuzo. Okupinte en la vagono tre oportunan kanapeton, ŝi volis ekdormi, dezirante almenaŭ per tiu ĉi sin liberigi de ŝin premanta ŝarĝa impresio de morto, — sed subite, rigardinte okaze la plankon, ŝi vidis ian libron, forgesitan kredeble de alirinta veturanto. Sinjorino Anneto levis ĝin kaj malfermis: tio ĉi estis franca tradukita romano sub la titolo: „Terura sekreto“. Ŝi estis tre ĝoja je tiu ĉi neatendita trovaĵo kaj komencis avide legi paĝon post paĝo. La romano estis tre interesa: en ĝi estis teruraj mortigoj kaj sekretaj malaperoj kaj malfeliĉa amo, per unu vorto, en ĝi estis ĉio, kio devas esti en ĝusta romano, — kaj entute en la romano estis tia miksaĵo, ke sinjorino Anneto nur kun granda malfacileco povis kompreni kvankam malmulte tiun ĉi mirindan produktaĵon de la genia aŭtoro. Tiu ĉi malfacila laborado de la kapo lacigis la malfeliĉan legantinon, kaj ŝi ekdormis...

Jen ŝi sonĝas, kvazaŭ ŝi estas ankoraŭ tre juna knabino. Ŝi senfine amas lin kaj li, bela, flama junulo, varmege, pasie ŝin amas. Sed la kruela patro elektis por ŝi malbeligan, maljunan, senharan baronon, kiu scias ian teruran familian sekreton de ŝia patro kaj per tio ĉi tenas lin en siaj manoj. La terura tempo proksimiĝas: jam estas difinita la tago de edziniĝo kun la barono... La patro ŝin enŝlosis en malgrandan ĉambregon kaj alstarigis al ŝi, maljunan diablistinon servantinon, kiu atente ŝin gardas kaj ne permesas al ŝi eĉ paŝon fari libere, — kaj ŝi malfeliĉa ofero de la patra krueleco kaj de la malbonega barona volupto, ne povas eĉ sciigi lin, sian amatan, pri sia terura situacio!... En malespero ŝi ŝiras siajn harojn,

sin ĵetadas en la ĉambro, kaj fine, tute freneziĝinte, ŝi saltas kun kapo malsupren el la fenestro sur la pavimon kaj... ho mirindaĵo!... ŝi enfalis en la brakojn de sia amanto! Ili flugas, flugas, flugas kun nekredebla rapideco en ia sorĉa kaleŝo al la rando de la mondo, al plej feliĉa Arkadujo... Jen jam estas proksime, al ŝi jam blovetis feliĉo... Sed subite post ili fariĝis forta bruoj. Ili rigardas kaj... ho, teruro: persekuto!... Sur nigra flugila ĉevalo rapide flugas la barono!... Minace brilas liaj verdaj okuloj, liaj haroj estas disblovitaj, liaj longaj malgrasaj manoj kun akraj kurbaj ungegoj estas etenditaj antaŭen... Lia forta ĉevalo flugas kun rapideco de sago, distranĉante kun fajfo la aeron per sia larĝa fortika brusto... Ankoraŭ unu momento, kaj la geamantoj nepre devas pereii!... La juna fraŭlino pli proksime sin alpremis al sia karulo, ĉirkaŭprenis lin, li forte, dolĉe ŝin kisis kaj... ŝi vekigis.

En la preskaŭ tute malplena vagono estis mistera duonlumo: kelkaj lanternoj estis estingitaj, kaj la ankoraŭ brulantaj estis kovritaj per mallumaj verdaj kurtenetoj, tra kiuj ili apenaŭ ĉirkaŭlumis du aŭ tri dormantajn veturantojn.

SinJORINO Anneto eksentis, ke iu delikate premas ŝian manon, kaj nur nun ŝi ekvidis starantan antaŭ ŝi sur genuoj ian nekonatan viron, kiun ŝi, mem ne komprenante per kia maniero, forte ĉirkaŭprenis per la maldekstra libera mano... Ŝi eksaltis, kvazaŭ pikita de serpanto, kaj kun teruro rigardis ĉirkaŭen: en la vagono estis tute silente.

— Kion vi volas, sinjoro?

La nekonato malrapide sin levis kaj kun petego etendis al ŝi la manojn.

— Pardonu! li murmuretis: pardonu, se mi vin nevole

ofendis... Sed vi tiel afable respondadis miajn karesojn, ke mi pensis... Ho, pardonu, pardonu min!...

Kaj li ree stariĝis sur la genuoj, kaptis ŝian manon kaj alpremis ĝin al siaj lipoj. Al sinjorino Anneto ŝajnis, ke tio ĉi estas ankoraŭ sonĝo... Fine ŝi mallaŭte liberigis de li sian manon.

— Levu vin, pro Dio! kion vi faras? ŝi diris al la nekonato: ni ja povas fariĝi objekto de atento por ĉiuj veturantoj!

Li senvorte obeis. Sinjorino Anneto iom post iom komencis trankviliĝadi, kaj vidante, ke la stranga sinjoro tute ne estas por ŝi danĝera, sed, kontraŭe, li mem timas ion, ŝi tute trankviliĝis kaj eĉ ekinteresiĝis je tiu ĉi neatendita aventuro kaj ankaŭ je la mistera nekonato, kiu silente sidis antaŭ ŝi sur la kanapeto. Sinjorino Anneto sin levis, forŝovis la kurteneton de la plej proksima lanterno kaj, dank' al ĝia lumo, ekvidis antaŭ si belan kaj eksterordinare simpatian viron en la aĝo de ĉirkaŭ 35 jaroj. Liaj densaj nigraj ondaj haroj kun intenca nezorgeco estis forĵetitaj posten kaj bone ombris la agrablan palecon de la bela maldika vizaĝo kun malgranda barbeto; la vivaj esprimaj okuloj de ia nedefinita koloro lumis de sento, kiun tuj oni ne povas kompreni,—sed tiu ĉi sento havis ian forlogantan forton... Sinjorino Anneto nun rememoris, ke ŝi sufiĉe ofte renkontadis tiun ĉi belulon sur la strato en K., — kaj sekve li estas al ŝi iom konata. Ŝi decidis ekparoli kun li.

— Pardonu, ŝi komencis, mian ne tute modestan demandon, sed mi tre volas scii, kiu vi estas. Al mi ŝajnas, ke mi vin renkontadis en K., kaj tial... tial via vizaĝo estas al mi iom konata. De kie, kien kaj pro kio vi veturas?

La nekonata ekĝemis.

— Tro malgaja kaj, la plej grava, tro longa estas la

historio, respondis li nevolonte: post duono da horo ni estos jam en K., kaj mi ne havos sufiĉe da tempo, por kontentigi vian scivolecon, — sekve oni ne devas eĉ komenci. Mi diros nur sole, ke mi estas la plej malfeliĉa homo en la tuta mondo, mi estas de ĉiuj pelata, de ĉiuj malamata kaj de neniuj amata... Ĉiujn viajn demandojn: de kie mi veturas, kien kaj pro kio, mi nur povas respondi: mi ne scias, ne scias, ne scias!... Kaj la nekonato, kaŝinte la vizaĝon per la manoj, restis en profunda silento. La koro de sinjorino Anneto tropleniĝis per kompato al tiu ĉi malfeliĉa homo: ŝi jam estis preta ekplori.

— Rakontu al mi vian malĝojon, ŝi diris kore: per tio ĉi vi eble faciligos vian animon.

La nekonato levis la kapon, kaj liaj okuloj ekbrilis.

— Ho, kiel mi estas feliĉa! li ekkriis kun profunda sento: mi aŭdas kompatajn vortojn de virino, kiun mi tiel longe kaj tiel pasie amas! kiun mi...

— Kion vi diras? interrompis lin sinjorino Anneto: rekonsciiĝu! rigardu min: ĉu oni povas enamiĝi en tielan maljunulinon?

— Mi ne diras, ke mi enamiĝis, rediris la nekonato, denove prenante ŝian manon: ne, mi jam longe ĉesis enamiĝadi, sed mi ne perdis ankoraŭ la kapablon de amo... Jes, sinjorino Anneto...

— De kie vi scias mian nomon? mirege ekkriis sinjorino Anneto: kiu vi estas?

— Vi min ne konas kaj kredeble neniam aŭdis mian nomon. Mi estas Arturo de...

— Via nomo estas Arturo?! Dio! kia stranga okazo!

Sinjorino Anneto rememoris, ke la ĉefa heroo de la romano, kiun ŝi trovis antaŭ nelonge tie ĉi en la vagono, ankaŭ estas „Arturo“. Ŝi kredis je diversaj antaŭsignoj, kaj tiu ĉi egaleco de la nomoj ŝin forte ekfrapis; ŝi vidis en ĝi ian antaŭsignon de la ĉielo mem.

— Jes, daŭrigis la nekonato, mi estas Arturo de Buler. Mi vin ekkonis preskaŭ antaŭ du jaroj (per kia maniero— mi ne diros), kaj de tiu sama tempo mi amas vin per ĉiuj fortoj de mia animo! De tiu tempo mi ĉiam serĉis rekonti vin, kaj al tiu ĉi celo mi tre ofte veturadis en la urbon K. Dank' al multaj kaŭzoj, pri kiuj mi ne kuraĝas paroli, mi ne volis konatiĝi kun vi... Sed fine mi decidis fari tiun ĉi danĝeran por mi paŝon kaj... nun mi jam tute ne bedaŭras tion ĉi, ĉar mi estas multe rekompencita!

Arturo kun fajro kisis la manon de sinjorino Anneto, kiu kun tremanta koro aŭskultis liajn flamajn parolojn.

— Mi ne volas lacigi, li daŭrigis, vian atenton per rakontado pri mia tuta malgaja vivo, — kaj tio ĉi eĉ ne estas necesa: nia okaza konateco finiĝos, kiam ni alveturos en K., kaj disiros en diversajn flankojn, por eble neniam jam nin rekonti... Post kelkaj minutoj estos jam K... Tial ne estas ĝustatempe eĉ komenci!...

— Ha, ne, pro Dio! viye rediris sinjorino Anneto: mi tiel multe partoprenas en via sorto, tiel korege vin kompatas... Mi petas vin, sinjoro, diru al mi vian malĝojon!...

En tiu sama minuto la vagonaro brue venis al la K-a stacidomo. Arturo etendis al ŝi la manon. — Adiaŭ! li diris kun tremo en la voĉo: ankoraŭ unu fojon mi petas vin: pardonu kaj ne rememoru min malbone!

Ĉu efektive nia konateco nur per tio ĉi finiĝos? kun sincera malĝojo demandis sinjorino: Anneto, retenante kaj facile premante lian manon.

— Tio ĉi dependas de vi, respondis Arturo.

— Sed kion do mi devas fari? Mi ne loĝas aparte en mia propra domo, kaj sekve mi ne povas inviti vin rekte al mi...

— Tio ĉi tute ne estas necesa, tiom pli ke mi kun la unua vagonaro veturas reen en B., kie mi loĝas. Sed se

vi deziras fari min senfine feliĉa, donu al mi vorton respondadi miajn leterojn kaj iam min viziti en mia malriĉa hejmo: B. estas ja tiel proksima!..

SinJORINO Anneto kun ^{el}prezuro plenumis lian modestan deziron,—ŝi donis al li sian adreson, prenis de li lian,— kaj ili desiĝis amike.

III.

Pasis semajno. SinJORINO Anneto preskaŭ forgesis sian vojan aventuron, kaj eĉ la vizaĝo mem de ŝia voja kolego komencis iel mallumiĝi en ŝia memoro,—kaj jen subite ŝi ricevis leteron. Ŝian koron kvazaŭ io pikis. Per manoj tremantaj de interna ekscitiĝo ŝi disŝiris la koverton kaj rigardis la subskribon; jes, ŝia antaŭsento ne trompis ŝin: la letero estis de li! Ŝi avidege komencis legi. Jen kion skribis Arturo; „Kara mia Anneto! Pardonu al mi tiun ĉi nevolan senceremoniecon, sed la amo ne scias paroli alie. Vi tiel forte deziris ekscii mian historion. Mi plenumas vian deziron, kiun mi estimas, kiel plej sanktan leĝon. Sed mi korege petas pardonon, mia anĝelo, se tiu ĉi malgaja historio vin malĝojigos. Mi devas komenci de malproksime. Mi naskiĝis en la ĉirkaŭaĵo de Moskvo en genta patra bieno. Mia patro estis tre riĉa homo, natura aristokrato, bonege edukita, sed bedaŭrinde senkarakterata. Li estis vidvo, kaj mi—lia sola filo kaj heredanto de lia tuta grandega riĉeco. Li ekiris vojaĝadi kaj prenis kun si ankaŭ min, tiam ankoraŭ dekkvinjaran knabon. Kiam ni estis en Parizo, li enamiĝis en unu belan kantistinon, edziĝis je ŝi kaj aĉetis por ŝi riĉan bienon en la ĉirkaŭaĵoj de Parizo, kie ni ankaŭ enlokiĝis. Mia vivo en tiu tempo estis neelportebla: mia duonpartino jam de la unuaj tagoj de nia kuna loĝado komencis min malami kaj baldaŭ ekscitis kontraŭ min mian patron, kiu ŝin senfine amis kaj plenumadis ĉiujn ŝiajn kapricojn. Post duono

da jaro mia patro povis jam rimarki, ke lia edzino kon-
dutis tiel same, kiel ŝi kondutis, estante ankoraŭ kantis-
tino, en li do ŝi vidis ne edzon, sed simple homon, kiu
devas ŝin provizadi: ŝi senĉese postuladis de li monon,
kiun ŝi elspezadis eksterordinare rapide, dank' al baloj
koncertoj, maskobaloj k. t. p. Ŝi preskaŭ ĉiutage men-
dadis por si ĉiam novajn ornamojn kaj ĉiusemajne devi-
gadis mian patron pagi grandegajn kalkulojn de tajlorinoj,
meblistoj, kaleŝistoj, oraĵistoj. La patro kun teruro rimar-
kis, kiel rapide malaperis lia riĉeco, sed li sin tenis,
li silentis. Fine li tute perdis la paciencon kaj decidis
serioze interparoli kun la edzino, — sed ŝi tiel bone lin
renkontis, ke li por ĉiam forlasis la deziron interparoli
kun ŝi kaj, eksilentinte tute, humiliĝis al sia sorto. Per
tia maniero lia tuta riĉeco post unu kaj duono da jaro
malaperis tute, kaj mia malfeliĉa patro finis la vivon per
memmortigo,—kaj lia edzino fariĝis kromvirino de iu ban-
kiero.— Post la morto de la patro mi, dank' al helpo de
bonaj homoj, forveturis Rusujon, kie estis ankoraŭ unu
nia gento bieno, en kiu mi enlokiĝis kaj komencis min
okupi per vilaĝa mastraĵo. Tiel pasis du jaroj, en la daŭro
de kiuj mi, tute ne sciante mastrumi, tiel malbonigis
ĉiujn miajn aferojn, ke fine mia bieno pro ŝuldoj estis
vendita per publika vendo, mi fariĝis preskaŭ almozulo,
kaj nur kun helpo de unu mia parenco ricevis servon
sur fervojo. Nun mi venis al la plej terura momento de
mia vivo!... Kiam mi havis la aĝon de dudek du jaroj,
mi edziĝis je unu bela juna fraŭlino... Ho, kiel doloras
mia malfeliĉa koro ĉe tiu ĉi ŝarĝa rememoro! Dio vidas,
kiel multe mi amis mian edzinon! Sed kredeble ne estis
al mi sorto longe ĝui tiun ĉi feliĉon... Post du monatoj
de nia eziĝo (per ĉiuj fortoj de mia animo mi malbenas
tiun ĉi teruran momenton!) mi tute okaze trovis mian ed-
zinon en la brakoj de malnobla amanto!... Ho, mia kara!

En tiu ĉi loko la plumo elfalas el miaj manoj, mi ne havas forton daŭrigi kaj mi proponas, ke vi mem alplenigu tiun ĉi teruran pentraĵon... Mi devas nur diri, ke mi forkuris de tiu ĉi malnobla virino, kvazaŭ de pesto, kaj de tiu tempo mi jam ŝin ne renkontadis, sed proksimume post tri jaroj mi tute okaze eksciis, ke ŝi estis mortigita ie en Germanujo per la mano de ŝia amanto, kiun ŝi trompis tiel same, kiel min!... Jen estas la malgaja rakonto de mia disrompita vivo. — Pardonu, mia kara! Donu al vi la potenca Dio multe da feliĉo. Varmege vin amanta via Arturo“.

Traleginte tiun ĉi leteron, sinjorino Anneto eksentis ion tian, kion ŝi mem komence ne povis kompreni. Tiu ĉi sento ne estis ordinara partopreno en la sorto de proksimulo, ĝi ne estis ankaŭ sento de kompatato al malfeliĉa homo,—ne, ĝi estis io multe pli forta: ĝi estis amo, jes, amo!... Sinjorino Anneto kontraŭ sia propra volo en la profundaĵo de la animo tion ĉi konfesis. Ŝi decidis tuj respondi la leteron de Arturo, respondi en tia sama senco, kaj sendi al li pro signo de sia amo antikvan diamantan ringon, kiun ŝi ricevis, kiel heredon, ankoraŭ de sia avino. Jen ŝi en tiu sama tago vespere sin enŝlosis en sia ĉambro kaj tute plenskribis du grandajn foliojn da poŝta papero. Kiel Arturo, nur pli detale, ŝi en la komenco priskribis sian tutan vivon per tiel fortaj vortoj, ke eĉ ŝi mem ekploris, tralegante la produkton de sia libera fantazio,—kaj poste jam ŝi alpaŝis al vasta klarigo de sia amo, kiun ŝi esprimis senfine pli bone kaj elokvente, ol Arturo. La duan tagon la sigelita letero kaj la atente ĉirkaŭkudrita multekosta sendaĵo estis forportitaj en la poŝtan oficejon,—kaj post tri aŭ kvar tagoj matene ŝi ricevis jam de Arturo respondon: la tuta letero de la komenco ĝis la fino estis plenigita de signoj de ekkrio, de punktaroj, de signoj de demando kaj ekkrio kune kaj

simple de demandoj,—sed ordinaraj punktoj kaj komoj preskaŭ tute forestis. Li petegis sinjorinon Anneton alveturi al li en B-n, por „per sia apero ĉirkaŭlumigi kaj sanktigi la malluman neston de malfeliĉa ermito, kaj doni al li la eblon vidi sian diinon“... Traleginte tiun ĉi leteron, ŝi decidis la sekvantan tagon kun la matena vagonaro veturi en B-n, kaj per telegramo ŝi sciigis pri tio Arturon, por ke li povu ŝin renkonti.

Suferante de senpacienco, ŝi pasigis la tagon kaj la sekvantan nokton, kaj matene frue ŝi alveturis al la stacidomo, kiam ankoraŭ iris nenia vagonaro: timante malfrui, ŝi atendis du horojn la tempon de forveturo,—kaj enirinte fine en la vagonon, ŝi sidis kvazaŭ sur pingloj, ĉiuminute elrigardadis tra la fenestro kaj malbenadis la neelporteble malrapidan, laŭ ŝia opinio, iradon de la vagonaro kaj la maŝiniston kaj la konduktoron kaj entute ĉiujn servantojn de fervojo, forgesinte en sia malpacienco, ke ŝia Arturo ankaŭ servas sur fervojo. Fine la vagonaro haltis, kaj tra la malfermitaj fenestroj de la vagono ŝi ekaŭdis la longe atendatan vokon de la konduktoro: „stacio B., la vagonaro staras dekkvin minutojn!“ Kun eksterordinara viveco, kiun eble envious eĉ dekkvinjara knabino, ŝi elsaltis el la vagono,—kaj ŝi tuj ekvidis Arturon, kiu ankaŭ ŝin rimarkis kaj jam rapidis al ŝi renkonte. Li ŝin ĉirkaŭprenis kaj karese kisis.

— Ho, mia kara, fine vi alveturis! li ekkriis ĝoje. Sinjorino Anneto de ekscito ne povis eĉ paroli. Ŝi aŭtomate sin apogis sur la brakon de Arturo, kaj ili eliris sur la veturilejon. Arturo zorge ŝin sidigis en malnovan disbatitan veturigistan kaleŝon, li mem sidiĝis kaj delikate ĉirkaŭprenis ŝian dikan rondan talion. Sinjorino Anneto sentis kapturton de ravo. La maljuna ĉevalo uzis ĉiujn siajn fortojn, por kontentigi sian tro postulantan mastron, kiu ĉiuminute batadis ĝiajn malgrasajn flankojn,—ĝi svinga-

dis la voston, spirblovadis kaj, balancante la kapon, vane penis kuri pli rapide. La kaleŝo kun laŭta krakado ruliĝadis sur la malbona pavimo kaj fine, laŭ la montro de Arturo, haltis apud la pordego de malnova ligna dometo. Arturo helpis al sinjorino Anneto elrampi el la kaleŝo kaj kondukis ŝin tra malpura malgranda korteto, plenigita per iaj bareloj, al flankodomo, klarigante al ŝi, ke la ĉefan parton de la domo oni en tiuj tagoj komencos rebonigi kaj ke, dank' al tiu ĉi cirkontanco, li devas dume „iel“ lokiĝi en flankaĵo.

— Por mi, diris Arturo, kiel por fraŭlo, estas tute egale, kie ajn mi loĝas,—vi do min ne mallaŭdos. Ili aliris al la pordo, kiu estis fermita. Arturo ekfrapis. La pordon malfermis ia stranga ekzistaĵo — viro aŭ virino, tre malfacile estis ekkoni—malpurigita, ĉifona. Li trairis malbonodoran kuirejon kaj eniris en negrandan malaltan ĉambreton kun deŝiritaj tapetoj kaj kun ne blankigitaj fornoj; tiu ĉi ĉambreto prezentis kredeble la gastoĉambron, ĉar apud la muro inter la fenestroj staris kanapo, kovrita per nigra senŝeligita vakstolo, antaŭ la kanapo estis ronda tablo kaj apud ĝi de unu flanko seĝo tute ligna, de la dua flanko—seĝo kun leda kuseno ankoraŭ unu seĝo, en kiu mankis unu piedo, staris apud la muro en angulo. Krom tiuj ĉi en la tuta ĉambro estis nenia meblo. Sinjorino Anneto kun mirego rigardis ĉirkaŭen.

— Vi ne atendis vidi min en tia malriĉegeco? demandis Arturo.

— Malriĉeco ne estas malvirto, respondis Anneto.

— Jes, sed ĝi estas pli malbona, ol malvirto, kun ĝemo diris Arturo: almenaŭ mi plivolus esti riĉa. En la nuna materiala tempo riĉeco estas unu el la plej necesaj kondiĉoj de feliĉo, ĉar nur ĝi donas sendependan situacion sen kiu tute ne estas ebla vera feliĉo.

Sinjorino Anneto singardeme sidiĝis sur la kanapon

kaj Arturo eliris, por ordoni tagmanĝon. Post kelkaj minutoj li revenis kaj sidiĝis apud sinjorino. Anneto. Ŝi karese prenis lian manon kaj diris kun sincera partopreno:

— Mi bone prezentas al mi, kiel malfacile estis por vi, mia karulo, post tiu lukso, al kiu vi alkutimis de infaneco, humiliĝi al via nuna sorto!...

— Jes mia amikino, kun profunda ĝemo respondis Arturo: komence estis tre malfacile, sed poste nenio... mi alkutimis. Homo estas tia ekzistaĵo, ke ŝajne ekzistas nenio, al kio li ne povus alkutimi: mi mem tion ĉi spertis. Nun mi tiel kunviviĝis kun mia situacio, ke mia tuta pasinta vivo, al mi ŝajnas, estis nur ia mirinda sonĝaĵo, sendita al mi de iu sorĉisto.

— Kaj ĉu efektive vi neniam bedaŭris tiun ĉi sonĝaĵon? Kaj la riĉegeco, kiun posedis via patro, ĉu efektive vi eĉ ĝin ne bedaŭris?

— Antaŭe mi neniam pensis pri riĉeco, ĉar ĝi ne estis al mi necesa. Sed nun... nun estas alia afero...

— Kial do nun estas alia afero?

— Arturo pasie ĉirkaŭprenis sinjorinon Anneton kaj komencis senfine ŝin kisi.

— Nun, ekkriis li kun fajro, nun mi havas celon en la vivo, celon, kiun mi povas atingi nur ekriĉiĝinte, — tial mi nepre devas riĉiĝi, nepre, nepre!...

— Ho, mia kara, rediris sinjorino Anneto, karesante lin: per honesta vivo estas tre malfacile riĉiĝi.

— Sed mi volas kaj esperas per honesta vivo tion ĉi atingi.

— Ne, mia amiko, tion ĉi vi ne povos fari.

— Kaj mi pensas, ke mi povos, almenaŭ la espero min ne forlasas.

— Kion do vi volas entrepreni? demandis sinjorino Anneto multe ekinteresite.

— Mi eĉ jam entreprenis. Kaj se mi havus kvankam malmulte pli bonajn monajn rimedojn, mia entrepreno sendube havus plenan sukceson.

— Sed kia do estas tiu ĉi entrepreno.

— Vidu, mia kara, komencis Arturo: kiel vi jam scias, mi havis tre bonan bienon, kiu estis vendita pro ŝuldoj. Tiun ĉi bienon aĉetis unu mia malproksima parenco, kiu, kiel mi antaŭ nelonge eksciis, pruntis de mia patro kvindek mil rublojn laŭ kambioj. Tiujn ĉi kambiojn mia patro, ankoraŭ antaŭ sia forveturo Parizon, sendis por enkasigo al la Moskva Granda Juĝejo, kiu decidis, ke tiu ĉi enkasigo estis komencita tute regule. Sed mia parenco petis mian patron, ke li permesu al li pagi tiun ĉi ŝuldon post tri jaroj. La patro plenumis lian peton; poste li baldaŭ forveturis el Rusujo kaj kredeble forgesis tiun ĉi ŝuldon: almenaŭ al mi li nenion parolis pri ĝi. Mi eksciis pri tio ĉi tute okaze: iu mia bondeziranto sciigis min per anonima letero, ke tiu ĉi afero ĝis nun ankoraŭ troviĝas en la Moskva Juĝejo. Kaj jen mi decidis relevi tiun ĉi aferon. Sed jam ĉe la unuaj paŝoj mi renkontis preskaŭ nevenkeblan baron: mi devas dungi bonan advokaton kaj mi tute ne havas monon... Mi volis prunti la necesan sumon, sed al mi oni rifuzis, kaj nun mi estas en tia situacio....

Arturo ne finis sian penson, ĉar lin interrompis sinjorino Anneto, fajre lin ekkisinte.

— Karulo mia, ŝi diris: plenumu mian unuan peton!

— Ho, jam antaŭe mi donas mian vorton de honoro! rapide respondis Arturo: por vi mi estas preta ĉion fari,— nur ordonu!...

— Prenu de mi la necesan sumon da mono!... Mi ne estas riĉa, sed mi ĝoje, kun plezurego helpos al vi kvankam malmulte... kiom vi bezonas?

Arturo ne respondis. Li videble ne atendis tian peton;

sed, antaŭe doninte vorton, li ŝajne ne sciis, kion li devas respondi.

— Ne, mi bona kara, li diris fine: mi ne povas, mi ne havas la rajton preni de vi monon... Vi postulas ion neeblan...

— Sed via vorto?

— Pardonu, mia amiko, mi donis ĝin en rapideco, mi eĉ ne povis pensi, ke vi min petos pri tio ĉi... Ne, ne, mi ne povas, tute ne povas!...

— Arturo, amata mia, mia karulo, petegis sinjorino Anneto: se vi min efektive amas, vi ne rifuzos al mi entiaj bagateloj. Mi ja ne donacas al vi tiun ĉi monon, mi ĝin pruntas. Ĉu estas al vi pli agrable kuradi al fremdaj homoj, de kiuj vi facile povas ricevi rifuzon? Kaj fine — ĉu povas esti inter ni iaj kalkuloj?! La afero, kiun vi entreprenas, estas ja por mi tiel same interesa kaj grava, kiel ankaŭ por vi mem, — tiu ĉi afero estas ja nia komuna... Karulo mia, diru kiom vi bezonas?

Arturo ankoraŭ ŝanĉeliĝis, sed post kelka tempo, cedante al ŝiaj admonoj kaj petegoj, li diris, ke li bezonas mil rublojn. Sinjorino Anneto kvankam ne atendis aŭdi pri tia tre granda por ŝi sumo, tamen, vidante, ke ŝia Arturo sendube gajnos la aferon, ŝi tute ne domaĝis la monon, — kontraŭe, ŝi estis eĉ ĝoja, ke ŝi povas helpi al Arturo, kiun ŝi havis jam tempon senfine ekami. La tuta tago pasis en viva gaja parolado pri la estonteco, — sed venis la vespero, kaj sinjorino Anneto forveturis en K-n.

En tiu sama semajno Arturo ricevis per la poŝto mil rublojn, kaj de ĝojo li eĉ iom pli, ol ordinare, diboĉis en unu el la B-aj restoracioj kun siaj bonaj kolegoj.

V.

Pasis monato. Arturo nenion skribis. Sinjorino Anneto tute ne provis kompreni la kaŭzon de tiel longedaŭra silento kaj forte maltrankviliĝis. Fine Arturo skribis al ŝi longegan leteron, en kiu li dankis por la sendita mono, kun kies helpo lia afero rapide ekiris antaŭen, kaj diris, ke nun li jam estas tute konvinkita pri plena sukceso; poste li petis pardoni lian longan silenton, kiu okazis pro tiu kaŭzo, ke li devis persone veturi Moskvon kaj ne havis eĉ unu minuton liberan; poste li promesis post unu monato alveturi en K-n, por kunigi eterne sian sorton kun la sorto de la amata virino. En la fino de la letero li skribis, ke li jam elspezis la tutan monon, kiun li havis, kaj petis sian „belan anĝelon“ alsendi al li ankoraŭ mil rublojn, por ke li povu prepari diversan necesajon por la edziĝo.—Sinjorino Anneto estis tre kontenta, ke ŝia honesta amiko estas tiel senceremonia rilate ŝin, kaj tuj sendis al li la deziritan sumon da mono, skribinte kune kun tio ĉi plej aman, plej karesan leteron, —kaj ŝi mem solene anoncis al ĉiuj siaj parencoj kaj konatoj, ke ŝi jam estas fianĉino. Ĉiuj ŝin gratulis, ĉiuj tre ekinteresiĝis kaj demandis ŝin, kiu estas ŝia fianĉo, kie ŝi konatiĝis kun li, kie li loĝas k. t. p. Ĉiujn tiujn ĉi demandojn sinjorino Anneto respondis, ke tio ĉi estas ŝia sekreto, kaj nur kontente ridetis. Post kelkaj tagoj la feliĉa, gaja sinjorino Anneto komencis pretiĝadi al la edziniĝo. Ŝi kuradis de unu magazeno al alia, ŝi aĉetadis ŝtofon por vestoj, tolon; ŝi mendis edziĝofestan veston, aĉetis edziĝofestajn kandelojn. Post du semajnoj ŝi jam ĉion pretigis, kaj kun senfina malpacienco komencis atendi sian fianĉon. Sed la stranga fianĉo denove nenion skribis. Sinjorino Anneto en la komenco vidis en tio ĉi nenian signifon, pensante, ke li estas nun okupita. Sed pasis

ankoraŭ unu monato, pasis dua — sinjorino Anneto skribis al li leteron post letero, li nenion respondis. Ŝi jam forte maltrankviliĝis. En ŝia imago sin prezentis plej teruraj pentraĵoj: jen ŝi vidis, ke ŝia Arturo estas malsana — eble eĉ mortas, kaj apud li neniu alestas; jen ŝi pensis, ke li perfidis al ŝi kaj ekamis alian virinon. Ŝi per ĉiuj fortoj penis forpeli de si tiujn ĉi mallumajn pensojn, kaj ĉiam konsolis sin per tio, ke Arturo kredeble en la klopodoj ne havas tempon, por skribi al ŝi, aŭ eble li denove forveturis Moskvon. Tiel en senfrukta turmenta atendado pasis ankoraŭ du monatoj, en la dauro de kiuj la malfeliĉa fianĉino ne havis eĉ unu minuton trankvilan. Fine, tute perdinte la paciencon, ŝi mem forveturis en B-n.—Alveturinte tien, ŝi venis al la konata dometo. Kia do estis ŝia mirego, kiam ŝi ekvidis, ke la fenestroj en tiu ĉi dometo estis tute albatitaj per tabuloj kaj sur la pordo estis malgranda tabuleto, sur kiu per grandaj literoj estis skribita: „tiu ĉi domo estas vendata“. Ŝi staris senmove kaj eble jam centan fojon legis tiun ĉi mallongan anoncon. Subite ŝi ekaŭdis ies fortan malagrablan voĉon kun hebrea akcento:

— Eble vi volas aĉeti tiun ĉi dometon? Bone, tre bone, la dometo estas inda, ke vi ĝin aĉetu.

Sinjorino Anneto ekrigardis returnen. Antaŭ ŝi staris ia hebreo, li ridetis kaj pinĉis sian akran barbeton.—Ĉu iu loĝas en la flankoparto? ŝi demandis la hebreon.

— Ne, nun tie loĝas nur la gardisto, sed antaŭ du aŭ tri monatoj tie loĝis unu sinjoro...

— Kie do estas nun tiu ĉi sinjoro? kun viva malpacienco interrompis lin sinjorino Anneto: kien li forveturis?...

— Fi! malestime diris la hebreo: Sinjoro!... Li eĉ ne estas sinjoro, sed fripono, ŝtelisto! Dio lin malbenitan forbatu!...

SinJORINO Anneto ne kredis al siaj propraj oreloj. Ŝi staris, kvazaŭ frapita de tondro. Ne! ne povas esti!... Ŝia Arturo... Dio, Dio!... Ŝi volis kredi, ke la hebreo parolas pri iu alia.

— Ĉu vi povas al mi priskribi lian eksterajon?

— Eksterajon? Malbonan eksterajon li havas, respondis la hebreo, kaj li komencis plej detale pentri la portreton de la fripono kaj ŝtelisto, en kiu sinJORINO Anneto tuj ekkonis sian Arturon!...

La hebreo rakontis al ŝi, ke Arturon arestis la polico, ke li estis du aŭ tri semajnojn en la malliberejo, el kiu li lerte forkuris kaj malaperis, oni ne scias kien.

En tiu sama tago vespere sinJORINO Anneto, malgaja, ofendita, kun dispremita koro, revenis en K-n. Ŝi multe kaj longe suferis: en la daŭro de kelkaj monatoj ŝi preskaŭ tute ne eliradis el sia ĉambro, malbenante la sorton, kiu tiel kruele mokis ŝian amon, kaj bedaŭrante sian senrevene perditan manon.

* * *

Pasis du jaroj. SinJORINO Anneto tre ŝanĝiĝis: ŝi fariĝis pli maljuna, ŝia vizaĝo flaviĝis, kaj sur ĝi aperis multaj maljunulaj sulkoj; en la buŝo mankis multaj dentoj; ŝi ĝibiĝis; ŝia kapo kaj manoj ĉiam tremadis, la okuloj malfortiĝis. Du malgrandaj ĉambraj hundetoj fariĝis la escepta objekto de ŝia amo kaj aldoniteco. Ĉiutage post la tagmanĝo ŝi kondukadis siajn amatajn bestojn promenadi.

Unu fojon ŝi, promenante, renkontis okaze amason da arestitoj, enforĝitaj per katenoj kaj ĉirkaŭitaj de forta grandanombra gardo. Vidante en tiu ĉi renkonto malbonan signon, sinJORINO Anneto volis jam reiri, kaj subite el la amaso da arestitoj ŝi ekaŭdis konatan mokan

voĉon:—Kiel vi fartas, sinjorino Anneto? Jam longe mi vin ne vidis. Kiam do estos nia edziĝo? Ŝi ekrigardis kaj kun plej granda teruro ekvidis Arturon!...

Sin mem ne komprenante de tumulto, ŝi alkuris hejmen, kaj de tiu tempo ŝi jam por ĉiam ĉesis promeni, plivolante restadi dome kaj amuziĝadi kun siaj kvarpiedaj amikoj.



LUDILO DE SORTO.

(Rakonto en versoj).

1.

Ivan' ankoraŭ knabo estis,
 Kaj li jam tute sola restis:
 Formortis unu post alia
 Kaj patro, kaj patrino lia!
 Kaj prenis lin al si najbaro,
 Loĝanta sole en arbaro,
 En kiu estis li gardisto.
 Li ankaŭ estis la botisto,
 Kaj pensis, ke al li Ivano
 Helpanta estos dekstra mano.
 Kaj tiel pensis sen eraro
 Pri nia bona knab' najbaro:
 Ivano estis diligenta
 Kaj al laboro tre atenta;
 Tre baldaŭ ĉion li komprenis
 Kaj kun botisto li ellernis
 Metion botan tre sukcese
 Kaj tre rapide, tre progrese.
 Botisto bona amis knabon,
 Kaj knabo ankaŭ sentis amon
 Al lin preninta bona homo
 Kaj al malgranda lia domo.

2.

Jen pasas preskaŭ deka jaro
Dum loĝas knabo ĉe najbaro.
Li estas tute jam junulo,
Belulo ĝusta kaj bravulo,—
Jam knabinoj lin rigardas
Kaj liajn manojn tre sin gardos...
Botisto volis lin edzigi,
Por liajn manojn ekkunligi,—
Sed li ne sciis, ke Ivano
Por si ĉe unu vilaĝano
Jam trovis bonan fianĉinon,
Knabinon Marton—belulinon.
Sed ĉarma Marto, krom beleco
Kaj tre aminda virineco,
Nenian havon posedadis:
Malriĉa ĉiam ŝi restadis.
Botisto, tion eksciinte
Kaj ĉion bone pripensinte,
Ivanon kun fervor' admonis
Forlasi Marton; li proponis
Anstataŭ ŝi al li knabinon,
Pli bonan, riĉan fianĉinon.
Ivano—do obstina estis:
Li kun deziro sia restis,
Kaj nek petego, nek admono,
Nek atendata multa mono
De Marto povis lin deŝiri
Kaj al knabino riĉa tiri,—
Kaj li edziĝis...

3.

Tre baldaŭ unu jaro pasis,—
 Feliĉ' Ivanon ne forlasis:
 Li kun edzino bone vivis,
 Kaj multaj eĉ je li inviis.
 Botisto estis tre kontenta,
 Ke lia knabo diligenta
 Feliĉon trovis. Li kun ĝojo
 Al si akceptis ilin; vojo
 De vivo tera, ŝajne, estis
 Tre rekta, kaj por ĝi malestis
 Nenio. Marto kaj Ivano
 Kun maljunulo—vilaĝano
 Vivadis bone, en konsento,
 En amo, en ambaŭkontento.
 Sed jaroj fluis (mondo nia
 Malbona, peka kaj malpia,
 Malmulte havas da bonaĵoj,—
 Pli multe da abomenaĵoj!),—
 Kaj al geedzoj niaj junaj
 Malofte jam radioj sunaj
 Komencis lumi: iafoje
 Jam ili devis tre malgaje
 Pasigi vivon, kaj sincerajn
 Traverŝi larĉojn ŝarĝajn terajn!...
 Post kelka temp' botisto mortis.
 Feliĉon kvazaŭ li forportis
 Kun ŝi,—ĉar baldaŭ jam de ĉie
 Mizeroj venis, kaj nenie
 Vidata estis ia ĝojo
 Entute sur ilia vojo:
 Ivan' subite malsaniĝis,

185

Post tio Marto gravediĝis;
 Malbonrikolto ankaŭ iĝis
 En tuta kampo... Estonteco
 Rigardis kun malamikeco...
 Ivan' komencis ekpensigi,
 Per kio povus li fariĝi
 Pli riĉa, pli feliĉa?...

4.

Marto

Ankoraŭ en malbona farto
 Troviĝis,—sed Ivano nia
 Fortika en decido sia,
 Je tio-ĉi atenton metis
 Malmulte, kvankam Marto petis
 Li kore: „ho, atendu finon!“
 Eĉ ne aŭskultis li edzinon:
 Al ŝi li dungis servantinon,
 Mestrajon tutan li prodonis,
 En farmon sian teron donis,
 Provizis por domanoj panon,
 Kaj restan manon li en manon
 Al Marto donis. Kaj farinte
 Por domo ĉion, preparinte
 Por si mem dikan nur bastonon,
 Li prenis tre malgrandan monon,
 Adiaŭ al edzino diris
 Kaj ĉefan urbon li ekiris:
 „En urbo mi pri mono penos,
 Kaj baldaŭ pasten, hejmen venos!“
 Kaj li foriris... Morto restis

Kun servantino
 honge restis
 Ivan' en urbo,—tutan jaron,—
 Senfine sian li arbaron
 Revenis gaja kaj feliĉa,
 Vestita bone kaj tre riĉa...
 Kaj hejme ĝojo lin atendis,
 Ĉar en foresto lia sendis
 Al marto Dio infaneton:
 Tre sanan, belan knabineton.
 Ivano, ŝajne, reviviĝis:
 Suferoj liaj jam finiĝis,
 Kaj ree staras li kun ĝojo
 Sur rekta, sur feliĉa vojo.

 5.

Dimanĉo. Vintro. En aero—
 Facila frosto de vespero...
 Knabinaj junaj kaj knabetoj
 Kun freŝaj, rozaj vizaĝetoj,
 En strato kuras kaj petolas;
 Kun grava vid' interparolas
 Apud drinkejo vilaĝanoj
 Pri bonrikolto, pri domanoj...
 Jen al maljuna vilaĝano
 Aliros iu... Ĉu Ivano
 Ĉi tio estas? Dio mia!
 Ŝanĝiĝis kiel vido lia!
 Li preskaŭ tuta ekgriziĝis
 Kaj maljunulo jam fariĝis,—
 Kaj tio-ĉi—en tridek jaroj!...

Jen diras unu el najbaroj,
 Turnante sin al homo juna:
 „Vi estas tute jam maljuna
 Per vido,—tamen via aĝo
 Sciata estas al vilaĝo.
 Ne ĉesas ni je tio miri,
 Kaj vi al ni ne volas diri,
 Pro kio tio-ĉi fariĝis
 Kun vi, pro kio ekgriziĝis
 Vi tiel frue? Tridek jaroj
 Ne estas aĝo maljunula“...
 Kaj petas ĉiuj lin najbaroj:
 „Malkovru sin, melfeliĉulo!“
 Ivan per mano svingis. „Kiam
 Mi mortos, diris li, nur tiam
 Sciata estos tuta vero.
 Sed dum ankoraŭ peka tero
 Portadas min,—pri mia sorto
 Nenion eĉ per unu vorto
 Al vi aludos mi... Nur tiam,
 Formortos kiam mi, nur tiam“...
 Kaj li foriris de najbaro
 Kaj ekrapidis al arbaro,
 En kiu loĝis.—Vilaĝanoj
 Ankoraŭ longe pri domanoj,
 Pri bonrikolt' interparolis,
 Kaj longe kuris kaj petolis
 En strat' knabinoj kaj knabetoj
 Kun freŝaj, rozaj vizaĝetoj.

Mateno frua. Ne suriris
Ankoraŭ suno; dense iris
Brilanta neĝo; altaj pinoj,
Kovritaj kvazaŭ per muslinoj,
Sin premis unu al alia,
Penante en amaso sia
De forta frosto ekvarmiĝi...
Komencis lume jam fariĝi,—
Jen, reĝo de arkaj' ĉielo,
Eliras gaje suno bela,
Kaj, ekvidante venon reĝan,
Forpelas vento nubon neĝan.
Pli varme en aer' fariĝis,
Kaj ĉio viva maldormiĝis:
Malalte falas fum' el tuboj
Per molaj nigr-lanugaj nuboj,
Kaj ĉie komenciĝas sana
Natura vivo vilaĝana...
En unu nur dometo estas
Mallaŭte tute kaj forestas
De vivo signoj: du bovinoj
En korto blekas, kaj korvinoj,
Flugante super domo, krias.
Ankoraŭ dum neniŭ scias
Pri tio, kio ĝus fariĝis
En domo tiu-ĉi—sciiĝis
Pri ĝi nur altaj verdaj pinoj,
Ĝin ĉirkaŭantaj kaj korvinoj...
Jen al dometo de Ivano
Aliras unu vilaĝano.
Jen proksimiĝis li al pordo,

Li ĝin malfermis,—kaj en korto
 Neniun vidas. Li transiris
 Tra tuta korto kaj aliris
 Al domo mem; li ringoⁿtuŝis
 De pordo, ĝin malforte puŝis
 Kaj tuj malfermis; li eniris
 Ĉambreton mem, kaj tre ekmiris:
 Neniu estis en ĉambreto,
 Krom nur dormanta infaneto.
 Denove iras li en korton,—
 Kaj ĉie sentas kvazaŭ morton...
 Al li terur' subite venis,
 Kaj venki ĝin li vane penis...
 Gemastrojn li nenie trovis,
 Kaj tial timon li ne povis
 Forigi. Tamen li decidis:
 „Ankoraŭ mi ne ĉion vidis“!...
 Jen korton li ĉirkaŭiradi
 Komencis kaj enrigardi
 Konstruojn ĉiujn, kaj... Ho, Dio!
 Subite vidas li... ho, kio
 En stalo pendas?!... Alforĝita
 Al lok', li vidas: sufokita
 Per ŝnuro... Kiu-do?... Ivano!...
 Kun kri' forkuris vilaĝano,
 Ne rimarkinte eĉ, ke iu
 Sub mur' en stalo kuŝas tiu...

Mi punkton volis jam starigi—
 Rakonton fini,—sed daŭrigi
 Mi iom devas, por klarigi

Almenaŭ, kiel blinda sorto,
 En sia amuziĝ' al morto
 Ivanon nian ĵus alportis.
 Mi al legantoj jam raportis,
 Ke en pasinta jaro estis
 Ivan' en urbo, tie restis
 Sufiĉe longe: tutan jaron, —
 Kaj poste sian li arbaron
 Revenis gaja kaj feliĉa,
 Vestita bone kaj tre riĉa.
 Ni devas tie-ĉi atendi
 Malmulte kaj sin reen sendi.

* * *

Kaj jen Ivan' en urbo granda
 Al komercisto alilanda
 Sin dungis, kiel laboristo.
 Tre riĉa estis komercisto
 Kaj bone pagis al Ivano
 Por lia servo. Vilaĝano
 Feliĉa estis kaj kontenta
 Kaj en laboro diligenta.
 Jam ĉio, ŝajne, bone iris
 Kaj jam al si Ivano diris,
 Ke nun li baldaŭ plibonigos
 Aferojn siajn kaj forigos
 Malbonon tutan kaj mizeron,
 Ricevos reen sian teron...
 Li revis tiel!... Sed kapabla
 Kun homo estas fort' diabla
 En vivo fari preskaŭ ĉion!...
 Ivan' per sperto provis tion...

8

Malluma nokto. Da nubegoj
Teruraj en ĉiel' multegoj
Traflugas brue kaj minace!...
Sur tero ĉio dormas pace...
En domo nur de komercisto
Ne dormas lia laboristo.
Li kuŝas longe, ne dormante,
Pri sia viv' konsiderante,—
Kaj pensas li: „maljusta sorto!
Pro kio via granda forto
Ne tut' egale helpas ĉiujn?
Ho, kial vi preferas tiujn,
Al kiuj jam sen tio estas
Tro multe, kaj nenio restas
En mondo por deziro,—ĉion
Ja havas ili: multan monon,
Kaj sanon, kaj diversan bonon?
Kaj kial devas malriĉuloj
Labori ŝarĝe por riĉuloj,
Nenion preskaŭ ricevante
Kaj nur senfine suferante?“
Ivano levis sin de lito,
Kovrita per malvarma ŝvito...
Kaj fajron ne ekbruliginte,
Kun si hakilon nur preninte,
Kun ĝi al riĉa komercisto
Mallaŭte iras laboristo...
Jen li aliras al dormejo,
Aŭskultas: estas en loĝejo
Mallaŭte, eĉ nenia sono
Aŭdata estas... „Tie mono“!...
Ivano pensas... Singardeme

Li pordon puŝis kaj timeme
 Dormejon li eniris... „Tie
 Ĉi, en skribtablo, aŭ nenie“...
 Sur piedfingroj li aliris
 Al skribotablo,—kaj ekmiris,
 Ekĝojis: tute malfermita
 Ĝi estis!... Forte ekfrapita
 Per tio-ĉi, Ivan rapidas
 Eltrovi monon... Jen li vidas,
 Ekbruliginte alumeton
 Kaj priluminte la kesteton,
 Multegon grandan da monaro!
 Per manoj, kiel ĉe avaro
 Tremantaj, li ĝin prenas, prenas
 Pli multe preni ĉiam penas...

9

. . . . „Vi kion faras, malnoblulo?!“
 Subite diris riĉegulo,
 De song' rapide vekigante
 Kaj tuj el lito sin levante...
 Ivano tremas, kaj rapidas
 Post tablo kaŝi sin... Li vidas
 Ke komercisto, sin levinte
 Kaj la kandelon bruliginte,
 Pantoflojn vestis, kaj aliras...
 „Forkuri oni devas!“ diras
 En si Ivano,—sed... ho, Dio!
 Ne estas tute ebla tio!...
 Ivan' de timo estas pala,
 Kaj pensas: „estas tut' egala,—
 Ĝi estu, kiel devas esti,

Sed tiel mi ne povas resti"!...
 Jen mastro apud tablo haltis...
 Ivano, kvazaŭ tigro, saltis,
 Eksvingis kun terura forto
 Li per hakilo... kaj sen vorto
 Ekfalas riĉa komercisto...
 Tre lerta estis laboristo:
 Li hakis kapon po duono...
 Kaj jen li kun ŝtelita mono
 Rapidas por; li kun esprimo
 De granda timo, kun animo,
 Per krim' duobla priŝargita,
 Kaj preskaŭ tute frenezita
 Kuregas for de malvivulo,
 De mortigita riĉegulo...

.....


10.

Li preskaŭ tutan nokton paŝis,
 Kaj malproksime jam forlasis
 Li tiun malbenitan domon,
 En kiu perdis bonan nomon.
 Jen tute jam en sendanĝero
 Ivano estas. Kun sincero
 Li pentas jam en sia krimo,
 Kaj pensas kun grandega timo
 Pri estonteco, pri domanoj,
 Pri siaj somevilaĝanoj...
 Kaj hejmen venis kun makulo
 Sur konscienc' Ivan' krimulo -
 Al Marto ĉion li rakontis, —
 Kaj ŝi malgaje ĝin renkontis,

Esprimi-do nenion volis,
 Kaj eĉ Ivanon ŝi konsolis,
 Dirante, ke afabla Dio
 Neniam punos lin por tio,
 Je kio li en koro pentis...
 Ivano kvankam bone sentis,
 Ke tio-ĉi ne estas vere,
 Sed kredi volis li sincere...
 Sed ĉiam krimon memorante
 Kaj juĝon Dian atendente,
 Ivan' ne longe jam suferis
 Kaj fini vivon li preferis!...
 Vidvino riĉa ne elportis
 Malĝojon: ŝi tuj mem formortis,—
 Kaj restis sola nur infano:
 Ŝin prenis unu vilaĝano...

.

Jen en arbar' dometo staras.
 Jam tute ĝin neniu ŝparas:
 Ekstere kiel ĉifonulo
 Ĝi ŝajnas, kvazaŭ maljunulo
 Ĝi tute fleksis sin... Neniu
 Loĝadas en dometo tiu.
 Pasanto ia iafoje,
 Irante preter, tre malĝoje
 Aliras, kaj, ekpensiĝinte,
 Per signo kruca sin beninte,
 Li diras: „donu, Dio mia,
 Vi pacon al animo lia!...



EPISKOPO. *estas pleza per presaro*

Drama skizo.

I.

En lukse ornamita kabineto
 Sinjoro grafo Doro kun edzino sia
 Jam longe paroladas en sekreto.
 Videble ĵus okazis teruraĵo ia,
 Ĉar grafo, ordinare tre trankvila,
 Ne povis kaŝi nun eksciton de animo,
 Grafino-do, senmova kaj humila,
 Nenion preskaŭ parolante eĉ de timo,
 Kun larmoj en okuloj lin aŭskultis.

Grafo:

En ĉio estas kulpa sola vi, grafino!
 En ĉio!... Mi ne vane vin insultis,
 Ankoraŭ kiam vi per larmoj, kun obstino
 De via amo blinda, min devigis
 Ŝin hejme edukadi!... Vi al mi ne kredis,
 Vi ploris, kaj vi mem ŝin pereigis!...
 Ho, ve! mi ankaŭ estas kulpa, ĉar mi cedis
 Al via malsaĝeco!...

Grafino:

Justa Dio!

Pro kio tiuj-ĉi riproĉoj?! Ĉu mi ploris
Ankoraŭ ne sufiĉe?

Grafo:

Ha! Pro kio?

Apenaŭ nur rozeto nia ekdisfloris, —
Kaj jam pereas!... Ŝi, Mari', infano
Per amo jam pasia, voluptema flamas...
Al kiu-do? Al seminariano!!...
Kaj kiu estas kulpa?!

Grafino:

Mi ŝin tiel amas!

Grafo:

Malsaĝa, blinda amo! Oni devas
Sin mem kaj sentojn siajn pli posedi!...
Ĉu scias vi pri kio ili revas?
Forkuri volas!... Jen (donas al grafino taglibron)... Ĉu
oni povas kredi,
Ke skribis tion-ĉi filino via?!
Taglibron tiun-ĉi mi sub kuseno trovis
En ĉambro de Mari'...

Grafino:

Ho, Dio mia!

Mi tion-ĉi imagi eĉ neniam povis!

Grafo (moke):

Ĉu bone ekinstruis li Marion?

Grafino (traleginte, kun teruro):

Jes, jes, mi vidas mem: ĝi estas ŝia mano,
Ĝin skribis efektive ŝi!... Sed kion
Ni devas fari nun?!

Grafo:

Al seminariano

Solajron lian pagi kaj sen vorto
 Forpeli lin el domo nia, kun ordono,
 Ke li neniam eĉ al nia korto
 Alproksimiĝu, kaj Marion per admono
 Devigos ni forgesi ŝian amon.
 Kun ni ne volas ŝi disputi malhumile,
 Kaj kredu, ke de am' unua flamon
 En juna koro mi estingos tre facile!...

II.

Sendube ĉiu ĝusta romanisto
 Ekpentrus tuj portretojn de Mario mia
 Kaj de enamiĝita instruisto.
 Sed mi ne faros ĝin: mi estus tro partia.
 Herooj miaj je unua fojo
 En sia viv' per amo reciproka flamas,—
 Kaj kiel granda, kiel pura ĝojo
 Plenigas junajn korojn, kiuj tiel amas!
 Feliĉa estas, kiu iam ĉarmojn
 Kaj revojn dolĉajn de printempa amo ĝuis,
 Sapiris kiu, kiu verŝis larmojn,
 De miraj ravoj svenis, ĝojis aŭ enuis!...
 Mari' neniam, per nenia gesto
 Al konfuzema sia instruist' esprimis,
 Aludis ĉe pri amo... Nur en kesto
 Sekreta kaŝis ŝi taglibron, kiun timis
 Elpreni eĉ je tago, kaj en kiu
 Ŝi ĉiunokte skribis plenan historion
 De sia juna amo. Al neniu
 Ŝi volus diri, ke ŝi amas Antonion...

Sed kio-do heroo mia? Sorto
 Per sia ĉiam kruda kaj severa mano
 Neniam lin dorlotis,—kaj sen vorto
 Suferis malgracia seminariano...
 Li estis eĉ de tio tre feliĉa,
 Ke ĉiutage povis vidi li Marion
 Kaj ŝin instrui... Estis ĝi sufiĉa
 Por lia amo,—pli li volis jam nenion!...

.
 En tiu tago, kiam grafo Doro
 Parolis kun edzino sia pri Mario,
 En ordinare difinita horo
 Loĝejon riĉan grafan venis Antonio.
 Serioza kaj enua, laŭ kutimo,
 Eniris li salonon, kun esper' sekreta,
 Ke tie ŝi... Sed lin kun malestimo
 Haltigis grafo mem ĉe pordo kabineta.

Grafo:

Sinjoro Antonio! Jen alprenu
 Solajron vian por monata laborado,—
 (Donos al li monon)—
 Marion-do instrui jam ne penu:
 Ŝi povas resti nun sen via instruado...

Antonio (frapita):

Sed kion ĝi signifas?... Sed... vi diras...

Grafo (malkontente):

„Sed, sed“!... Sen viaj „sed“, mi petas vin humile!
 Mi diras, ŝajne, klare,—kial miras
 Vi tiel? Min kompreni estas tre facile.

Antonio (kun tremo en voĉo):

Vi sekve min forpelas... Sed pro kio?

Grafo:

Ho, ne, sinjor', mi vin ne pelas, sed proponas:
Forlasi nian domon.

Antonio (kun petego):

Sed pro Dio...

Grafo (severe):

Sufiĉe! Ni de nune vin jam ne bezonas!
Vi jam ricevis tutan vian monon
Por via laborad', kaj mi al vi ordonas
Por ĉiam nun forlasi nian domon...
Ĉu vi komprenas min? Por ĉiam!

Antonio (meditante).

Jes, sinjoro,
Komprenas mi... kaj dankas vin el tuta koro
Adiaŭ, graf'?!...

Grafo (malpacience):

Adiaŭ!

Antonio (forirante):

Donu Dio

Al vi feliĉon... Al fraŭlin' Mario
Salutan mian koran mi transdonas...

Grafo (kolere):

Foriru! Ĝin Mario ne bezonas!

III.

En sopirado de vundita koro
 Paliĝis freŝaj vangoj de Mario juna,
 Simile je rompita bela floro.
 Por ŝi, mizera, ŝajnis ŝia vivo nuna
 Malplena, abomena kaj sencela...
 Neniu kaj nenio povis ŝin konsoli:
 Ŝi sopiradis nur kaj ĝemis,—kaj paroli
 Nenion volis ŝia buŝo bela.
 Grafino ploris nur, mem grafo Doro
 Maltrankviliĝis kaj pro helpo medicina
 Sin turnis al sciata profesoro.
 Sed tiu-ĉi al li eldiris: „por fraŭlino
 Malsano tia estas naturala,
 Kaj malsaniĝi tiel estas eĉ utile
 Por organizm’; ŝi estas iom pala,
 Sed post monato ĝi forpasos tre facile,
 Aparte-do, se iom per vojaĝo
 Vi ŝin amuzos: ĝi en tiel juna aĝo
 Efikos ankaŭ ĉiam tre utile“...
 Kaj en Mari’ kun patro kaj patrino
 Amuzas sin per vojaĝado alilanda.
 Parencoj ĉiel penas al fraŭlino
 Diversajn plezuriĝojn doni: ĉiu granda
 Signifa urbo, ĉiu poezia
 Rivero, monto, aŭ arbaro,—ĉio estis
 De ili vizititaj, eĉ nenia
 Vilaĝo iom bela sen atento restis...
 De tiu-ĉi vojaĝo tre agrabla
 Mari’ fariĝis iom pli afabla,
 Kaj kora vund’ de amo malprospera
 Komencis baldaŭ sin kuraci: iam hela
 Rideto reaperis jam sincera

Kaj bril' antaŭa lumis en rigardo bela.
 Ankoraŭ kelkan tempon,—kaj en koro
 De lukse disflorinta belulino mia
 Nur restis ia stranga rememoro
 Pri ŝia juna amo flama kaj pasia!...
 Ho, kara Antonio! Bedaŭrinde
 Ne ĉiuj amas nin eterne, blinde!

IV.

El grafaj ĉambroj riĉaj, elegantaj
 Kaj post vojaĝ' agrabla kune kun Mario,
 Kuraĝas mi inviti vin, legantoj,
 En domon mallumegon de seminario... a.
 Mi scias: amon al lernejo pia
 Ne sentas vi,—mi—ankaŭ... sed mi kvazaŭ aŭdas,
 Ke tien vokas min heroo mia,
 Kaj tial vi, kredeble, min jam ne mallaŭdas...
 El domo grafa krude elpelita,
 Seminarion venis mia Antonio
 Malĝoja, senespera kaj premita
 Per ŝargaj dubaj konsideroj pri Mario...
 Li pensis: „jes, ĝi estas sendisputa,
 Komprenis ŝi, ke mi ŝin amas, kaj ofendis
 Purecon ŝian mia amo muta...
 Kaj kion-do mi volis? Kion mi atendis?
 Ĉu povis havi ian mi esperon?
 Ĉu pensas vi, ho malsaĝega, blinda homo,
 Ke ĉifonulon nudan kaj mizeran
 Fraŭlino bela, kun sciata grafa nomo,
 Ekamos?!... Sed pro kio kaj por kio?!
 Pri amo mia tuj al patro ŝi rakontis,—
 Kaj jen li min forpelis... Dio, Dio!

Ŝi mem eĉ min forpeli, eĉ forpeli hontis!...
 Sed kial-do ŝin ĉiam mia veno
 Ĝojigis? Kial ĉiam estis ŝi atenta
 Al miaj vortoj, kun tiela peno
 Zorgante nur, ke estu mi je ŝi kontenta?
 Mi ne komprenas!... Sed... ho, justa Diol
 Se li forpelis min sen ŝia scio,
 Kaj se... se eble amas min Mario?!

.
 Kaj longe, longe tiel konsideris
 Heroo mia, longe, longe li batalis
 Kun sia juna koro: jen esperis
 Subite li, jen ree senespere falis
 Sub premo de malĝojo, de sopiro...
 Nenion fari li, nenion pensi povis,
 Kaj iafaje suna supreniro
 Sed dormo lin kaj eĉ ne senvestitan trovis...

Sen

V.

Forpasis multaj jaroj. Princó Doro
 Jam longe kuŝas en tombejo familia,
 Princino ankaŭ mortis, kaj sinjoro
 Barono Kalm' posedas koron de Mario.
 Kontenta estas li kaj tre feliĉa:
 Kolegoj multaj liaj ĉiam kun invio
 Rigardas, kiam en kaleŝo riĉa
 Veturas li kun belulin'—edzino sia.
 En domo de barono nia heroino
 El ĉiuj ornamaĵoj estis pléj brilanta,
 Plej kara, kaj barono ŝin sen fino
 Dorlotis per atent' favora kaj konstanta.
 Sed nek riĉeco, nek beleco hela,

Nek karesadoj eĉ de edz' enamigita
 Konsolis ŝin: ŝi „ornamaĵo bela“
 Sin sentis kvazaŭ bird' en kaĝo origita...
 Tre ofte, kiam kun barono restis
 Mario en soleco, kaj kun amo premis
 Li manon ŝian, — ŝi malgaja estis,
 Silente sidis kaj kun mutaj larmoj ĝemis.
 Tre ofte, kiam ĉe barono Kalmo
 Konatoj kunvenadis en grandega nombro,
 Mario en gastĉambr' sub luksa palmo
 De ĉiuj kaŝis sin en ĝia verda ombro,
 Kaj, kun neniuj parolante, sidis
 Silenta kaj malĝoja. Ĉiuj gastoj miris
 Je ŝia vid' malgaja, multaj ridis,
 Kaj multaj divenemaj en sekreto diris,
 Ke estas ŝi enamiĝita iun,
 Kaj kelkaj el brilanta junularo ora
 Eĉ pripensadis tre serioze, kiun
 Por si elektis de Mario amo kora...
 Tre multaj ŝian edzon tre kompatis
 Kaj diris, ke li estas malfeliĉa homo,
 Kaj multaj mem Marion multe flatis,
 Bedaŭris ŝin kaj diris, ke en edza domo
 Ofero estas ŝi, kaj ke barono
 Ne amas tute ŝin, kaj ĉiam ŝin turmentas,
 Kaj batas, kaj insultas sen bezono...
 Ho, bonaj, saĝoj homoj! Kiel ĝuste sentas
 Vi veron!...
 Ne komprenis mem Mario
 Pri kio ŝi sopiris: ŝia juna koro
 Terure turmentiĝis, sed pro kio—
 Ne sciis tute ŝi... Pro kio bela floro
 Senkaŭze, ŝajne, velkas en somero
 Kaj baldaŭ mortas, kvankam sun' brilanta, ora

Varmigas ĝin, dorlotas, kaj vetero
 Bonega estas kaj al floro bonfavora?...
 Ĉirkaŭe ĉie viv' bruanta bolis,
 Enuon ne sciante,—sed plezuroj mondaj
 Marion nian tute ne konsolis,
 Kaj ĉiam estis ŝi en bruaj vivaj ondoj
 Simila je ŝipet' en maro granda,
 Naĝanta sen espero laŭ deziro venta,—
 Aŭ kvazaŭ bela palm' en fremda lando:
 Malgaja, sola, enuanta kaj silenta...
 Nur iafoje preĝo diligenta
 En sanktaj muroj de preĝejo plej proksima
 En munaĥejo iom por momento
 Al ŝi ripozon alportadis al animo.
 Atente kaj kun ĝoje ŝi aŭskultis
 Solenan belan kanton de virinoj piaj,
 Kaj suferantan koron ne tumultis
 Ekstera mondo kun bruantaj ondoj ĝiaj...
 Kaj vivon monaĥejan ŝi komencis
 Invii pli kaj pli,—kaj jen kun edzo sia
 Subite ŝi paroli ekintencis
 Pri planoj siaj...

Mario:

Mi, laŭ supra volo Dia,
 Ne povas vivi plu en via domo,
 Ĉar Li, Juĝanto Supra, vokas min... Sinjoro
 Baron'! Se estas vi honesta homo
 Kaj se ne malaperis jam el via koro
 Antaŭa amo al Mario via,—
 Ho! tiam, pripensinte ĉion kun trankvilo,
 Vi ne deziros, ke al volo Dia
 Mi ne obeu kun albitra malhumilo!...

Barono:

Ho, kara mia! kion vi parolas?
 Mi ne komprenas vin!... Forlasi mian domon...
 Pro kio fari tion-ĉi vi volas?!
 Mi amas vin: al vi ne sole mian nomon
 Fordonis mi, sed koron kaj animon
 Kaj tutan ekzistaĵon mian. Ho, Mario!
 Vi bone scias amon kaj estiman,
 Per kiuj mi ĉirkaŭis vin, — kaj nun... Pro Dio,
 Parolu, kion volas vi? Ordonu!...

Mario:

Nenion mi de vi bezonas, nur deziras,
 Ke vi, barono kara, min pardonu:
 Por ĉiam nun en monaĥejon mi foriras.

Barono:

Mario!...

Mario:

Ho, sinjoro kara! Kredu,
 Ke tia estas volo de Ĉionpovanto, —
 Vi tial al decido mia cedu;
 Kaj mi... mi ĉiam restos multe estimanta
 Memoron pri pasinto kaj pri via domo,
 Kaj kredu, ke en monaĥina preĝo
 Humila al Ĉiela sankta Reĝo
 Neniam estos forgesita via nomo...

.....

 VI.

Forpasis du—tri jaroj. Granda fasto
 Al fino jam alproksimiĝis. Monaĥejo

En tiu-ĉi semajno antaŭlasta
 Ankoraŭ pli severa estis: en preĝejo
 Senĉese jam al plej potenca Dio
 Preĝadis humilege monaĥinoj piaj,
 El tuta kor' plorante pri pekadoj siaj...
 Kaj ankaŭ juna koro de Mario,
 Troplenigita per humila ploro,
 Batadis forte nun en ŝia brusto juna, — *W*
 Kaj ŝi, simila al velkinta floro,
 Malalte fleksis sin en sankta preĝ' komuna...
 En tiu-ĉi momento plej solena
 Tremanta forta son' de ĉiuj sonoriloj
 Subite ekanoncis pri alveno
 De nova Episkopo... Tiam kun lumiloj
 Renkonti lin ekiris plej maljunaj
 El monaĥinoj. Malfermiĝis pordo grava,
 Kaj kune kun radioj brilaj sunaj
 Aperis Episkop', ankoraŭ juna, brava.
 De unu monaĥin' li krucon prenis
 Kaj ĉe kantado bela de graciaj kantoj,
 Tri fojojn li solene ĉiujn benis,
 Kaj fleksis sin tri fojojn antaŭ alestantoj, —
 Kaj komenciĝis Granda Meso Sankta...
 Ruĝeta de kandeloj blankaj duonlumo,
 De pia legantino voĉ' tremanta,
 Mallaŭta kanto, bonodora blua fumo
 Animojn logis al Ĉiela Reĝo...
 Preĝantoj ĉiuj staris pie genuantaj,
 Kaj inter ili sur malalta seĝo
 Vidiĝis Episkopo. Ĉiuj alestantoj
 Rigardis lin scieme kaj atendis
 Parolon lian instruantan... Jen li prenis
 Brilantan krucon, supren lin etendis
 Kaj malrapide ĉiujn alstarantajn benis...

.

Subite en preĝejo kri' terura
 Eksonis, kaj tuj mem ĉesiĝis: alestantoj
 Ekvidis kun mirego senmezura,
 Ke al piedoj de apudstarantoj
 Ekfalis monaĥino pala, bela...
 Ĉesiĝis vivo de Mario juna mia,
 Kaj kaptis ŝin subite mort' kruela
 En mezo de Sanktega Granda meso Dia!...
 Paliĝis Episkopo... Kruco sankta
 Tremadis kontraŭ vol' en manoj fortaj liaj,
 Kaj jen per voĉo laŭta, sed tremanta
 Parolas li al monaĥinoj piaj:
 „Fratinoj karaj! Sankta Filo Dia,
 Veninte mondon, ĝin per morto sia savis,—
 Kaj tial diras mi, sendita Lia:
 Per morto ĉiujn ŝi pekadojn siajn lavis,—
 Ne ploru ja, pli bone ni en preĝo
 Esprimu kore mian dankon plej humilan
 Al Mondkreinto, al Ĉiela Reĝo,—
 Ĉar sendis morton Li al ŝi trankvilan“!...
 Li eksilentis... Scias sola Dio,
 Pri kio pensis mia Antonio!



POLTAVO.

(Poemo de A. Puŝkin).

ANTAŬPAROLO.

Poltava batalo estas unu el plej gravaj kaj plej feliĉaj okazoj en reĝado de Petro Granda. Ĝi liberigis lin de plej danĝera malamiko, plifortigis rusan potencon sude, pretigis novajn venkojn norde kaj pruvis al regno sukceson kaj necesecon de reformoj reĝaj.

Militeraro de reĝo sveda fariĝis popoldiro. Oni lin riproĉas en nesingardeco, oni trovas, ke lia militado Malgrandrusujon estis senprudenta. Kritikistojn oni ne povas kontentigi, aparte post malprospero. Karlo, tamen, per tiu-ĉi militado evitis gloran eraron de Napoleono: li ne iris Moskvon. Kaj ĉu li povus atendi, ke Malgrandrusujo, ĉiam maltrankvila, ne estos forlogita per ekzemplo de sia hetmano kaj ne ribelos kontraŭ antaŭnelonga potencado de Petro, ke Levenhaŭt estos tri tagojn vice disbatita, ke, fine 25000 svedoj, kondukataj de reĝo mem, forkurros antaŭ Narvaj forkurintoj? Petro mem longe ŝanceliĝadis, evitante gravan batalon, kiel tre danĝeran aferon. En tiu-ĉi militado Karlo XII-a pli malmulte, ol iu alia, kredis sian feliĉon: ĝi cedis al genio de Petro.

Mazepo estas unu el plej rimarkindaj personoj de tiu-ĉi epoko. Kelkaj verkistoj volis prezenti lin, kiel heroon

de libero, novan Bogdanon Ĥmjelnickij. Historio rakontas, ke li estis honoramulo, enradikita en malicoj kaj en krimoj, kalumniisto de Samojloviĉ—lia bonfaranto, pereiginto de patro de sia malfeliĉa amantino, perfidisto de Petro antaŭ lia venko, perfidulo de venkita Karlo: rememoro pri li, metita al religia malbeno, ne povas eviti ankaŭ malbenon de tuta homaro.

Iu en romana rakonto prezentis Mazepon, kiel maljunan timemulon, paliĝantan antaŭ armita virino, elpensantan diversajn terurojn, taŭgajn por franca melodramo k. t. p. Estus pli bone disvolvi kaj klarigi ĝustan karakteron de ribela hetmano, ne ŝanĝante arbitre historian personon.

31-an de Januaro 1829.

DEDIĈO.

Al vi... sed ĉu oreĵon vian
 Tuŝetos mia flama kanto?
 Kaj ĉu deziron flaman mian
 Komprenos vi per kor' floranta?
 Aŭ eĉ dediĉon de poeto
 Vi tute sen respondo lasos,
 Kaj, kiel mia am' sekreta,
 Ĝi ankaŭ preter vi forpasos?
 Ja konu min en rimoj' sonaj,
 Por vi estintaj iam ĉarmaj,
 Kaj sciu: nun en plej malbonaj
 Disiĝaj tagoj, tagoj larmaj,
 Deziro via, lasta sono
 De via voĉ' por mia koro
 Ĉiela estas sankta dono,
 Kaj sola amo, kaj trezoro.

KANTO UNUA.

Riĉega estas Koĉubejo ¹⁾.
 Ĉe li en stepo, en herbejo
 Paŝtiĝas aroj da ĉevaloj
 Liber-sovaĝaj, kaj en valoj
 De ĉie de Poltav' bienoj
 Ĝirkaŭvolviĝas per ĝardenoj
 De Koĉubejo; sen mezuro
 Da bono, fel', atlas', arĝento
 Posedas li kaj sub seruro,
 Kaj ne ŝlositaj. Sed kontenta
 Li estas ne je ĉevalaroj,
 Fiera li ne je bienoj
 Kaj ne je oro de tataroj,
 Aŭ je arĝento, je ĝardenoj,—
 Ne! je filino sia bela
 Fiera estas Koĉubejo.

Kaj vere: en Poltav' forestas
 Egalaj al Mario bela:
 Ŝi freŝa kiel floro estas,
 Kreskinta en printempo hela
 Sub verda ombro de arbaroj,
 Kaj kiel poplo ŝi gracia.
 Ŝi en movado bela sia
 Jen kiel cigno sur akvaroj
 Jen kvazaŭ cerv' rapidkuranta.
 Brust' ŝia kiel ŝaŭm' blankiĝas;
 Bukletoj, frunton envolvante
 Al nokta nubo similiĝas;

Okuloj brilas kvazaŭ stelo;
 Buŝeto, kiel rozo, flamas.
 Sed ŝin ne por beleco hela
 (Por tiu-ĉi momenta floro!)
 Bruanta famo kore amas:
 Mario estas en honoro,
 Ĉar estas ŝi modesta, saĝa.
 Pro tio da fianĉoj multo
 Al ŝi de ĉie ĉiam kuras;
 Sed, kiel de kateno ŝarĝa,
 Mari' de ili en tumulto
 Sin kaŝas ĉiam kaj forkuras
 Kun koro plena de konfuzo.
 Por ĉiuj estas nur rifuzo, —
 Kaj jen ravigis ŝi hetmanon:
 Li mem al ŝi proponas manon...

Maljuna estas li. Laboro,
 Milito, zorgoj lin detruas;
 Sed amon portas li en koro,
 Kaj liaj sentoj bolas, bruas.

Minute juna koro flamas,
 Kaj estingiĝas. Ĉiam amas
 Ĝi ne konstante, nova sento
 En ĝi aperas por momento.
 Sed ne facile, obeeme
 Kaj ne rapide tiel flamas
 Maljuna koro voluptema,
 De multaj jaroj ŝtonigita, —
 Ne tiel maljunuloj amas.
 Per fajr' volupta bruligita,
 Obstine, malrapide ĉiam,
 Li malvarmiĝos jam neniam;

Malfrua fajr' neniam pasos
Kaj nur ĉe morto lin forlasos.

Ne ĉamo sub ŝtoneg' sin kaŝas,
De aglo flugon ekaŭdante —
En ĉambro fianĉino paŝas,
En trem' decidon atendante.

Kaj plena je indigno, iras
Al ŝi kun trem' patrino ŝia
Kaj en kolero brua diras:
„Senhonta! Maljunul' malpia!
Ĉu estas eble?... Ne, ĝis kiam
Ni estas vivaj, ho, neniam,
Neniam tio povas esti!
Li patr', amiko devas resti
Por sia ĉasta baptfilino...
Ho, malsaĝulo? ĉe grandaĝo
Ŝin fari volas li edzino!“²).
Mari' ekstremis. En vizaĝo
Paleco tuj aperis forta,
Ŝi malvarmiĝis, kaj sen sono
Malsupren falis kvazaŭ morta
Sur planko alta de perono.

Mari' revenis en konscion,
Sed jam parolas ŝi nenion,
Malgajaj patro kaj patrino
Tumulton penas silentigi
En flama koro de filino,
Konfuzajn pensojn trankviligi,
Forigi volas el animo
Atakojn de malĝoj', de timo...
Sed vane. Pala, kvazaŭ morta,
Mari' silenta kaj malforta,

En sopirad' kun larmoj mutaj,
 Sen manĝ', sen trinko, ne dormanta
 Vagadas jam du tagoj tutaj,
 De flank' al flank' ŝanceliĝanta.
 Kaj jen en tag' post tio tria
 Forkuris ŝi en ĉambro sia.

Sin kaŝis kie ŝi, neniu
 Eksciis. Nur en nokto tiu
 Fiŝisto iu aŭdis kuron
 Ĉevalan, de virin' murmuron,
 Kozakan voĉon, kaj sur valoj
 Matene, kiam ektagiĝis,
 Sur roza herb' de du ĉevaloj
 Postsignoj mutaj nur vidiĝis.

Ne sole bukloj de junulo,
 De vangoj lanuget' unua,
 Sed ofte vid' de maljunulo,
 Rigardo klara, sed enua,
 De frunt' ĉikatroj kaj grizaĵo
 Forlogas ankaŭ al revaĵo...
 Kaj baldaŭ Koĉubejan koron
 Sciigon plej fatalan venas:
 Forgesis honton ŝi, honoron,
 Kaj nun krimulon ĉirkaŭprenas!
 Ho, kia malhonor' senlima!
 Gepatroj ŝiaj en animo
 Al famo ne kuraĝas kredi,--
 Al vero tamen devas cedi.
 Nur tiam vero proksimiĝis
 Terura en nudeco sia;
 Nur tiam fine ekklariĝis
 Anim' de krimulin' malpia;

Nur tiam estis jam videbla
 Intenco ŝia, komprenebla
 Agado ŝia, kaj pro kio
 Forkuris ŝi el familio,
 Sopiris, ĝemis kaj silentis,
 Kaj al fianĉoj ĉe saluto
 Respondis por fiero mutio;
 Pro kio ĉiam ŝi atendis
 Nur al hetmano kontraŭ volo
 En festenado, kiam vino
 Ŝaŭmiĝis kaj interparolo
 Gajega daŭris ĝis senfino;
 Pro kio kantojn ŝi kantadis
 De lia muz' ³⁾ de tempo tiu,
 En kiu sciis lin neniu,
 Kaj kiam li ne potencadis;
 Pro kio, kun vizaĝ' brilanta,
 Kun koro de revaj' tremanta,
 Rigardis vicon ŝi ĉevalan,
 Tamburan ŝanon tiel amis,
 Englutis kvazaŭ per okulo
 Bulavon kaj bunĉukon palan ⁴⁾
 De Malgrandrusa potenculo,
 Kaj ĉe ilia vido flamis...
 Ho, Koĉubejo vivas riĉe.
 Amikojn havas li sufiĉe.
 Por lia ofendita pravo
 Sin levos tuta eĉ Poltavo;
 Subite al krimul' malpia
 Li povas en palaco lia
 Aperi kaj per trafa mano
 Enpuŝi... sed intenco tia
 Ne estas bona por hetmano.

Epoko estis tre fatala,
 En kiu juna Rusa lando,
 Streĉante fortojn en batalo,
 Viriĝis dank' al Petro Granda.
 Severa en scienc' milita
 Kaj tre kruela instruanto
 De sorto estis donacita
 Al ĝi: de sveda kondukanto
 Jam ricevadis ne unuan
 Ĝi lecionon sangan, bruon.
 Sed elprovinte punojn fortajn
 Kaj elportinte batojn sortajn,
 Rusuj' fortiĝis. Sub martela
 Batad' tiele pecetiĝas
 Rompebla vitro,—glavo hela
 De ĝi nur ĉiam fortikiĝas.

Per glor' kronita senutila,
 Kuraĝa Karlo malhumila,
 Glitadis super profundaĵo.
 Li en antikvan Moskvon celis,
 Kaj, kiel vento, per polvaĵo
 Ludante, herban inklinigis,—
 Militistaron rusan pelis.
 Li iris, kie ekrestigis
 Postsignon malamik' alia,
 Tre forta, nova, vir' fatala,
 Senglora dank' al paŝo sia
 Kaj glora eĉ en sia falo.

Malgrandrusujo ondiĝadis.
 En ĝi jam longe bruletadis
 Fajrer'. De sanga antikveco
 Amikoj jam popolmiliton

Atendis, kaj kun fiereco
 Esprimis per murmur' eksciton,
 Ribelis, kaj hetmanon plendis,
 Ke ne disŝiris li katenon,
 Kaj en facilanim' atendis
 Kun granda rav' de Karlo venon.
 Ĉirkaŭ Mazepo sonis krio
 Senpacienca: tempo estas!
 Maljuna—do hetman' ilia
 Subul' de Petro Granda restas.
 Malgrandrusujon li regadis
 Kun severeco laŭ kutimo,
 Li famon kvazaŭ eĉ ne aŭdis
 Kaj festis kun trankvilanimo.
 „Hetmano?“ diris junaj koroj:
 „Malforta li, maljuna estas;
 „Post multaj jaroj kaj laboroj
 „En li antaŭa fajr' forestas.
 „Pro kio-do per mano !aca
 „Ankoraŭ tenas li bulavon?
 „Pro kio kun milit' malpaca
 „En Moskvon vi ne portas glavon?
 „Ho, se maljuna Doroŝenko ⁵⁾
 „Aŭ Samojloviĉ ⁶⁾ forta, juna,
 „Aŭ eĉ Palej ⁷⁾, aŭ Hordienko ⁸⁾
 „En tempo reaperus nuna;
 „En malproksima alilando
 „Ne pereadus ni, mizeraj,
 „Kaj filoj de Rusuj' Malgranda
 „Sendube estis jam liberaj“ *).
 Kun tia arbitrec' severa
 Plendadis junular' fieraj,
 Danĝerajn ŝanĝojn avidante,

*) 20000 kozakoj estis senditaj Liflandujon.

Patrujon sanktan forgesante,
 Disputojn de Bogdan' kuraĝajn,
 Kontraktojn kaj batalojn bravajn,
 Kaj siajn maljunulojn saĝajn,
 Kaj glorajn tempojn eĉ praavojn. *a*
 Sed maljunulo tre singardas
 Kaj tre suspekto elrigardas:
 Li eblan kaj neeblan vidas,
 Aferon tuj li ne decidas.
 Ĉu iu trovos sin kuraĝa
 Eniri maran profundaĵon
 Sub firman, dikan glaciaĵon?
 Ĉu iu per esploro saĝa
 Ekvidos ion en profundo
 De koro ruza? Pensoj kiaj
 Ekkaŝis sin sur ĝia fundo?
 Pasioj varmaj kaj malpiaj
 Sin eble trovas en maltr.ola
 Anim' malica kaj suspekto,
 Kaj eble maturiĝas sola
 En ĝi de longa temp' projekto.
 Ĉu estas tio-ĉi sciebla?
 Mazepo ju pli rusa estas,
 Malvera kaj nepenetrebla,
 Li ĉiam des pli simpla restas
 Kaj des pli ŝajnas por rigardo
 Senzorga li kaj nesingarda.
 Li mempotence kaj fiere
 Altiras korojn kaj komprenas,
 Li saĝojn regas sendanĝere,
 Sekretojn ĉiujn li divenas.
 Kun kia konfidec' malvera,
 Festeno kiam longe daŭras,
 Kun ia maljunul' severa

Li pri pasinta temp' bedaŭras,
 Liberon kun ribela laŭdas,
 Kun malkotenta tre kuraĝe ¹⁰
 Potencajn ĉiujn insultadas,
 Kun malsaĝul' parolas saĝe!
 Ne ĉiuj eble scias ĝuste,
 Ke li neelpeteblo estas,
 Ke li kaj juste, kaj maljuste
 Forvenĝas, ke nenio restas
 Ĉirkaŭe sen rimarko lia;
 Ke ĉiujn, kiuj lin ofendis,
 Memoras li en kor' malpia;
 Ke malproksimen li etendis
 Intencojn krimajn; ke en koro
 Sanktaĵon scias li nenian,
 Ke ankaŭ li bonfaron ian
 Neniam tenas en memoro;
 Ke li nenion amas, timas,
 Ke li kruela ĉiam estas,
 Ke li liberon malestimas,
 Kaj ke patruj' por li forestas.

Jam longe maljunulo lerta
 En kor' teruran penson tenis.
 Se saĝa malamiko sperta
 Penetris iel lin, komprenis.

„Ho, ne, rabist', ŝtelist' malpia!
 „Grincante pensas Koĉubejo:
 „Al via dom'—malliberejo
 „De filineto kara mia—
 „Mi malutilon ne alportos;
 „De fajro, en batal' bruanta,
 „De glav' kozaka vi ne mortos.

„Ho, ne, krimulo aroganta,
 „Maljuna, ruza mortigisto!
 „En manoj de ekzekutisto,
 „En tiu-ĉi kruelaj manoj
 „En sango, en neigoj vanaj,
 „En turmentiĝo konvulsia
 „Vi bapton de filino nia
 „Ekrememoros kun malbeno,
 „Malbenos horon de festeno,
 „En kiu mi el tuta koro
 „Al vi pokalon de honoro
 „Alportis kaj per vin' plenigis,
 „Kaj tiun nokton de teruro,
 „En kiu vi, ŝtelist'—vulturo
 „Filinon nian pereigis!“...

Jes, estis tempo: ĉiuj vidis,
 Ke amis Koĉubej' hetmanon;
 Ke ili inter si dividis
 Eĉ amon, kiel salon, panon.
 Tre ofte ili sur ĉevaloj
 Apude en batal' saltadis,
 Kaj ofte ankaŭ post bataloj
 Tre longe ili paroladis.
 Al Koĉubej' hetman' kaŝema
 De kor ribela, malsatema
 Intencojn parte malkovradis,
 Kaj pri estontaj ŝanĝoj, traktoj,
 Pri planoj siaj kaj kontraktoj
 Malklare ofte aludadis.
 Jes, Koĉubej' lin iam amis...
 Sed nun kolero lin turmentis,
 En koro li malgojon sentis
 Kaj de indigno forta flamis.
 De nune Koĉubejo devas

Al sola penso nur obei:
 Lin pereigi, aŭ perej,—
 Pri tio-ĉi li ĉiam revas.

Sed penson pri forvenĝ' kruela
 Profunde kaŝis li en koro,
 Nun en malĝojo pri ĉielo
 Li pensas,— kaj pri morta horo
 Preĝante, ĝemas kaj suferas.
 Mazepon li jam ne koleras,
 Filinon ankaŭ li pardonas:
 De familio forkurinte,
 Ĉielon, leĝon forgesinte,
 Al Dio ŝi respondon donos...

Kaj dume li memoron streĉas.
 Kaj en ĉirkaŭo hejma serĉas
 Al si kolegojn ne ŝanĝeblajn
 Kuraĝajn kaj ne forvendeblajn.
 Li ĉion diris al edzino: ⁹⁾
 Jam longe kun koler' senfina,
 Minace, kun kaŝita senco,
 Al reĝ' raporton li kunmetas.
 Kaj lin edzin' malpacienca
 Ĝin rapidigi ĉiam petas.
 Kaj nokte eĉ, sur dorma lito
 Ŝi lin, simile al spirito,
 Riproĉas, ploras kaj murmuras
 Pri puno, venĝon plej teruran
 Elpensas kaj postulas ĵuron—
 Kaj li al ŝi volonte ĵuras.
 Ekbato estas pripensita.
 Kaj Iskra ¹⁰⁾ estas lia ano.

¹⁰⁾ Iskra. Poltava regimentestro, samideano de Koĉubejo.

Li pensas: falo de hetmano
 Jam estas tute decidita...
 Sed kiu kun fervor' anima
 Pro amo al feliĉ' de lando
 Raporton pri hetmano krima
 Alportos al regnestro granda
 Sen ŝanceliĝo kaj sen timo?

L^o Jam longe el kozakaj junaj,
 Forrifuzitoj de Mario,
 De tiam ŝin ĝis tagoj nunaj
 Amadis unu kun pasio.
 Li en maten' kaj en vespero
 Sur hejma bordo de rivero
 L Sub ombro de merizo bela
 Marion ofte atendadis,
 Kaj de atendo suferadis,
 Kaj ĝojis ĉe sinvid' sencela.
 Li amis forte kaj sincere,
 Sed senresponde, senespere;
 Neniam tedis li Marion,
 Sed ankaŭ li rifuzon ŝian
 L Ne povus aŭdi. En tumulto
 Foriris li kaj nur suferis,
 Apenaŭ da fianĉoj multo
 Subite al Mari' aperis;
 Sed kiam ŝia malhonoro *kozak*
 Jam en Poltavo publikiĝis,
 En lia juna bela koro
 Mario virta konserviĝis;
 Popola senkompata famo
 Kun krueleco ŝin jeridis,
 Sed li en sia flama amo
 Ŝin pura kiel ĉiam vidis.

En li pasie koro bolis
 De volo ŝin ankoraŭ vidi:
 Ŝin malestimi, aŭ jeridi
 Nek povis li nek ankaŭ volis.
 Sed kiam eĉ okaze tute
 Mazepon iu memorigis,
 Paliĝis li, suferis mute,
 Rigardon-do al ter' aligis.

Rajdanto kiu brava, juna
 En nokt' veturas stela, luna?
 Kaj kies tiu-ĉi ĉevalo?
 Sen halt' en stepa kuras valo?

Kozako norden tenas vojon,
 Ripozu li eĉ unu fojon
 Ne volas en arbar' mistera,
 En stepo, aŭ sur bord' rivera.

Radias lia glavo hela,
 Sonoras mon' en sako sela;
 Ĉevalo kuras, ne haltante,
 Kolharon densan nur svingante.

Dukatojn li por voj' bezonas,
 Al li amuzon glavo donas,
 Ĉevalo ankaŭ lin ĝojigas,—
 Nur ĉapo lin maltrankviligas.

Pro ĝi li donos glavon helan,
 Dukatojn kaj ĉevalon belan;
 De li neniu prenos ĉapon
 Ĝis kiam li ne perdos kapon.

Pro kio-do li pli, ol kapo
 Ĝin gardas? Estas ĉar en ĉapo
 Raport' pri perfidist' de lando
 De Koĉubej' al Petro Granda

Mazepo, dume, ne timante,
 Danĝeron tute ne sentante,
 Intrigojn siajn plu daŭrigas,
 Kun li kuniĝis jezuito, ¹¹⁾
 Al ribeligo rajtigita,
 Per tron' estonta lin ravigas.
 Sekrete, kun ŝtelista vido,
 En nokto ili paroladas,
 Estontajn sekvojn de perfido
 Kaj planojn nigrajn pripensadas,
 Disputas pri Universaloj, ¹²⁾
 Pri kapo reĝa marĉandadas,
 Acetas jurojn de vasaloj...
 Palacon ofte vizitadas
 De ie ia almozulo,
 Kaj Orlik, aferist' ruzulo ¹³⁾
 Kondukas lin per propra mano.
 Servantoj lertaj de hetmano
 Vagadas ĉie kun propono
 Ribeli: ili jen vizitas
 Kozakojn ĉe bruanta Dono,
 Tatarojn arojn jen ekscitas,
 Jen post sojlar' de Dnepr' parenca.
 Amason ili ektimigas
 Per nom' de Petro mempotenca.
 Mazepo ĉiujn ribeligas
 Kaj per diversaj bonoj tentas;
 Li amikiĝis kun tataroj,
 En Varsovio lin atentas

Palujo tuta, en tendaroj
 Regnestro lin kaj Karl' aŭskultas,
 Turkujon ankaŭ li tumultas.
 Li ĉion scias, ĉion vidas,
 Ne dormas li kaj ne rapidas.
 Per penso penson disvolvante,
 Preparas li ekbaton sian;
 Kun fajr' antaŭa efikante,
 Ne lasas volon li malpian.

Sed kiel forte li ektremis,
 Subite kiam lin ekpremis
 Terura tondr' neatendita!
 De korteguloj rusaj bando ¹⁴⁾
 Raporto en Poltav' skribita
 Al li, al perfidist' de lando,
 Subite venis; en raporto
 Sekreta oni lin konsolis
 En lia malfeliĉa sorto,
 Kaj diris, ke neniu volis
 Perfidan lian kredi; tiam
 Eĉ reĝ' pŝtenca mem por ĉiam
 Raporton pri perfido ĵetis
 Kaj perfediston kore petis
 Konsoli sin; al li li diras
 Ke malbonecon humiligi
 Kaj malamikojn silentigi
 Per puno brua li deziras!...

Mazepo en malĝoj' malvera
 Al reĝo ŝajne el sincera
 Humila koro diras „Dio
 „Kaj homoj scias, ke nenio
 „Devigos min, ke mi, mizera

„Hetmano, estu per animo
 „Por reĝo ne sufiĉe vera;
 „Mi dudek jaroj ja sen limo
 „Amadis reĝon, bone servis
 „Kaj pri perfido eĉ ne revis;
 „Mi, per bonfaroj ĉirkaŭita
 „Kaj tiel mire altigita...
 „Ho, kiel ĝi sensaĝa estas!
 „Ĉu povas mi, maljuna homo,
 „Pri mia iam glora nomo
 „Forgesi nun? Por mi ja restas
 „Mallonge vivi,—kaj ĉe vido
 „De morto pensi pri perfido
 „Ĉu povas mi? Al Stanislavo ¹⁵⁾
 „Ĉu helpis mi per mia glavo?
 „Kaj de Malgrand-Rusujo krono
 „Ĉu min forlogis? Ĉu pri bono
 „Mi propra pensis, kiam sendis
 „Al reĝo ribelegajn aktojn
 „De perfedistoj kaj kontraktojn?
 „Kaj kiam manoj eketendis
 „Al mi amike ruza Ĥano ¹⁶⁾
 „Kaj poste de Turkuj' sultano,—
 „Ĉu ilin prenis mi? Neniam!
 „Al reĝo rusa aldonita
 „Mi estis tuta kaj por ĉiam,
 „Kaj kontraŭ malamikoj liaj
 „Batali estas mi pretita
 „Per saĝo kaj per glavo miaj!
 „Kaj nun de malamik' malpia
 „Grizhara mia eĉ sanktejo
 „Ne estas estimata! Kia
 „Teruro!... Iskra, Koĉubejo!...
 „Mi pensis, ke amikojn varmajn

„En ili havas mi“!... Kaj larmojn
Krimulo verŝas, arogante
De reĝo Granda postulante
Ilian ekzekuton...¹⁷⁾.

Dio!

Ho, maljunulo plej malpia!
Sed kies ja en brako via
Filino estas? Ho, pri kio
Vi reĝon petas?.. . . .
. Sed teruron
De peto sia li deziras
Ne senti tute, kaj murmuron
De koro ne aŭdante, diras:
„Pro kio li, liberamulo,
„Intencas kontraŭ mi batali?
„De propra li hakilo fali,
„Kredeble, volas, malsaĝulo?
„Kaj kien iras li? je kio
„Esperas? je filina amo?
„Espero vana: kora flamo
„De am' pasia al Mario
„Hetmanon bravan ne haltigos,
„Alie li sin pereigos“.


Mario, ho Mario mia,
Ĉerkasa *) ornamento bela!
Ne scias vi, serpento kia
Ripozas nun sur brusto via!
Per kia forto al kruela
Anim' vi estas altirita?
Al kiu estas vi donita?

*) „Ĉerkasi“—urbo en Ma'grandrusujo.

Por vi de maljunul' vizaĝo,
 Ondanta lia grizharaĵo,
 Rigard' profunda kaj brilanta.
 Kun maljunul' interparolo
 Plej karaj estas: eĉ amanta
 Patrino via kontraŭ volo
 De vi jam estas forgesita;
 Vi al malpia tento lita
 Forkuris eĉ de patra!domo
 Vin per okuloj siaj brilaj
 Forlogis tuj maljuna homo,
 Kaj per paroloj plej humilaj
 Hontecon vian li dormigis;
 Vi lin senfine plialtigis,
 Karesas lin kun flama amo,
 Por vi agrabla estas honto:
 Forgesis vi pri homa famo,
 Kaj kvazaŭ en senfunda fonto
 En vi plezuron vi pasian
 Ĉerpadas; ĉiam pli falante,
 Forpelis vi hontecon vian,
 Pri tuta mondo forgesante...

Sed kio estas por Mario
 Terura ŝia honto, famo?
 Mallaŭdoj de popolo bruaj?
 Ĉu povas pensi ŝi pri io
 En tempo, kiam sur genuoj
 Al ŝi sin klinas de hetmano
 Fiera kapo, lia mano
 Ŝin kiam flame ĉirkaŭprenas,
 Aŭ kiam li al ŝi parolas
 Pri tio, kion ĉiam tenas
 En sia kapo, ĉar li volas

De malkuraĝa knabineto
 Nenion kaŝi en sekreto?
 Kaj ŝi en brakoj flamaj liaj
 Forgesas pri pekadoj siaj.
 Nur iafoje en malĝojo
 Ŝi pri gepatroj pensas; vojo
 Ilia estas malagrabra,
 Maljunaj—ili solaj restas...
 Ho, se nun estus ŝi kapabla
 Ekscii tion, kio estas
 De ĉiuj bone jam sciita!
 Sed estas ĝi de ŝi kaŝita.



KANTO DUA.

Mazep' ombriĝas. Saĝon lian
 Turmentas revoj plej kruelaj.
 Mario per okuloj helaj
 Rigardas maljunulon sian.
 Ĉirkaŭprenante kun pasio
 Genuojn liajn, ŝi kun flamo
 Lin kisas, sed per juna amo
 Eĉ ne konsolas lin Mario.
 Li ŝin rigardas sen atento
 Kun vido ombra kaj malvarma,
 Kaj al riproĉo ŝia ĉarma
 Respondas li nur per silento.
 Ŝi, senmezure mirigita,
 Apenaŭ viva, ofendita,
 Sin levas kun bruanta sento.
 „Aŭskultu min hetmano: ĉion

„Forgesis mi pro amo via.
 „Amante sole vin, nenion
 „Krom vi en juna koro mia
 „Mi havis. Mem vi min devigis
 „Vin ami, min vi pereigis.
 Sed malfeliĉan mian sorton
 Mi ne domaĝas,—nur pri tiu
 Vi rememoru nokt', en kiu
 Al mi vi donis vian vorton
 Min ami. Diru-do, pro kio
 Vi nun ne amas min, pro kio?

Mazepo:

Pasi' en via brusto flamas,
 Kaj pensas vi, ke mi ne amas.
 Vi penson tiun-ĉi sensencan
 Forlasu, ĝi turmentas koron.
 Vi devas kredi: pli, ol gloron
 Mi amas vin, pli, ol potencon.

Mario:

Ne estas vere; vi ruziĝas.
 Ni ĉiam estis iam kune,
 Kaj nune vi de mi foriĝas,
 Por vi karesoj miaj nune
 Videble estas jam enuaj;
 Vi inter bojevodoj *) estas,
 En vojo, en festenoj bruaj,
 Kaj hejme ĉiam vi forestas,
 Mi estas tute forgesita;
 Vi nokte ĉiam longe sidas
 Kun almozul', kun jezuito.
 Kaj mia am' humila vidas

*) Milita kondukanto.

Nenion, krom nur malvarmaĵo.
 Antaŭ nelonge vi festenis
 Kun ia Dulskaja, Novaĵo
 Por mi ĝi estas. Kie prenis
 Vi tiun-ĉi virinon?

Mazepo:

Dio!

Ĉu efektive vi, Mario,
 Ĵaluzas min? Ĉu mia aĝo
 Ne garantias min de tento
 De volupteco? Mia saĝo
 Maljuna estas, kaj al sento
 De am' pasia maljunuloj
 Ne estas tute jam kapablaj;
 Ĉu estas ja por mi agrablaj
 Katenoj amaj de junuloj?

Mario:

Ne ruzu, mi al vi ne kredas,
 Respondu rekte kaj pri ĉio.

Mazepo:

Trankvilon vian mi, Mario,
 Deziras, kaj al vi mi cedas;
 Eksciu: ni jam longe volas
 Aferon gravan fari; venis
 Nun tempo, ĉiuj ni ekbolas
 Kaj ĉiuj batalilojn prenis...
 Sen libereco kaj sen gloro
 Sub Varsovia bonfavoro
 Kaj sub potenco Moskva resti
 Ni devis longe. Sed mizera
 Malgrandrusujo devas esti
 Jam mempotenca kaj libera,—

Mi levas kontraŭ Petro Granda
Standardon de libero landa.

Jam ĉio estas tute preta:
Kun mi du reĝoj en sekreta
Kunligo estas, kaj kredeble
Post kelka tempo ilin igos
Mi al bataloj bruaj; eble
Jam baldaŭ tronon mi atingos.

Amikojn verajn mi denune
Akris: almozulo pia,
Princino Dulskaja kaj kune
Kun ili jezuito mia

Efeklivigas miajn planojn:
Mi tra iliajn lertajn manojn
De reĝoj ricevadas multon
Da skribordonoj, da leteroj.
Ĉu nun forigis mi tumulton
De via koro per sinceraj
Konfesoj miaj? Ĉu kontentas
Vi nun?

Mario:

Ho, kia ĝojo granda!
Vi estos reĝ' de mia lando!...
Al mi jam ĝuste mi prezentas,
Ke sur grizhara via kapo
Belega estos reĝa ĉapo!

Mazepo:

Atendu, kara,—ja ne ĉio
Finita estas. Alvenados
Ventugo... Scias sola Dio
Ĉu estos bone?

Mario:

 Mi sentadas

Kun vi nenian timon! Brilo
De reĝa trono atendadas
Jam longe vin!

Mazepo:

 Sed se hakilo?

Mario:

Kun vi mi sub hakilon iros.
Ha, ĉu sen vi mi vivi povos?
Sed mi al vi kuraĝe diros:
Vi nepre kronon reĝan trovos,
Ĉar estas vi potenca.

Mazepo:

 Amas

Vi min ĉu forte?

Mario:

 Mi? Ĉu amas?

Mazepo:

Sed diru: edz', aŭ patro via
Por vi pli kara estas?

Mario:

 Tia

Demando vane min turmentas.
Pro kio-do vi tiel diris?
Vi bone scias, kion sentas
Al vi Mario. Mi foriris.
Pro vi el mia patra domo,
Pri mia eĉ homesta nomo

Forgesis kaj al vi mi venis;
Kredeble min (teruro kia!)
Por tio mia patr' malbenis

Mazepo:

Ĉu estas pli, ol patro via
Por vi mi kara?

Mario:

Dio mia!

Mazepo:

Sed vi respondas ja nenion...

Mario:

Decidu mem.

Mazepo:

Respondu: kion
Vi dirus, se al vi donita
Demando estus, ĉu deziras
Vi min, aŭ patron? Elektita
De vi ĉu estus mi, aŭ...

Mario:

Diras

Vi teruraĵon!...

Mazepo:

Vi silentas..

Mario:

Vi pala estas; vi parolas
Kruele... Ĉion mi konsentas,
Kaj kredu, kion vi nur volas,
Mi ĉion faros,—sed turmentas
Min tim'...

Mazepo:

Memoru-do pri tio,
Nun kion diris vi, Mario.

Trankvila estas nokto hela
Malgrandrusuja. Steloj brilas
Sur arko de ĉielo hela.
Aer' dormetas, kaj babilas
Folioj de poplar' argenta.
Kaj super turoj de kasteloj
Hetmanaj en altec' silenta
Naĝadas luno inter steloj
Al granda ora glob' simile.
Ĉirkaŭe estas tre trankvile;
En unu nur kastela turo
Aŭdiĝas sopiranta bruo.
En ĝi, malsana, kun teruro
En kor' tremanta, sub influo
De rememoroj, Koĉubejo
Maljuna en malliberejo
Jam longe sidas, meditante
Kaj ĉielarkon rigardante.
Matene estos ekzekuto.
Sed pensas li pri ĝi sen timo;
Li estas preta sen disputo
Kaj sen ĉagreno en animo
Formorti. Kio estas morto
Por li? Nur sonĝo dezirinda.
Dormetas li... Sed kia sorto
Terura! Al malestiminda
Krimulo fali sen parolo
Sub piedojn, esti eldonita
Al reĝa malamik' laŭ volo

De reĝo, esti almetita
 Al morto, iri kun humilo
 Al ekzekuto, kaj en horo
 De morto esti sen honoro,
 Kaj kun amikoj sub hakilo
 Ekaŭdi de krimul' malbenojn
 Kaj ridon gajan kaj sensencan,
 Sentante mortajn ĉirkaŭpreojn,
 Kaj al neniuj rekompencoj
 Komisiinte al malpia
 Krimulo, malamiko sia!...
 Kaj nun li rememoris ĉion:
 Poltavon, kaj amikojn varmajn,
 Kaj sian karan familion,
 Riĉecon, gloron, kantojn ĉarmajn
 Filinajn, domon jam maljunan,
 En kiu iam li naskiĝis,
 Junecon tre feliĉan, sunan,
 Per kiu tiel plezuriĝis.
 Kaj forprenita nun de ĉio
 Li estas krude,—sed pro kio?
 Kaj jen ekaŭdas li: ŝlosilo
 Ĉe pordo de malliberejo
 Ektondris brue,—Kocubejo
 Vekiĝis. „Jen antaŭ hakilo,
 Li pensas, mia kondukanto
 Sur mia sangigita vojo,
 Ĉe morta hor' konfesprenanto
 Kaj konsolanto, en malĝojo
 Homara gusta kuracisto,
 Servant' de Krucumita Krusto;
 Kun Sango kaj kun Korpo Lia
 Li venis nun pro savo mia,
 Ke mi sen timo morton prenu

Kaj en eternan vivon venu!
 Kaj kun malĝojo korpremanta
 Elverŝi antaŭ Supra Reĝo
 Jam preta estas suferanto
 Sopiron de humila preĝo.
 Sed ne ermito sankta, pia,
 Al li eniris gast' alia—
 En pordo de malliberejo
 Al malfeliĉa Koĉubejo
 Aperis Orlik. Kun esprimo
 De abomeno mizerulo
 Demandas: „pacon de animo
 „En mi pro kio nun, krimulo,
 „Vi kune kun Mazep' malpia
 „En lasta eble nokto mia
 „Ekribeligas ree? Diru!

Orlik:

Ne finis ni ankoraŭ ĉion;
 Respondi devas vi...

Koĉubejo:

Foriru:

Mi jam respondis, pli nenion
 Mi scias.

Orlik:

Sed hetmano volas

Konfesojn pluajn.

Koĉubejo:

Sed pri kio?

Al vi respondis mi pri ĉio.
 Konfesas mi, ke mi parolas
 Mensaĝojn. Tuta mia plano
 Tre ruza estas kaj tre krima,

Jam mi parolis, ke hetmano
Ne estas kulpa.

Orlik:

Pri senlima
Riĉeco via nin sciigis
Tre multaj homoj; vi kuŝigis
Trezoron ie grandan. Savon
De nun ne devas vi atendi.
De vi ni prenos vian havon.
Por ĝin al registaro sendi—
Tiela estas leĝo nia.
Kaj estas lasta devo via
Al ni ĉe via morta horo.
Rakonti vere pri trezoro
Kaŝita.

Koĉubejo:

Jes, vi estas pravaj:
Por mi en mia tera vojo
Jam longe tri trezoroj gravaj
Estadis ĉiam mia ĝojo.
Trezor' unua estis pura
Honoro mia: ĝin terura
Turmento kaj sufero muta
Forprenis; dua-do trezoro,
Ĉe kiu tra vivado tuta
En gardo staris mi,—honoro
Filina estis: ĝin malpia
Mazepo ŝtelis. Tamen tria
Ĉe mi trezoro restis—venĝo:
Ĝin portos mi al Supra Reĝo.

Orlik:

Ne volu sensencaĵojn diri;
Hodiaŭ vi ja devas mondon

Forlasi kaj al morto iri.
 Kaj tial donu tuj respondon,
 Malkovru, kie estas mono?
 Alie ree...

Koĉubejo:

Ho, fripono

Malbona! Kiel vi sensenca,
 Malsaĝa estas! Vi atendu
 Malmulte, estu pacienca:
 Formortos mi, kaj tiam sendu
 Mazepo vin en miajn bjenojn,
 Ke vi per manoj sangigitaj
 Detruu domojn kaj ĝardenojn,
 En kiuj ne elkalkulitaj
 Trezoroj miaj kuŝas. Prenu
 Kun si vi ankaŭ mian belan
 Filinon—ŝi tuj mem alvenu
 Kaj montru mian oron helan;
 Sed nun mi petas vin, pro Dio,
 Forlasu min trankvile.

Orlik:

Kio?

Al mi respondon vi ne donas
 Jam lastan fojojn mi proponas,
 Respondu, kie estas mono?
 Alie estos ja malbono.
 Silentas vi, fantaziisto?
 Nu, bone! He, ekzekutisto!...

Li venis... Ree nokt' turmenta!...
 Sed kie-do hetman' sensenta?
 Forkuris kien li, kruela,
 De sia konscienc' serpenta?

En ĉambro de Mario bela,
 De sia baptfilin' dormanta,
 Ĝis nun nenion ekscianta,
 Mazepo ĉe knabina lito
 Kun kapo sidas mallevita,
 Pri faroj siaj meditanta.
 Mallumaj pensoj en malpia
 Animo lia maljunaĝa
 Trapasas unu post alia.
 „Formortos Koĉubej' sensaĝa;
 „Jam nun mi lin ne povas savi.—
 „Ĉar estas mia cel' proksime,
 „Potencon nun mi devas havi
 „Plej fortan, devas sin senlime
 „Malalte malamiko klini.
 „Mi nepre devas ĉion fini:
 „Maljuna raportist' kaj lia
 „Helpanto mortos“.—Sed post tio,
 Turminte sin al lit' Maria,
 Mazepo pensas: „justa Dio!
 „Pri ĝi ekscios ja Mario,
 „Kaj kiel ŝi al ĝi rilatos?
 „Ĝis nun ŝi estas en trankvilo,
 „Sed morgaŭ tondro jam ekbatos,
 „Kaj ĉiuj aŭdos, ĉar hakilo
 „Tro laŭte sonos. Kvazaŭ ondo
 „Malgrandrusujon troplenigos
 „Ĉi-tiu sono. Voĉ' de mondo
 „Ĉirkaŭe tuj mem ĝin vastigos!
 „Mi vidas bone nun: al kiu
 „De sorto estas definitiva
 „Ondiĝ' de vivo, devas tiu
 „Por ĉiam esti izolita
 „De amo de virino iu:

„Ĉevalo kaj cervin' timema
 „En voj' ne povas kune iri.
 „Mi estis tre ne singardema—
 „Kaj tial devas nun sopiri...
 „Ŝi ĉion, kio estas kara,
 „Per kio vivo estas ĉarma,
 „Al mi, al maljunul' grizhara,
 „Donacis kun favoro varma.
 „Kaj kio-do? De mi, malpia,
 „Al ŝi pretiĝas bato kia“!...
 „Kaj li rigardas; ŝi sur lito
 Ripozas dolĉe; juna, bela
 Buŝeto estas malfermita;
 Spirado—tiel malribela;
 Kaj morgaŭ, morgaŭ... Ektremante,
 Mazepo sin de ŝi fortiras,
 Sin levas, ŝin ne rigardante,
 Kaj en ĝardenon li foriras.

Trankvila estas nokto bela
 Malgrandrusuja. Steloj brilas
 Sur arko blua de ĉielo.
 Aer' dormetas, kaj babilas
 Folioj de poplar' arĝenta.
 Mazepo estas malkontenta,
 En liaj sentaj maljunulaj
 Malluma estas: noktaj steloj
 Lin rigardados per okuloj
 Similaj al juĝanto. Belaj
 Arbetoj, sin ĉirkaŭprenante
 Per branĉoj, kapojn balancante,
 Parolas inter si murmure,
 Kaj nokt' en tuta ĉirkaŭejo

Malluma premas lin terure,
 Simile al malliberejo.

Subite... tre mallaŭta krio...
 Ekĝem'... nekomprenebla io
 Aŭdiĝis en kastela turo.
 Ĉu estas ĝi de best' murmuro,
 Ĉu plor' de strigo, ĉu ekĝemo
 De turmentad', ĉu son' alia,—
 Sed sub influo de ekpremo
 Anima, kontraŭ volo sia,
 Al krio tiu maljunaĝa
 Krimulo tuj per kri' sovaĝa
 Respondis, per ekkrio tiu
 Aŭdita estis en bataloj,
 Ankoraŭ kiam li saltadis
 Rajdante en flamantoj valoj,
 Kaj kiam kune bataladis
 Li kun Labelo, Gamalejo
 Kaj kun... ĉi-tiu Koĉubejo.

Montriĝis suno ruĝa, bela
 Sur rando de arkaĵ' ĉiela.
 Ekbrilis valoj, kampoj, montoj,
 Verdiĝis de arbar' supraĵoj,
 Ekbruis riveretoj, fontoj,
 Vekiĝis ĉiuj ekzistaĵoj.

Mari' ankoraŭ dolĉe spiras
 En song' facila; ŝi dormetas
 Kaj aŭdas, ke al ŝi aliras
 Subite iu kaj tuŝetas
 Piedojn ŝiajn. Ŝi vekigis,
 Sed tuj mem kun rideto bela

Palpebroj ŝiaj ekkuniĝis
 Ĉe brilo de radio hela.
 Pasiĝe manojn ŝi eltiris
 Kaj tre mallaŭte, ame diris:
 „Mazepo, vi“?... Sed voĉ' alia
 Respondas ŝin... Ho, Dio mia!...
 Ŝi tremas... Antaŭ ŝi patrino...

Patrino:

Ne pereigu nin, filino,
 Silentu: mi en nokto muta
 Kun preĝ' al vi aliri provas.
 Hodiaŭ estos ekzekuto...
 Vi sola patron savi povas...
 Ho, savu, savu lin!...

Filino (en teruro):

Pri kio

Vi diras? Patro, ekzekuto...

Patrino:

Ĉu vi sciiĝis pri nenio

Ĝis nun? Vi scias sen disputo,
 Kiela estas nun hetmano
 Minaca, kiel li turmentas
 Malamon per kruela mano,
 Regnestro kiel lin atentas.
 Sed mi nun vidas, familion
 Vi pro Mazepo ne bedaŭras;
 Vi dormas, scias vi nenion,
 Nenion, kiam longe daŭras
 Kruela juĝo; en trankvilo
 Dormeti povas vi eĉ tiam,
 Suferas kiam ni kaj kiam

Minacas patron jam hakilo...
 Ni—fremdaj unu al alia...
 Vekiĝu, ho filino mia!
 Mario! kuru tuj, hetmanajn
 Genuojn preĝe ĉirkaŭprenu:
 Rigardo via liajn manojn
 Kunligu kaj de li fortenu
 Hakilon; ploru, kriuu, petu,
 Sin al piedoj liaj ĵetu.
 Ne povas li al via ploro
 Rifuzi: vi ja pri honoro
 Pro li forgesis, kaj pri Dio,
 Kaj pri gepatroj siaj...

Filino:

Kio

Kun mi fariĝis? Patro mia...
 Mazepo... ekzekuto ia...
 Patrin' al mi kun preĝ' kliniĝis...
 Ĝi estas ia songa igo,
 Aŭ eble mi ekfrenezigiĝis...

Patrino:

Ho, Dio! kia songa igo?!

Ĉu vi ankoraŭ ne sciiĝis,
 Ke de filin' senhonorigo
 Turmentis patron? Ke premita
 Per honto, ĝin li ne elportis,
 Kaj ke per venĝo forlogita,
 Al reĝ' li pri hetman' raportis?
 Ke oni longe lin turmentis?
 Ke en turmento li konsentis
 Konfesi ĉion, kion volis
 Nur malamiko malbenita:

Ke li mensogojn nur parolis,
 Perfidis, ruzis? Ke donita
 De reĝ' li estas al kruela
 Mazep'? Ke ĉe popolo tuta,
 Se lin ne savos Reĝ' Ĉiela,
 Hodiaŭ li al ekzekuto
 Metita estos? Ke kastela
 Malliberejo estas lia
 Loĝejo nuna?...

Filino:

Dio mia!

Hodiaŭ... Patro—mizerulo!

Kaj per doloro plenigita,
 En sveno tuj en sia lito
 Ŝi falas kvazaŭ malvivulo.

Diveskoloraj ĉapoj ĉie
 Vidiĝas. Jen ĵetiloj brilas;
 Tamburoj sonas kaj tintilas.
 Serdjukoj *) rajdas. Staras tie
 En vicoj longaj regimento.
 Popolamasoj vagas, bruas,
 Kaj koroj sin en ĉiuj skuas.
 De homoj plena, al serpento
 Simila, ŝanceliĝas vojo.
 Sur kampo alte sin etendas
 Terura konstruaĵ'; kun ĝojo
 Sur ĝi ekzekutist' atendas:
 Li ludas kun hakilo ŝarĝa,
 Kaj ŝercas kun popol' malsaĝa.
 En unu son' kuniĝis ĉio:

*) „Serdjuko“—soldato el militaro de hetmano.

Insulto, rido, parolado.
Kaj en subite sonas krio...
Silentas ĉio. Nur frapado
De hufoj estas ekaŭdita.
Jen de serdjukoj, rajdas grava
Hetmano sur ĉevalo brava
Kun militaraj maljunuloj,
Kaj sur Kieva larĝa vojo
Montriĝas veturil'. Okuloj
De ĉiuj, plenaj je malĝojo,
Rigardis ĝin. En veturilo
Per kredo sankta fortigita,
Al tero kaj ĉiel' humila,
Vidiĝis Koĉubej'. Senvorta
Senkulpa, bona Iskro, nune
Trankvila, pia, sed malforta,
Kun Koĉubejo estas kune.
Jen haltis veturilo. Preĝo
Eksonis al Ĉiela Reĝo;
Sin levis fumo bonodore
El sankfumiloj; kaj popolo
Por mizeruloj sen parolo
Preĝadas flame kaj fervore...
Jen iras ili, jen suriras...
Kun sign' de kruco Koĉubejo
Kuŝiĝas. Kvazaŭ en tombejo
Silentas ĉiuj, eĉ ne spiras...
Subite kun terura brilo
Sin levis en aer' hakilo,—
Kaj for eksaltis kapo... Tuta
Popol' ekkriis. Forhakita
Jen dua saltas kapo muta.
Ruĝiĝis herbo sangigita...
Ekzekutisto kapojn prenis

Kun gaja vid', kaj sen parolo
 En sia blanka mano tenis,
 Montrante ilin al popolo.


Finiĝis ekzekut'. Popolo
 Al hejmo sia jam rapidas,
 Kaj brue en interparolo
 Pri zorgoj siaj krias, ridas.
 Fariĝis kamp' malplena, pura.
 Kaj jen virinoj du sur vojo
 Rapide iras kun terura
 Kaj laca vido. Kun malĝojo
 Kaj timo, ŝajne, ili iris
 Al lok' de ekzekuto ŝarĝa.
 „Malfrue estas“ iu diris,
 Turninte sin al kampo larĝa.
 En kampo oni jam rompadis
 Ekzekutejon, pastro ia,
 Klininte sin kun vido pia,
 Fervore preĝis kaj kontadis,
 Sur si metinte nigran veston,
 Kaj du kozakoj alportadis
 Al veturilo kverkan keston.

Mazepo, antaŭ aro sia
 Rajdante, sola eforiĝis
 D'ekzekutej'. Li turmentiĝis
 Per malplenec' terura ia.
 Al li neniu proksimiĝis
 Kaj li parolis pri nenio;
 Ĉeval' lin portis, kvazaŭ vento.
 Alveturinte en turmento
 Al hejm', Mazepo pri Mario
 Servantajn siajn ekdemandis.

De ili li respondojn aŭdis
 Ne klarajn, surdajn... Kaj kun timo
 Neesprimebla en animo
 En ĉambron ŝian li rapidas,—
 Kaj tie li nenion vidas.
 Malgaje domon li forlasas
 Kaj en ĝardenon densan pasas;
 Ĉi—tie ankoraŭ — ĉe rivero,
 En arbitaj', sub ombr' ĝardena,
 En tuta ĉirkaŭaj' malplena—
 Neniu! Li en malespero
 Servantojn vokas sindonemajn,
 Serdjukojn siajn obeemajn.
 Al li rapide ili kuras.
 Kun krioj laŭtaj kaj sovaĝaj
 Bravuloj ĉien forveturas
 Tra valoj kaj tra kampoj larĝaj.

Forflugas tempo nekapteble,—
 Nenion tamen pri Mario
 Ekscii, aŭdi estis eble,
 Forkuris kien ŝi, pro kio.
 Mazepo grincis en silento;
 Mallaŭte servantaro tremis.
 En brusto kun venena sento
 En ĉambro sin hetmano fermis.
 Ĉe lit', premata per sufero
 Ne ekzistanta eĉ sur tero,
 Sen dormo sidis li en sveno.
 Servantoj frue en mateno
 Aperis unu post alia.
 Ĉevaloj tutaj, vest' ilia
 En polvo estis kaj en ŝvito,
 Subhufoj, batalilo ĉiu,

Bridetoj, seloj—disŝirita,
 Malpurigita kaj kovrita
 Per sango estis; sed neniu
 Sciigon pri Mario donis,
 Kaj eĉ postsigno de knabino
 En spaco kvazaŭ sono dronis;
 Kaj el praava hejm' patrino
 Foriris sola kun doloro,
 Kun ĝemo en rompita koro.



KANTO TRIA.

Sufero kaj malĝoj' anima
 Hetmanon tute ne haltigas
 Al celo iri malproksima
 Agadon sian li daŭrigas,
 Kaj planon pene pripensante,
 Kun sveda reĝo li fiero
 Interrilatas arogante.
 Kaj dume, por ke tuta vera
 Kaŝita estu de okuloj
 De malamikoj kaj dubuloj,
 Sin per amaso kuracista
 Ĉirkaŭis li, kaj kuŝigante
 Sur lito, kvazaŭ en persista
 Turmento forte suferante,
 Li ĝemis kaj sanigon petis.
 Malĝojo kvazaŭ kaj doloro
 Militaj zorgoj kaj laboro
 En liton lin, maljunan, metis.
 El tera mondo li foriras;

Persiste volas li animon
 Purigi sian, li deziras
 Plenumi antaŭ mort' kutimon
 Sanktegan,—venas pastro pia
 Al lit', en kiu li sin skuas,
 Kaj sur ruzega kapo lia
 Oleo adoranta fluas.

Sed tempo pasis. Al bataloj
 Sin Moskvo vane preparadis
 Kaj ĉiuhore inter valoj
 Ĝi gastojn svedojn atendadis.
 De tio Karlo sin detenis
 Kaj en Malgrandrusujon venis.

Kaj venis tago. Sin de lito
 Mazepo levas; turmentito
 Malsana, ĝusta malvivulo,
 Hieraŭ antaŭ tomb' ĝemanta,
 Nun estas forta kontraŭlo
 De Petro; nun li, kondukanto
 De regimentoj, lerta, brava,
 Fiere sur ĉevalo sidas,
 Svingante per potenca glavo,
 Kaj jen al Desno *) li rapidas.
 Per viv' maljuna kurbigita,
 Ĉi-tiu kardinalo nuna,
 Per krono roma ornamita
 Fariĝis tiel sana, juna.
 Sciigo tiu-ĉi flugile
 Trapasis ĉie... Maltrankvile
 Malgrandrusujo tre rapide

*) Rivero.

Ekbruis,—ĉie oni diris;
 „Al malamikoj li transiris,
 „Al Karlo metis li perfide
 „Bunĉukon“. Kaj milita flamo
 Interpopola kaj malamo
 Kreskadas.

Iu ĉu komprenas

Koleron reĝan? En preĝejo
 Mazepon oni jam malbonas;
 Turmentas en ekzekutejo
 Ekzekutist' figuron lian;
 Hetmanon oni jam alian
 Elektas brue post disputoj.
 De malproksima Enisejo *)
 Laŭ reĝa vol' parencoj tutaj
 De Iskro kaj de Koĉubejo
 Rapide estas alvokitaj
 Kaj per honoroj priŝutitaj
 De petro. Li kun ili kune
 Sopiras kaj ploregas nune.
 Kaj de Mazepo kontraŭulo,
 Palejo, flama maljunulo,
 Forlasas Siberujon neĝan
 Kaj venas en tendaron reĝan
 Malgrandrusujon. Nun ribelo
 Tremadas, de potenca mano
 Ekzekutista jam Ĉeĉelo **)
 Pereis brava kaj hetmano
 Kozaka. Kaj por vi, amanta
 Militan gloron kaj pro glavo
 Eĉ oran kronon forlasanta,

*) Rivero en Siberujo.

**) Samideano de Mazepo.

Alvenas tago,—ĉe Poltavo
Vi estas jam.

Kaj regimentoj

De reĝo, pretaj al batalo,
Al sama loko kvazaŭ ventoj
Alflugis, staris inter valo:
Tiele sperta batalanto,
Jam longe sangon soifanta,
Kuniras en disput' malpaca
Kun sia malamik' minaca.

Kaj Karl' potenca mire vidas,
Ke nune kontraŭ li rapidas.
Ne nudaj Narvaj timemuloj,
Similaj iam al nebuloj
Senordaj,—sed graciaj, lertaj,
Rapidaj regimentoj spertaj,
Tre obeemaj kaj trankvilaj
Kun vico longa da pikiloj.

i Sed li decedis: morgaŭ frue
Batalo estos. Songo morta.
En tendoj svedaj. Nur malbrue
Sub unu parolad' malforta
Aŭdiĝas.

„Ne, mi nun ekvidis,

„Orliko mia, tute vana,
„Malbona estis mia plano,
„Kaj tute vane ni rapidis.
„Pereis mia cel' sensaĝa.
„Mi paŝon senprudentan faris
„En mia Karlo mi eraris;
„Li estas knabo tre kuraĝa;
„Du tri batalojn gajni, certe,

„Li povas, kun senzorga vido
 „Por vespermanĝo rajdi lerte
 „Al malamik', ¹⁸⁾ per gaja vido
 „Respondi bombon ¹⁹⁾; sin aligi
 „En nokt' malluma al tendaro
 „De malamiko, kaj mortigi
 „Kozakon ian ĉe gardaro,
 „Kaj vundon eĉ per vund' ŝanĝigi; ²⁰⁾
 „Ne povas tamen bataladi
 „Li kontraŭ grandegul' potenca;
 „Li sorton igas sin turnadi
 „Sub sonoj de tambur' sensenca,
 „Sed sort' ne estas regimento;
 „Li estas tro malpacienca,
 „Albitra, ĉiam nekontenta,
 „Fiera kaj facilanima,
 „Kaj kredas al feliĉ' senlima;
 „Li forton malamikon nunan
 „Nur per pasinto ekmezuras,—
 „Li rompos sian kapon junan.
 „Mi hontas nune kaj teruras:
 „Mi de vagisto batalema
 „Per lia vido kaj kuraĝo
 „Kaj per feliĉo petolema
 „Sorĉita estis ĉe grandaĝo,
 „Simile al knabin' timema“.

Orlik:

Atendu; kiam nokt' forpasos,
 Farinte bataladon gajne,
 Kun Petro ni rilati, ŝajne,
 Ekpovos ree. Reĝ' ne lasos
 Al ni sendube humiliĝi,
 Kaj tial povos ni paciĝi.

Mazepo:

Malfrue. Jam ne estas ebla,
 Ke reĝ' kun mi paciĝu nune.
 Sort' mia estas ne ŝanĝebla.
 Jam longe mi koleros. Kune
 Kun reĝo nokte unufoje
 Ni ĉe Azovo festenadis.
 Da vino plenaj brue, ĝoje
 Boladis vazoj kaj sonadis
 Interparol' kun granda forto;
 Kaj jen subite unu vorto
 Elsaltis iom tro kuraĝa
 El mia buŝo maljunaĝa...
 Konfuzis tio-ĉi gastaron,
 Reĝ' ekondiĝis, kaj malpace
 Pokalon ĵetis, kaj lipharon
 Ekkaptis mian li minace.
 Kaj mi senfortan, sed teruran
 Koleron mian trankviligis
 En tiu tempo, tamen juron
 Mi donis—venĝi; kaj nutrigis
 Mi longe ĝin ĉe mia koro,—
 Infano tiel de patrino
 Nutriĝas. Nun jam venis horo...
 Pri mi terura rememoro
 § En li konservon sin ĝis fino.
 Por Petro estas mi punilo,
 En krona foliaj' pikilo.
 De si konsentus li forpreni
 De viv' duonon kun urbaro,
 Por nune kiel iam, teni
 Mazepon ree je lipharo.
 Esperon tamen mi en koro

Ankoraŭ havas... Kiu metas
Al kuro sin, matena horo
Decidos post kunir' batala.

Kaj eksilentas, kaj dormetas
De reĝo porfidist' fatala. e

Ekflamas orient' per lumo;
En valo, sur montetoj belaj
Pafad' aŭdiĝas. Ruĝa fumo
Forflugas ronde al ĉielo
Renkonte al radioj helaj.
Militoj vicojn ekkunigis,
En arbetaĵoj sin lokigis
Pafistoj; flugas globoj bombaj,
Senhalta pluv' de kugloj plombaj;
Malvarme klinas sin pikiloj.
De ofta venk' amataj filoj,
Sin ŝiras svedoj tra bariloj;
Traflugas ond' kavaleria;
Infanterio sin movigas,
Kaj per senhalta movo sia
Flugadon ĝian fortikigas.
Tondregas batalejoj fatala,
Kaj tie-ĉi kaj tie bolas;
Sed jam feliĉo de batalo
Al ni videble benevolas. o
Jam per pafado disbatitaj,
Forfalas vicoj da militoj;
Rozen' forkuras rapidanta;
Sin donas Ŝlippenbaĥ' flamanta;
Ni petas svedojn kun fervoro
Post vico vicon, mallumiĝas
Jam de standara' ilia gloro,

Kaj tute klare jam vidiĝas,
Ke nin en ĉiu paŝo nia
Senĉese helpas beno Dia.

De supre tiam inspirita
Eksonis Petra voĉ'. Li diris:
„Kun Di', antaŭen!“ Li eliris
El tend', de ĉie ĉirkaŭita
Per granda ar' da proksimuloj.
Terura estas vido lia.
Kuraĝo brilas en okuloj.
Rapidaj movoj... Kvazaŭ Dia
Minaco, estas nun li bela...
Al li ĉevalo tuj aperas
Trankvila, vera kaj ribela:
Ĉevalo tremas kaj koleras
Kaj per okuloj nigraj brilas,
Sentante fajron de batalo,
Kaj kvazaŭ birdo ĝi flugilas
En ondiĝanta larĝa valo,
Per densa polvo sin kovrante.
Kaj je rajdisto fierante.

Tagmezo jam alproksimiĝas.
Varmege. Kiel laboristoj
Ripozas lacaj militistoj.
Kozakoj rajdas; ekordiĝas
En vicoj militar'; batala
Muziko ĉesis; silentiĝas
De pafitegoj kri' fatala;
Kaj jen—en kampoj trafluginte,
„Hura“ eksonis malproksime:
Soldatoj, Petron ekvidinte,
Ekkriis ĝin unuanime.

Li flugis antaŭ regimentoj
 Potenca, ĝoja sur ĉevalo,
 Kaj rigardadis per kontentaj
 Okuloj kampon de batalo.
 Post li saltadis en amaso
 Kolegoj liaj en trapaso
 De vivo, de feliĉo tera
 Kaj de militoj malfacilaj,
 Amataj, indaj liaj filoj:
 Kaj Ŝeremetjef nobla vera
 Al li sen limo kaj sen fino,
 Kaj Brjus', kaj Baŭro kaj Rjepnino,
 Kaj li, sengenta feliĉulo,
 Duonregnanta potenculo.

Kaj antaŭ longaj vicoj bluaj
 Da siaj regimentoj bruaj,
 En palankeno, de servantoj
 Portata, Karl', sin ne movanta
 De vund', aperis suferanta.
 Post li iradis kondukantoj.
 Mallaŭte Karlo ekpensiĝis.
 En lia vido konfuzita
 Ondiĝo ia elmontriĝis:
 Batalo, ŝajne dezirinta,
 Foriĝis nun nekomprenebla...
 Kaj jen per movo nekaptebla
 De mano Karlo signon donis,
 Ataki rusojn li ordonis.

Kaj vicoj rusaj inter valo
 Renkontis svedojn kun terura
 Kriĝ'—kaj de Poltav' batalo
 Ektondris! Per vivanta muro

En fajro kuglojn forbatanta,
 Vic' nova super vic' falanta
 Pikilojn portas. Malfacila
 Nubego granda de flugila
 Kavalerio brueganta,
 Per glavoj akraj eksvinganta,
 Hakadas sin el tuta forto.
 Kaj iloj de kruela morto,
 Grandegaj bomboj flugas, fumas,
 Kaj inter korpoj ĉie saltas,
 Kaj batas, kaj en sango zumas.
 Neniu pro ripozo haltas:
 De ĉie—svedo, ruso,—ĉio
 Miksiĝis, kuras en teruro,
 Sin hakas, batas, tranĉas; krio,
 Pafado, bruo, ĝem', murmuro,
 Grincado en koler' senforta,
 Kaj ĉie ĉirkaŭpreno morta...

Kaj en ondiĝo kaj sopiro
 Batalan kampon kun inspiro
 Rigardas gravaj kondukantoj
 Pri ĉiuj movoj batalantaj
 Konsilas sprite, antaŭsentas
 Pereon, venkon, kaj atentas
 Raportojn pri batal' bruanta.
 Sed kiu tiu maljunulo
 Proksime ĉe mem reĝ' staranta?
 Kozakoj du lin kun estimo
 Subtenas, li-do per okulo
 De sperta homo, kun animo
 Flamanta, kampon rigardadas.
 Li sur ĉeval' jam ne rajdadas:
 Maljuna li en elpelejo

Fariĝis, krio de Palejo
 Kozakojn jam ne alvokadas!
 Sed kio brulas en okulo
 Maljuna, kial ekkovriĝis
 Subite frunt' de maljunulo
 De nokto? Kial li ondiĝis?
 Ĉu eble tra batalo fumo
 Mazepon kriman li ekvidis,
 Malestimatan kaj malpian,
 Kaj en moment' ĉi-tiu ridis,
 Malamis li grandaĝon sian?

Mazepo, per pensad' premita,
 Kaj per amaso ĉirkaŭita
 Da kozakar', da maljunuloj
 Kaj da serdukoj-proksimuloj,
 Rigardis nun kun maltrankvilo.
 Subite pafo. Li turniĝis.
 Ĉe Vojnarovskij en pafilo
 Ankoraŭ varma tub' fumiĝis.
 En kelkaj paŝoj inter valo
 Kozako juna kuŝis muta
 En propra sango, kaj ĉevalo,
 En ŝaŭmo kaj en polvo tuta,
 Libera, en sovaĝa timo,
 En fajra kuras malproksimo.
 Kozako celis al hetmano
 Tra batalad' kun glav' en mano,
 Kun kolerego en okulo...
 Alveturinte, maljunulo
 Al li sin turnis kun demando,
 Sed jam kozako formortadis.
 Al malamik' de Rusa lando
 Rigard' malluma minacadis;

Terura estis li, vizaĝo
 Paliĝis, longe ripetadis
 Marian nomon buŝ' sensaĝa.

Sed jam proksima estas horo
 De plena venko. Kun fortiko
 Ni staras. Kia vido glora!
 Ankoraŭ prem'—kaj malamiko,
 Forkuras; kaj pro persekuto
 De svedoj kvazaŭ sur flugiloj
 Kavaleristoj kun pikiloj
 Rapide flugas; stepo tuta
 Per korpoj homaj ekkovriĝis
 De batoj glavoj malakriĝis.

Festenas Petro, glora, hela,
 Ĝaj' brilas en akuloj liaj.
 Fiera estas li kaj bela
 Ĉe krio de soldatoj siaj
 En tendo sia li festenas
 Kun siaj, fremdaj kondukantoj,
 Kaj kun favoro vinon prenas
 Por san' de siaj instruantoj.

Sed kie estas gasto grava?
 Unua nia instruanto
 Kaj longetempa batalanto
 Kun nia forvenkist' Poltava?
 Mazepo kie? Kie estas
 Krimul', ludo malhumila?
 En festo kial Karl' forestas?
 Kaj perfidist' ne sub hakilo?

En stepo nuda, malproksima
Venkita reĝo kaj hetmano
Forkuras en terur' senlima...
Per sia senkompata mano
Kruela sorto ilin ligas.
Kolero kaj danĝer' proksima
Regnestron svedan fortikigas.
Pri malfacila sia vundo
Li jam forgesis. En profunda
Malĝojo scias li kaj vidas,
Ke rusoj lin el forto tuta
Peladas. Kun sopiro muta
Servantoj tuj post li rapidas.
Atente ĉirkaŭrigardante,
En step' nemezurebla, larĝa
Kun li hetmano maljunaĝa
En vico rajdas, forkurante.
Kaj jen bienon ili vidas....
Pro kio-do de kort' biena,
Da granda timo kvazaŭ plena
Mazepo flanken ekrapidas
Kaj flugas li el tuta forto?
Ĉu tiu-ĉi malplena korto,
Ĝardeno, domo izolita
Kun pord' al kampo malfermita
Al li pri forgesita ia
Rakonto nun rememorigis?
Krimul' sensenta kaj malpia,
Kruele kiu pereigis
Junecon puran! Ĉu rekonis
Vi domon tiun-ĉi teruran,
En kiu iam ĝojo sonis
En kiu iam vinon puran
Vi trinkis ofte, kaj ĉe tablo

Vin familio ĉirkaŭadis
 Feliĉa, vi-do kun afablo
 Kun ili manĝis kaj serĉadis?
 Kaj tiu-ĉi loĝejo bela,
 En kiu voĉ' anĝela sonis,
 De kie vi en nokt' senstela
 Forŝtelis ŝin.... Vi ĝin ekkonis!..

En ombron nokto stepon metas.
 Ĉe Dnjepro blua, inter pikoj
 De bordaj montoj nun dormetas
 De Petro Granda malamikoj.
 Trankvile dormas reĝo sveda,
 Li pri batalo malprospera
 Forgesis jam. Sed penso teda
 Atakas kapon de fiera
 Mazepo, kaj dormado lia
 Ribela estas kaj turmenta.
 Kaj jen subite voĉo ia
 Ekvokas lin en nokt' silenta.
 Vekiĝis li en maltrankvilo
 Kaj vidas: antaŭ li starante
 Sin klinas iu minacante.
 Li tremis, kvazaŭ sub hakilo...
 Kun disvolvitaj haroj densaj
 Kaj briletante per senpensaj
 Okuloj, en ĉifon' vestita,
 Malgrasa, pala, lumigita
 Per luno, staras ŝi... „Ho, Dio!
 „Ĝi estas songo!.. Ĉu Mario?“

Mario:

Silentu, kara!.. Maljunuloj,
 Gepatroj miaj, kun okuloj
 Fermitaj kuŝas ...

Mazepo:

Ho, Mario

Mizera! Memoriĝu!.. Dio!..

Mario:

Aŭskultu, kial ili ruzas?
 Rakont' ilia min amuzas!
 Al mi sekrete ŝi raportis,
 Ke mia patr' mizera mortis,
 Kaj montris ian kapon mortan
 Grizharan... Justa mia Dio!
 Forigu nin de kalumnio!
 Ŝi trompi volis min, malfortan.
 Pripensu: tiu kapo tute
 Ne estis homa, sendispute
 Ĝi estis lupa,—mem vi vidas,
 Ke ŝi min trompas kaj jeridas!
 Pro kio-do ŝi min turmentas?
 Ĉu ŝi ne hontas? Ŝi, malsaĝa,
 Forkuron mian antaŭsentas
 Kaj ŝi deziras, ke kuraĝa
 Por ĝi ne estu mi! Ĉu ebla
 Ĝi estas?

Kun neesprimebla

Malĝoj, atentis ŝin kruela
 Amant'... Kaj ree ŝi, ribela,
 Al li en frenezigo diras:
 „Memoras mi... festeno bela...
 Al ĝi mi kun patrino iras...,
 Kaj poste homaj korpoj sangaj,
 Senkapigitoj, iaj strangaj....
 Popolamaso krias brue....
 Sed kie estis vi?... Pro kia


Okazo nokte mi enue
 Vagadas sola?... Jam malfrue...
 Rapidu hejmen... Kapo mia,
 Mi vidas, estas jam malsaĝa,
 Mi pensis, homo maljunaĝa,
 Ke estas iu vi alia.
 Forlasu min. Rigardo via
 Terura estas kaj kruela.
 Vi—malbelega, li—plej bela;
 Okuloj liaj brilis ame,
 Parolo fluis tiel flame!
 Lipharoj kvazaŭ neĝ' blankiĝis,
 Sur viaj sango eksekiĝis".
 Kaj sin turninte, ŝi ekridis,
 Kun kri' sovaĝa forrapidis,
 Kaj eksaltinte, en mallumo
 Ŝi malaperis kvazaŭ fumo.

Ruĝiĝis gaje oriento
 Kaj suno frua eksuriris;
 Kozakoj ĉie en silento
 Sur fajro kaĉon jam kuiris;
 Rajdistoj sur dekliva bordo
 De Dnjepr' trinkigis en senordo
 Ĉevalojn. Karlo ekvekiĝis.
 „Mazepo, levu vin! Jam estas
 Malfrue! Vidu: mateniĝis.“
 Sed longe jam sen dormo restas
 Hetman'. Turmentas lin sopiro;
 En brusto kvazaŭ haltis spiro.
 Silente li ĉevalon selas,
 Kun reĝo rajdas li en timo,—
 Rigard' terure lia estas,
 De patra forflugante limo.

De tiam jam cent jaroj pasis—
 Kaj kion-do post si forlasis
 Por nia tempo tiuj homoj
 Kuraĝaj, fortaj kaj pasiaj?
 Forpasis idoj jam iliaj
 Eĉ pri ilaj gloraj nomoj
 Forgesis ĉiuj, malaperis
 Postsigno eĉ de tempo tiu,
 Batalis kiam kaj en kiu
 Kaj ĝemis ili kaj suferis.
 Nur vi, hero' Poltava glora,
 Sin konservadas en memoro
 De ĉiuj, dank' al via forto
 Kaj dank' al militema sorto
 De novigita regn' de nordo
 Floranta nur sur Neva bordo.
 En lando, kie mueliloj,
 Starante en dezertaj valoj
 Kaj eksvingante per flugiloj
 Benderojn *) pace ĉirkaŭiras
 De ĉiuj flankoj, kaj bubaloj
 Vagadas kie kaj forŝiras
 Herbeton velkan ĉe militaj
 Tombejoj,—restoj ruinitaj
 De ia domo, kaj kovritaj
 Per musko ŝtupoj tri en tera
 Kavigo diras pri mizera
 Regnestro sveda. Li sensaĝe
 En tiu loko kun servantoj
 Malmultaj longe kaj kuraĝe
 Batalis kontraŭ alpaŝantoj
 Militoj turkaj, serĉis savon,

*) Malgranda urbeto.

Kaj sub bunĉukon ĵetis glavon.
 Sed vane tie lacigita
 Pasant' postsignon de tombejo
 Hetmana serĉus: fargesita
 Mazepo estas: nur preĝejo
 Sanktega ĉiam malbenadas
 Lin ĉiujare tre minace.
 Sed sin de nune konservadas
 Tombejo sankta, kie pâce
 Du suferantoj ripozadas:
 Rifuĝis ilin inter pĵaj
 Antikvoj multaj tomboj siaj
 Preĝejo. Vico da plantitaj
 Per man' amika bukraj kverkoj,
 Sub kiuj kaŝas sin du ĉerkoj
 Kun cindro de ekzekutitaj,
 Ĝis nune en Dikanjko *) restas;
 Al nepoj junaj ĝi atestas
 Pri avoj. Sed pri krimulino
 Filin' konservis sin nenio
 En rememor' de tradicio....
 Suferoj ŝiaj, ŝia fino
 Kaj sorto ŝia kompatinda
 Por ni mallumaj estas tute.
 Kantisto nur maljuna, blinda,
 Se iafoje li minute
 Ludante kantojn preteriras
 Kaj iom haltas en vilaĝo,
 Pri peka li knabin' sensaĝa
 Al kozakinoj junaj diras.....



*) Bieno de Koĉubejo.

Rimarkoj de Puŝkin al „Poltavo“.

1. Vasilij Leontjeviĉ Koĉubejo—grava juĝisto, unu el praavoj de nunaj grafoj.

2. Mazepo efektive svatis sian baptilinon, sed oni lin rifuzis.

3. Tradicio diras, ke Mazepo verkis kelkajn kantojn, kiuj ĝis nun konserviĝis en memoro de popolo. Koĉubejo en sia raporto ankaŭ diras pri patriota penso, kvazaŭ verkita de Mazepo. Ĝi estas rimarkinda ne sole en historia rilato.

4. Bunĉuko kaj bulavo estis signoj de hetmana stato.

5. Doroŝenko, unu el herooj de antikva Malgrandrusujo. nepacema malamiko de Rusa potenco.

6. Grigorio Samojloviĉ, filo de hetmano elpelita Siberujon en komenco de regnado de Petro 1-a

7. Simeono Palejo, regimentestro, glora rajdisto. Por arbitraj raboj li estis elsendita Enisejskon laŭ plendaj raporto de Mazepo. Kiam tiu-ĉi lasta montriĝis perfidisto, Palejo, kiel lia eterna malamiko, estis revenigita el Siberujo kaj alestis en Poltava batalo.

8. Hordienko, estro de taĉmento de Dnjepraj kozakoj; li sin transdonis al Karlo XII. En jaro 1708-a li estis kaptita kaj ekzekutita.

9. Mazepo en unu letero riproĉas Koĉubejon, ke lin regas edzino.

10. Iskra, Poltava regimentestro, samideano de Koĉubejo.

11. Jezuito Zalenskij, princino Dulskaja kaj ia bulhara ĉefepiskopo, elpelita el sia patrujo, estis gravaj agentoj de Mazepa perfido. Lasta sub vido de almozulo vagadis el Polujo Malgrandrusujon kaj returnen.

12. Tiamaniere nomiĝis manifestoj de hetmanoj.

13. Filipino Orlik, grava skribisto, favorato de Mazepo. En lasta tempo li fariĝis mahometano kaj formortis en Benderoj proksimume en 1736-a jaro.

14. Sekretario Ŝafirov kaj grafo Golovkin, amikoj kaj favorantoj de Mazepo; sur ili juste devas kuŝi teruro de juĝo kaj de ekzekuto de raportintoj.

15. En jaro 1705.

16. En malprospera militirado en Krimon, ĥano Kari-Hirejo proponis al Mazepo kuniĝi kun li kaj kune ataki rusan militistaron.

17. En siaj leteroj li plendis, ke raportistojn turmentis tro facile kaj persisto postulis ilian ekzekuton, komparante sin kun Susanno, senkulpe kalumniita de malpiaj maljunuloj, kaj grafon Golovkin'on kun profeto Daniilo.

18. En Drezden al reĝo Aŭgusto.

19. „Ha Via reĝe moŝto, bombo!... „—Kio estas komuna en bombo kaj en letero, kiun mi al vi diktas? Skribu!... —Tio-ĉi fariĝis multe pli malfrue.

20. Nokte Karlo mem, ĉirkaŭrigardante nian tendaron, proksimiĝis okaze al kazakoj, kiuj sidis ĉe fajro. Li alsaltis rekte al ili kaj unu kozakon formortigis per pafilo propramane. Kozakoj tri fojojn pafis lin kaj kruele vundis lian piedon.

E N Ĥ A V O.

	Paĝ.
Edziĝo , komedio en tri aktoj.	3
Arturo , rakonto.	41
Ludilo de Sorto , rakonto en versoj.	59
Episkopo , drama skizo en versoj.	72
Poltavo , poemo de A. Puŝkin (versa traduko).	85







